

LA FILINO DE LA KAPITANO

de

Aleksandro Puŝkin

Esperantigita de

Pieter Jan Doumen

ENKONDUKO

La plej granda rusa poeto **Aleksandro Sergejeviĉ Puŝkin** (1799-1837) naskiĝis en Moskvo en malnova nobela familio. Li subtenis la liberalajn ideojn, kiuj pli kaj pli disvastiĝis en Rusio sub caro Aleksandro la 1-a. Li verkis multajn poemojn, en kiuj la ideo de libereco estis emfazata, i.a. Odo al Libereco, kiu en 1820 kaŭzis lian devigan translokiĝon al Jekatarinoslav. Ekde tiam la polico ĉiam persekutis lin. Poste li estis devigita loĝi en Kiŝinĵov (1820), Odeso (1823) kaj finfine en Miĥaelskoje (1824). Tie li trapasis spiritan krizon, kiu profundigis lian mondrigardon kaj faris lin pli serioza kaj rezignacia. En 1826 caro Nikolao la 1-a revokis lin al la ĉefurbo, sed veran liberecon li ne ĝuis. En 1837 li estis mortige vundita dum duelo kontraŭ Georgo d'Anthès, kiu amindumis lian edzinon.

Lia unua granda kreaĵo de Puŝkin estis la romantika verko Ruslan kaj Ludmila (1820). Antaŭ ĉio Puŝkin estas lirikisto. Granda simpleco kaj natureco karakterizas lian stilon. Sekvis La Malliberulo de Kavkazo (1821), La Ciganoj (1824), La Profeto (1826) kaj la granda historia dramo Boris Gudunov (1831). En Poltavo (1829) kaj La bronza Rajdisto li esprimis sian grandan admiron por caro Petro la Granda. Li verkis gravajn tragediojn kiel La ŝtona Gasto kaj Mozart kaj Salieri, kaj la romanon en versoj Jevgenij Onjegin (1823-1831). Dum siaj lastaj jaroj li precipe skribis prozon: La Filino de la Kapitano (1836), La rakontoj de la karmemora Ivan Petroviĉ Bjelkin (1830) kaj La pika Damo (1834). Liaj verkoj estis tradukitaj en multajn lingvojn.

Por pli da klareco en la historia romano "La Filino de la Kapitano" estas utile doni

kelkajn informojn pri la historia periodo en kiu ĝi situigas.

Imperiestrino Katarina la II-a, kiu regis Rusion de 1762 ĝis 1796, estis prusa princino, kiu estis edzinta al Petro la III-a, nepo de Petro la Granda, sed kiu estis vera frenezulo. Li eĉ minacis ŝian vivon. Tial grupo de militistoj sub gvido de la fratoj Orlov, konspiris kontraŭ la caro kaj igis proklami ŝin imperiestrino de Rusio. Petro la III-a estis malliberigita kaj poste mortigita en duelo. Katarina la II-a daŭrigis la laboron de Petro la Granda, antaŭenigante la kulturan disvolviĝon de Rusio. Pro ŝiaj meritoj ŝi ricevis la kromnomon "la Granda".

Sub ŝia regado okazis la ribelo de **Pugaĉov**.

Pugaĉov estis kozaka dizertinto. En 1773, en epoko kiam Rusio militis kontraŭ Turkio, li ribeligis kontraŭ la nobelaro la vastan regionon inter Volgo kaj Uralo, prometante al la popolo liberecon kaj teron, asertante ke li estas caro Petro la III-a. Komence de la ribelo li havis nur kvindek da partizanoj, sed liaj trupoj rapide pligrandiĝis kaj restis nevenkeblaj. Tial Katerina faris pacon kun la turkoj kaj sendis kontraŭ lin generalon Suvorov kun granda armeo, sed tamen ne povis venki lin. Finfine en 1774 li estis liverita de siaj propraj leŭtenantoj. Post mallonga juĝo li estis senkapigita kaj diskvaronigita en Moskvo la 10-an de januaro 1775.

I. LA GWARDIA SERĜENTO

Mia patro, Andrej Petroviĉ Grinĵov¹, servis dum sia juneco sub grafo Münich. Li pensiigis kiel unua majoro en 17... . Ekde tiu tempo li vivis en sia bieno en la gubernio Simbirsk, kie li edziĝis al fraŭlino Avdotja Vasilevna J., la filino de tiea malriĉa nobelo. Ni estis naŭ infanoj. Ĉiuj miaj gefratoj mortis junaj. Mia patrino estis ankoraŭ graveda de mi, kiam mi estis inskribita kiel serĝento sur la ruloj de la regimento Semjonov, danke al la protekto de la gvardia majoro, princo B., unu el niaj prok-

¹ La rusoj havas tri nomojn: antaŭnomon, patronimon kaj familinomon. La patronimo de viroj finiĝas per -oviĉ, -jeviĉ, plej ofte mallongigita al -iĉ, alligita al la antaŭnomo de la patro. La patronimoj de la virinoj finiĝas per -ovna aŭ -jevna. La familiaj nomoj plej ofte finiĝas por viroj per -ov aŭ -jev, por virinoj per -ova aŭ -jeva.

simaj parencoj. Se kontraŭe mia patrino estus naskinta filinon, mia patro estus deklarinta la morton de la serĝento, kaj la afero estus finiĝinta tie. Ĝis la fino de miaj studoj mi estis konsiderata kiel havante forpermeson.

Tiutempe ni ne ricevis la hodiaŭan edukon. Ekde la aĝo de kvin jaroj mi estis konfidita al la ĉevaldresisto Saveliĉ, kiun oni metis apud min kiel speco de kortegano pro lia sobreco kaj seriozeco. Sub lia kuratoreco mi lernis legi kaj skribi ruse antaŭ mia dek-dua jaro, kaj tre bone juĝi pri la kvalitoj de leporhundo. Mia patro tiam donis al mi francan instruiston, S-ron Beaupré, kiu estis venigita el Moskvo samtempe kun provizo da vino kaj oleo. Lia alveno multe malplaĉis al Saveliĉ.

“Danke al Dio,” tiu ĉi murmuris, “la infano ŝajnas al mi sana, pura, bone kombita kaj bone nutrita. Necesis ankoraŭ dungi iun *mosjé*², kvazaŭ oni havus ankoraŭ ne sufiĉe da propraj homoj.”

En sia lando Beaupré estis estinta frizisto, poste soldato en Prusio, tiam li estis veninta al Rusio por esti *učitelj* (instruisto), sen bone kompreni la sencon de tiu vorto. Li estis bona knabo, sed nepripensema kaj ekstreme libertina. Lia plej granda malforto estis lia pasio por la bela sekso. Tre ofte lia tenereco altiris al li batojn, pri kiuj li plendis poste dum pluraj tagoj. Cetere li ne estis, laŭ sia propra esprimo, *malamiko de la botelo*, kio signifas en ordinara lingvaĵo, ke li ŝatis drinki pli ol necesis por ebriigi sin. Sed ĉar ĉe ni oni trinkis vinon nur dum la manĝoj kaj krome el malgrandaj glasetoj, kaj ke cetere oni kutime forgesis mian instruiston, Beaupré tre rapide kutimiĝis al la rusa vodko, kiun li finfine preferis al la vino de sia naskiĝlando, juĝante, ke vodko estas senkompare pli bona por la stomako.

Ni tuj ambaŭ bone komprenis nin, kaj malgraŭ ke, laŭ lia kontrakto, li devis instrui al mi la francan, la germanan kaj ĉiujn sciencojn, li preferis lerni de mi kiel eble plej rapide kelkajn rusajn vortojn, kaj tiam ĉiu el ni okupiĝis pri siaj propraj aferoj. Ni vivis en perfekta harmonio, kaj mi ne deziris alian mentoron.

Sed baldaŭ la sorto separis nin, kaj jen en kiuj cirkonstancoj.

Nia lavistino Palaŝka, forta kaj variolmarkita knabino, kaj la unuokula Akulka, nia farma servistino, akordiĝis iun tagon por kune ĵeti sin antaŭ la piedojn de mia patrino, akuzis sin pri

krima malforto kaj plorante plendis pri tio, ke la *mosjé* delogis ilin kaj misuzis ilian sen-spertecon. Mia patrino tute ne povis ridi pri tiaj aferoj kaj siavice plendis pri tio al mia patro. La justeco estis konciza : mia patrino tuj venigis la francan kanajlon. Ŝi diris al *mosjé*, ke li estis dungita por instrui min. Informite, mia patro venis al mia ĉambro. Beaupré dormis tie la dormon de la senkulpeco. Mi estis okupita. Necesas diri, ke Beaupré venigis por mi geografian karton de Moskvo. Ĝi pendis neuzata kontraŭ la muro, kaj jam delonge mi estis delogita de ĝiaj dimensioj kaj la kvalito de la papero. Mia patro eniris precize en la momento, kiam mi plantis pinglon kun flageto ĉe la Kabo Bona Espero. Vidante kun kia atento mi okupiĝis pri geografio, li tiris min tri- kvarfoje ĉe la oreloj, tiam proksimiĝis al *mosjé* Beaupré, vekis lin maldelicate kaj komencis fari riproĉojn al li. Tute konfuzite, Beaupré volis leviĝi, sed ne povis : la povra franco estis morte ebria. Bona batado same tiom valoris kiom malbona. Mia patro relevis lin per la kolumo, puŝis lin eksteren, kaj la saman tagon li estis maldungita je la granda ĝojo de Saveliĉ. Tio estis ankaŭ la fino de mia edukado

Mi vivis kiel postrestanta infano, ĉasante kolombojn kaj ludante per boksaltado kun la infanoj de la geservistoj. Mi tamen jam havis pli ol dek ses jarojn.

En tiu momento mia sorto draste ŝanĝiĝis.

Iam en aŭtuno mia patrino estis en la salono boliganta marmeladon de mielo, kaj mi rigardis la bolantan ŝaŭmon, likante miajn lipojn.

Apud la fenestro mia patro legis la *Agendon de la Kortego*, kiun li ricevis ĉiujare. Tiu libro ĉiam havis grandan influon sur li. Neniam li trafolumis ĝin sen esti tre emociita, kaj ĝia legado kaŭzis ĉe li eksterordinaran moviĝon de la galo. Mia patrino, kiu konis parkere ĉiujn liajn kutimojn, ĉiam penis kaŝi la malfeliĉigan libron, kaj tiel *la Agendo de la Kortego* ofte restis ignorata de li dum multaj monatoj. Nur kiam li hazarde metis la manon sur ĝin, okazis, ke li ne formetis ĝin dum multaj horoj. Do, mia patro legis la *Agendon de la Kortego*, de tempo al tempo levante la ŝultrojn kaj mallaŭte ripe-tante :

“Leŭtenanto-generalo !...Sed li estis nur serĝento sub miaj ordonoj ! ...Kavaliro en ambaŭ rusaj ordonoj !... Jam pasis multa tempo de kiam ni interkonatiĝis...”

Finfine li ĵetis la *Agendon* sur la divanon kaj plonĝis en meditado, kiu aŭguris nenion

² La malbone prononcita franca vorto *monsieur* (sinjoro)

bonan por mi. Subite li turnis sin al mia patrino :

“Avdotja Vasílievna, kiun aĝon do havas nun nia Petruŝa³ ?”

“Li jam havas dek sep jarojn,” respondis mia patrino. “Petruŝa naskiĝis en la sama jaro kiam onklino Natasja Gerasimova perdis unu okulon, kaj kiam ankaŭ...”

“Bone,” interrompis mia patro. “Estas tempo ke li faru sian militistan servon. Li jam sufiĉe postkuris la knabinojn kaj grimpis en la kolombejojn !”

La penso pri proksima separo surprizis mian patrinon tiagrade, ke ŝi lasis fali la kulregon en la kaserolon, kaj ke larmoj fluadis sur sia vizaĝo. Kontraŭe estis malfacile priskribi mian entuziasmon. Servi estis por mi ankaŭ libereco kaj plezuroj de la vivo en Sankt-Peterburgo. Mi imagis min kiel oficiro de la gvardio, kio estis laŭ mi la kulmino de la homa feliĉeco.

Mia patro ŝatis nek ŝanĝi siajn decidojn nek plenumi ilin. La tago de mia foriro estis fiksita. La antaŭan tagon mia patro anoncis, ke li intencis sendi kun mi leteron al mi estonta ĉefo, kaj demandis plumon kaj inkon.

“Ne forgesu, Andrej Petroviĉ,” diris mia patrino, “saluti por mi princon B. Mi esperas,“ ŝi aldiris, “ke li ne forgesos Petruŝa en siaj favoroj.”

“Kion vi rakontas ?” demandis mia patro, kuntirante la brovojn. “Kial mi devus skribi al princo B.?”

“Sed vi ja diris, ke vi skribos al la ĉefo de Petruŝa.”

“Jes, kaj tiam?”

“Sed la ĉefo de Petruŝa estas ja princo B. Petruŝa estas enskribita sur la ruloj de la regimento Semjonov”

“Ĉu sur la ruloj ? Kion tio faru al mi, ke li estas enskribita sur la ruloj ? Petruŝa ne iros al Sankt-Peterburgo. Kion li lernus servante en Peterburgo ? Ĉu malŝpari sian monon, nenio-fari ? Ne, li servos en la armeo kaj tiel lernos la metion de soldato. Li enspiros la odoron de la pulvo, li estos soldato kaj ne maltaŭgulo. Sur la ruloj de la gvardio ! Kie estas liaj paperoj ? Alportu ilin al mi.”

Mia patrino iris preni la dukomentojn, kiuj estis ranĝitaj en sia kofreto kune kun la ĉemizeto, kiun mi surhavis la tagon de mia bapto, kaj ŝi prezentis ilin al mia patro per tremetanta mano. Tiu ĉi atente legis ilin, metis ilin antaŭ si sur la tablon kaj komencis skribi.

Scivolemo turmentis min. Kien do li estis sendonta min, se ne estis al Sankt-Peterburgo ? Mi ne forlasis per la okuloj la plumon de mia patro. Ĝi moviĝis sufiĉe malrapide sur la papero. Finfine li finis la leteron, metis la leteron kaj miajn paperojn en la saman paketon, deprenis siajn okulvitrojn kaj vokis min.

“Jen letero al Andrej Karloviĉ R., mia maljuna kamarado kaj amiko. Vi iros al Orenburgo por servi sub liaj ordonoj.”

Tiel ĉiuj miaj brilaj esperoj estis nuligitaj. Anstataŭ gaja vivo en Sankt-Peterburgo atendis min tedo en sovaĝa, malproksima lando. La militista servo, pri kiu mi pensis minuton antaŭe kun tiom da entuziasmo, ŝajnis al mi terura malfeliĉo. Sed kion fari ? La postan matenon mia vojaĝkaleŝo estis kondukita antaŭ la peronon. Oni ŝarĝis mian kofron kaj valizon kun ĉio necesa por fari teon kaj paketoj da blankaj bulkoj kaj kukoj, kiuj estis por mi la kulmino de la patrina dorlotado. Miaj gepatroj donis al mi sian benon. Mia patro diris:

“Adiaŭ, Pjotr! Estu fidela al tiu al kiu vi ĵuris fidelecon. Obeu al viaj ĉefoj. Ne serĉu iliajn favorojn. Ne troigu vian diligentecon. Rifuzu nenion al vi mem, kaj memoru la proverbon : ‘Gardu viajn vestaĵojn, kiam ili estas novaj, kaj vian honoron ekde via junaĝo’.”

Plorante mia patrino rekomendis al mi prizorgi mian sanon, kaj al Saveliĉ bone gardi ŝian infanon. Tiam mi surmetis mian leporan *tulupon*⁴ kaj super ĝin vulpan peltaĵon. Mi sidiĝis en la kaleŝon kun Saveliĉ kaj ni forveturis. Mi ploris.

Dumnokte ni alvenis en Simbirsk. Mi devis tie restadi unu tagon por fari aĉetojn, pri kiuj, cetere, okupiĝis Saveliĉ. Mi haltis antaŭ gastejo. Ekde la mateno Saveliĉ foriris fari la aĉetojn. Baldaŭ tedis min la rigardado tra la fenestro al malpura strato, kaj mi komencis vagi tra la gastejo. Enirante grandan, bilardan salonon, mi vidis tie grandan viron de proksimume tridek kvin jaroj kun longaj nigraj lipharoj en hejmvesto, tenante bilardan bastonon en la mano kaj pipon en la buŝo. Li ludis kontraŭ la poentnombristo. Tiu ĉi, kiam li gajnis, drinkis glaseton da vodko, kaj kiam li malgajnis, li devis rampi sur kvar piedoj sub la bilardon.

Mi rigardis, kiel ili ludis. Ju pli longe la ludo daŭris, des pli oftigis la promenoj sur kvar piedoj, ĝis fine la poentnombristo restis sub la

³ Karesnomo por Pjotr (Petro)

⁴ Speco de mallonga peltaĵo.

bilardo. La sinjoro prononcis kelkajn konvenajn vortojn kiel funebnan paroladon kaj proponis al mi ludi partion. Mi rifuzis, dirante, ke mi ne sciis ludi bilardon. Tio ŝajnis strange al li. Li rigardis min kun kompato, sed tamen ni komencis interbabili. Mi eksciis, ke li nomiĝas Zurin, ke li estas kapitano en regimento de husaroj, ke li estas en Simbirsk por akcepti rekrutojn kaj ke li loĝas en la gastejo. Zurin invitis min vespermanĝi kun li. Mi akceptis kun plezuro. Ni sidiĝis ĉe tablon. Zurin multe drinkis kaj devigis min ankaŭ drinki, dirante, ke mi devas kutimiĝi al la armeo. Li rakontis al mi regimentajn anekdotojn, kiuj igis min ridegi, kaj ni forlasis la tablon tute kiel amikoj. Tiam li ofertis al mi instrui min ludi bilardon.

“Tio estas necese en nia profesio,” li diris. “Supozu, ke dum militiro vi alvenas en fremda urbeto. Pri kio okupiĝi tiam? Oni ne povas ĉiam batali kontraŭ la judoj. Vole nevole vi iras al gastejo kaj vi komencas ludi bilardon.”

Li tute konvinkis min, kaj mi diligente entreprenis tiun lernadon. Zurin kauraĝigis min per forta voĉo, miris pri miaj rapidaj progresoj, kaj post kelkaj lecionoj, li proponis al mi ludi pro mono, unu groŝo⁵ por poento, ne pro la mono mem, sed por diri, ke oni ne ludas pro nenio, kio, laŭ lia esprimo, estas malbona kutimo. Mi konsentis. Zurin mendis du punĉojn kaj persvadis min gustumi ĝin., ripetante, ke oni devas kutimiĝi al la armeo.

“Kio estus la armeo sen punĉo?” li diris.

Kaj mi obeis.

Intertempe la partio daŭris. Ju pli da punĉoj mi drinkis, des pli mi fariĝis aŭdaca. La globoj ofte flugis trans la randojn de la bilardo: mi varmiĝis, kaj mi kverelis kun la poentnombriŝto, kiu nombris Dio scias kiel. Unuvorte mi kondutis kiel dorlotita infano. La tempo pasis sen ke ni rimarkis tion. Zurin, rigardante la horloĝon, demetis sian bastonon kaj diris al mi, ke mi perdis cent rublojn. Tiu deklaro iomete konfuzis min. Saveliĉ havis mian monon. Mi ekskuzis min, dirante, ke mi ne havas monon sur mi, sed Zurin interrompis min, dirante:

“Mi petas vin, ne maltrankviliĝu. Mi povas atendi, sed nun ni iru al Arinuŝka.”

Kion fari? La tago finiĝis per la sama fikonduto. Ni vespermanĝis ĉe Arinuŝka. Zurin regule enverŝis por mi trinkaĵon, ripetante, ke oni devas kutimiĝi al la armeo. Forlasante la tablon, mi apenaŭ povis stari sur miaj kruroj. Noktomeze Zurin rekondukis min al la gastejo.

Ni renkontis Saveliĉ sur la perono. Li ĝemis, kiam li vidis la signojn de mia fervoro por la armeo.

“Sed kio do okazis al vi, mastro?” li demandis min per plenda voĉo. “Kie do vi metis vin en tian staton, Jesuo Maria? Mi neniam vidis ion tian.”

“Silentu, maljuna barbulo,” mi respondis al li balbute. “Vi estas ebria, enlitiĝu... kaj enlitiĝu min.”

La morgaŭon mi vekigis kun malsana kapo, konfuzite memorante ĉiujn okazaĵojn de la antaŭa vespero. Miaj pensoj estis interrompitaj de Saveliĉ, kiu eniris ĉe min kun taso de teo.

“Vi jam frue komenciĝas diboĉi, kara Pjotr Andrejiĉ,” li diris al mi, skuante la kapon. “De kiu vi ekhavis tion? Nek via patro, nek via avo iam estis ebriuloj, mi pensas. Ne valoras la penon paroli pri via patrino: ekde sia naskiĝo ŝi trinkis nur kvason⁶. Kaj kiu kulpas pro tio? Tiu malbenita *moŝjé*. Lia tuta laboro estis kurado al Antipjevna: ‘Sinjorino, iom da brando, mi petas.’ Estas li kiu edukis vin, tiu filo de hundino. Estis necese dungi paganon kiel instruiston, kvazaŭ nia mastro ankoraŭ ne havus sufiĉe da homoj!”

Mi hontis. Mi turnis min sur la alian flankon kaj diris:

“Foriru, Saveliĉ. Mi ne deziras teon.”

Sed estis malfacile haltigi Saveliĉ, kiam okazis, ke li devis riproĉe prediki.

“Hej, Pjotr Andrejiĉ, nun vi scias, kio estas ebriigi sin. Oni havas pezan kapon, on ne malsatas. Ebria viro taŭgas por nenio. Trinku do nun iomete da salakvo de kukumo kun mielo, aŭ, ankoraŭ pli bone por malaperigi la alkoholvaporojn, bonan glaseton da brando. Ĉu vi volas iom da ĝi?”

En tiu momento eniris knabo kiu donis al mi papereton de Zurin. Mi malfermis ĝin kaj legis la sekvantajn liniojn:

Kara Pjotr Andrejiĉ, mi petas vin, sendi al mi per tiu knabo la cent rublojn kiujn vi malgajnis hieraŭ. Mi urĝe bezonas la monon.

Tutkore, Ivan Zurin.

Mi rezignis. Mi alprenis indiferentan mienon kaj, turnante min al Saveliĉ, kiu estis la administranto de mia mono, de mia tolaĵo kaj de ĉiuj miaj aferoj, mi ordonis al li doni cent rublojn al tiu knabo

“Kiel kaj kial?” li demandis, konsternita.

⁵ Duona kopeko, do la 200-ona parto de rublo

⁶ Speco de cidro.

“Mi ŝuldas ilin al li,” mi respondis kiel eble plej malvarme.

“Ĉu vi ŝuldas ilin al li?” demandis Saveliĉ, kies konsterneco pligrandigis de minuto al minuto. “Sed kiam vi povis prunti ilin al li? Tio ne estas klara al mi. Kion ajn vi volas, Sinjoro, sed mi ne donos monon al li.”

Mi pensis, ke, se en tiu decida momento mi ne superus tiun maljunan obstinulon, estus tre malfacile por mi estontece liberigi min de lia kuratoreco, kaj, fiere rigardante lin, mi diris:

“Mi estas via mastro kaj vi estas mia servisto. Tiu mono apartenas al mi. Mi malgajnis ĝin, ĉar mi volis tion! Mi konsilas al vi ne kontraŭdiri min kaj obei min, kiam mi ordonas vin fari ion.”

Saveliĉ estis tiagrade mirigita pri miaj vortoj, ke li kunfaldis la manojn kaj staris kvazaŭ plantita surloke.

“Kial vi atendas?” mi kriis, kolera.

Saveliĉ ekploris.

“Sinjoro Jesuo! Pjotr Andrejiĉ,” li diris per tremanta voĉo, “ne igu min morti pro ĉagreno! Trezoro de mia vivo, auskultu min, kiu estas maljuna. Skribu al tiu vojrabisto, ke estis nur por ŝerci, ke ni ne havas monon por ludi. Cent rubloj! Kompatema Sinjoro! Diru al li, ke viaj gepatroj severe malpermesis al vi ludi, se ne per nuksoj...”

“Sufiĉe da babilajoj!” mi maldelicate interrompis lin. “Donu al mi la monon, aŭ mi metas vin eksteren!”

Saveliĉ rigardis min kun granda malĝojo kaj iris preni la monon. Mi kompatis la povran maljunulon, sed mi volis konkeri mian liberecon kaj montri, ke mi ne plu estas infano. Zurin ricevis siajn cent rublojn. Saveliĉ haste trenis min for de tiu malbenita gastejo, anoncante, ke la ĉevaloj estas pretaj. Mi forlasis Simbirsk kun konfuzita konscienco kaj silente pentante pri mia konduto. Sen adiaŭi mian edukinton kaj pensante, ke mi neniam plu rividos lin.

II. LA GVIDANTO

Regiono, bela regiono,
Nekonata bela regiono!
Sed mi mem ne venis libervole,
Ĉi tien min kondukis bonaj knaboj,
La impeta ardo de l' juneco
La etoso de la kabaretdj.
(Malnova kanto)

Survoje miaj pensaj ne estis tre agrablaj. La malgajno de mia mono, je la prezo de la tiama vivo, estis grava. Mi ne povis kredi min, ke

mia konduto en la gastejo estis stulta, sed mi sentis min kulpa kontraŭ Saveliĉ. Tio ĉi turmentis min. Saveliĉ, sur sia sidejo, sombra, tenis sin aparta. Li silentis, kaj de tempo al tempo suspiris. Mi volis repaciĝi kun li, sed mi ne sciis per kio komenci. Finfine mi diris al li:

“Nu, Saveliĉ, tio sufiĉas, ni interpaciĝu. Mi kulpas pri tio: mi mem bone vidas, ke mi kulpas. Mi stulte agis hieraŭ, kaj mi nenecese ofendis vin. Mi promesas konduki pli saĝe estontece kaj obei vin. Nu, ne kolere kontraŭ mi, ni faru pacon.”

“Aĥ, Pjotr Andrejiĉ,” li respondis kun profunda suspiro. “Mi koleras kontraŭ mi mem: estas mi kiu kulpas pro ĉio. Kial mi lasis vin sola en la gastejo. Kion fari? La diablo tentis min. Mi havis la ideon eniri ĉe la edzino de la sakristano, revidi mian onklinon, kaj mi restis tro longe ĉe ŝi. Estas vera malfeliĉo! Kiel mi povus montri min antaŭ miaj gemastroj? Kion ili diros, kiam ili ekscios, ke ilia infano drinkis kaj ludis?”

Por konsoli la povran Saveliĉ, mi promesis al li, ke estontece mi ne plu disponos pri kopeko sen paroli pri tio al li. Iom post iom li retrovis sian memfidon, kvankam li daŭre iam kaj iam grumblis, skuante la kapon:

“Cent rubloj, tio ne estas malgranda afero!”

Intertempe mi proksimiĝis al mia celo. Ĉirkaŭ mi etendiĝis malĝojigaj dezertoj alternantaj kun montetoj kaj ravinoj. Ĉio estis kovrita de neĝo. La suno malleviĝis. La kaleŝo ruliĝis sur mallarĝa vojo, aŭ pli ĝuste sur trako, strekita de kampulsledoj. Subite la veturigisto rigardis flanken. Tiam li deprenis sian ĉapon, turnis sin al mi kaj diris:

“Sinjoro, ĉu vi ne volas, ke ni reiru?”

“Kial do?”

“La vetero estas malfidinda: la vento leviĝas kaj blovas pli forte. Rigardu, kiel ĝi suprenblovas la neĝon!”

“Per kio tio ĝenas nin?”

“Sed ĉu vi ne vidas tion?” La veturigisto montris la orienton per la vipo.

“Mi vidas nenion krom la blankan stepon kaj la helan ĉielon.”

“Sed tie, tie for! Tiu nubeto!”

Ĉe la horizonto mi efektive vidis blankan nubeton, kiun mi komence prenis por malproksima monteto. La veturigisto eksplikis al mi, ke tiu nubeto antaŭdiras neĝotempeston.

Mi jam aŭdis paroli pri neĝotempestoj en tiu lando, kaj mi sciis, ke tutaj ekipaĵoj estis glutitaj de la neĝo. Saveliĉ konsilis min sekvi la konsilon de la veturigisto kaj reveturi laŭ la

sama vojo. Sed la vento ne ŝajnis forta al mi.. Mi esperis atingi ĝustatempe la sekvantan haltolokon, kaj mi ordonis iri pli rapide.

La veturigisto igis la ĉevalojn galopi, sed li daŭre rigardis orienten. La ĉevaloj bone galopadis. Intertempe la vento plifortiĝis. de horo al horo. La nubeto fariĝis amaso da nuboj, kiu rapide formiĝis kaj baldaŭ kovris la tutan ĉielon. Fajna neĝo ekfalas, kiu tre baldaŭ ŝanĝiĝis en dikajn flokojn. La vento hurlis. Estis neĝotempesto. Ĉio malaperis el la vido.

"Hej, sinjoro," kriis la veturigisto, "jen la tempesto !"

Mi metis la kapon el la glitveturilo kaj vidis nur mallumon kaj neĝokirliĝojn. La vento hurlis tiel forte, ke ĝi ŝajnis viva estaĵo. La neĝo amasiĝis sur Saveliĉ kaj mi, la ĉevaloj iris nur paŝe kaj baldaŭ haltis.

"Kial vi ne plu antaŭeniras ?" mi malpacience demandis al la veturigisto.

"Sed kiel do antaŭeniri ?" li replikis, mal-suprenirante de sia benko. "Mi ne nur ne sciis, kie ni estas, sed mi ankaŭ ne plu vidas la vojon, kaj ĉie ĉirkaŭ ni estas nebulo."

Mi komencis insulti lin. Saveliĉ intervenis por li.

"Kaj oni ne ŝatis aŭskulti bonan konsilon," li diris kolere. "Se ni estus reirintaj al la antaŭa gastejo, ni povus trinki varman teon kaj bone dormi ĝis la mateno. Intertempe la tempesto estus ĉesinta kaj ni povus reforveturi. Kien ni devas iri tiel rapide ? Estus alia afero, se ni irus al geedziĝa festo !"

Saveliĉ pravis. Sed ni povis fari nenion pri tio. La neĝo ankoraŭ ĉiam falis en grandaj flokoj. Ĝi amasiĝis sur kaj ĉirkaŭ la glitveturilo. La ĉevaloj atendis kun mallevitaj kapoj, de tempo al tempo tremetante. La veturigisto iris kaj venis, aranĝante la jungilaron por okupi sin. Saveliĉ ankoraŭ ĉiam grumblis. Mi rigardis en ĉiujn direktojn, esperante malkovri signon de vivo aŭ vojon, sed mi povis vidi nenion alian ol kirliĝantajn neĝoflokojn. Subite mi ekvidis ion nigran...

"Hej, veturigisto !" mi ekkriis. "Rigardu tien, kio nigra troviĝas tie for ?"

La veturigisto tuj komencis rigardi en tiu direkto.

"Dio scias tion, sinjoro !" li diris, residiĝante sur sian benkon por pli bone vidi. "Ne estas veturilo, ankaŭ ne estas arbo, kaj oni dirus ke tio moviĝas. Sendube estas lupoj aŭ viroj."

Mi ordonis lin iri al la nekonata objekto, kiu sammomente komencis moviĝi en nia direkto. Kvin minutojn poste, ni renkontis viron.

"Hej, bona viro !" kriis la veturigisto. "Ĉu vi scias, kie ĉi tie estas la vojo ?"

"La vojo troviĝas ĉi tie. Mi paŝas sur la firman teron," respondis la vojaĝanto, "sed tio neniel helpas vin."

"Aŭskultu, amiko," mi diris al li. "Ĉu vi konas la regionon ? Ĉu vi povus konduki nin al gastejo por la nokto ?"

"Mi bone konas la regionon," respondis la vojaĝanto, "danke al Dio. Mi trairis ĝin piede, veturilo en ĉiuj direktoj. Sed kia veteraĉo ! Oni facile perdas la vojon. Estas pli bone resti ĉi tie kaj atendi. Espereble la ŝturmo baldaŭ trankviliĝos kaj la ĉielo reklariĝos, kaj tiam oni povos direkti sin laŭ la steloj."

Lia flegmo kuraĝigis min. Mi jam decidis transdoni min al la volo de Dio kaj pasigi la nokton sur la stepo, kiam subite la vojaĝanto lerte sidiĝis sur la kondukbenkon kaj diris al la veturigisto :

"Nu, danke al Dio, ne tre malproksime de ĉi tie loĝas homoj. Turnu dekstren kaj ekiru."

"Kaj kial turni dekstren ?" malkontente demandis la veturigisto. "Kie vi vidas la vojon ? Vi ne timas erari. Ne estas viaj ĉevaloj, ne estas via glitveturilo, vi ne povas iri tien."

La veturigisto ŝajnis pravi laŭ mi.

"Efektive," mi diris. "Sed kial vi pensas, ke loĝas homoj proksime de tie ĉi ?"

"Ĉar la vento blovas de tie, mi povas flari fumon : la domoj devas esti tre proksime."

Lia inteligenteco kaj lia fajna nazo mirigis min, kaj mi ordonis al la veturigisto obei lin. La ĉevaloj malfacile paŝis tra la profunda neĝo. La glitveturilo malrapide moviĝis, jen grim-pante sur neĝostakon, jen sinkante en truon, jen kliniĝante al unu flanko, jen al la alia. Estis kvazaŭ ni sidus en boato sur maro dum tempesto. Saveliĉ ĝemis. Ĉiumomente li falis kontraŭ min. Mi rebatis malsupren la litkovrilon, envolvis min en mian peltaĵon kaj komencis dormeti, lulata de la kanto de la tempesto kaj la glitado de la glitveturilo, kiu malrapide iris antaŭen.

Mi havis sonĝon, kiun mi neniam forgesos, en kiu mi nun vidas ion profetan, kiam mi imagas tra tiu sonĝo la strangajn aventurojn de mia vivo. La leganto pardonos min, ĉar verŝajne li scias per lia sperto, kun kia natura facileco homo transdonas sin al superstiĉo malgraŭ ĉia malestimo, kiun li povas havi por antaŭjuĝoj.

Mi troviĝis en tiu dispozicio de sentoj kaj animo, kie la realeco cedas al revoj kaj konfuziĝas kun la malklaraj vizioj de komencanta

sensentiĝo. Ŝajnis al mi, ke la tempesto daŭre hurladas kaj ni ankoraŭ ĉiam eraras sur la neĝdezerto...

Subite mi ekvidas grandajn pordegon, kaj mi eniras la grandan korton de nia propraĵo. Mia unua penso estas, ke mia patro koleriĝos kontraŭ mi pro mia nelibervola reveno, kaj ke li konsideros tiun revenon kiel bone pripensitan malobeon.

Tre maltrankvila, mi saltas de la glitveturilo, kaj mi renkontas mian patrinon sur la perono. Kun profunde malĝoja mieno ŝi diras al mi : "Via patro estas grave, morte malsana kaj deziras adiaŭi vin."

Terurigite, mi sekvas ŝin en la dormoĉambro, kiu estas malforte prilumita. Apud la lito troviĝas homoj kun malĝajaj vizaĝoj. Tre dolĉe mi proksimiĝas al la lito, kaj mia patrino forigas la kurtenojn, dirante :

"Andrej Petroviĉ ! Petruŝa alvenis. Li revenis, kiam li eksciis, ke vi estas malsana. Donu al li vian benon."

Mi surgenuiĝas kaj fiksas miajn okulojn sur la malsanulon. Anstataŭ mia patro, mi vidas en la lito kampulon kun nigra barbo, kiu gaje rigardas min. Ne komprenante, mi alparolas mian patrinon kaj demandas :

"Kion tio signifas ? Tio ne estas mia patro. Kial do mi devas peti muĵikon⁷ pri lia beno ?"

"Ne gravas, Petruŝa, estas via baptopatro. Kisu lian manon kaj demandu lin beni vin."

Mi ne konsentis pri tio. Tiam la kampulo saltas el la lito, tiras hakilon de malantaŭ sia dorso kaj komencas haki ĉiuflanke. Mi volas fuĝi, sed mi ne povas. La ĉambro pleniĝas per kadavroj. Mi stumblas sur la korpoj kaj glitas en maron de sango. La terura muĵiko vokas min per dolĉa voĉo :

"Ne timu, filo, proksimiĝu kaj ricevu mian benon."

Terura timo superfortas min.

En tiu momento mi vekiĝis. La ĉevaloj estis haltintaj, kaj Savéliĉ tiris min per la mano, dirante :

"Malsupreniru, sinjoro, ni alvenis."

"Kie do ?" mi demandis, frotante miajn okulojn.

"Apud gastejo. Dio helpis nin : ni ĵus koliziis kontraŭ heĝon. Rapide malsupreniru, sinjoro, por varmigi vin."

Mi paŝis el la glitveturilo. La ŝturmo ankoraŭ ĉiam furiozis kvankam kun malpli da forto. Estis mallume. Oni ne vidis manon antaŭ la

okuloj. La gastejestro venis renkonte al mi ĉe la enirejo. Li tenis lanternon sub sia mantelo kaj kaj kondukis nin en la gastoĉambro, kiu estis malgranda, sed sufiĉe propra kaj prilumata per brulanta lignero. Kontraŭ la muro pendis fusilo kaj alta kozakĉapo. La gastejestro, jajika⁸ kozako, aperis esti kampulo de ĉirkaŭ sesdek jaroj, sed li estis ankoraŭ vigla kaj firma. Saveliĉ portis malantaŭ mi la vojaĝsakon kaj petis fajron por fari teon, pri kiu mi ankoraŭ neniam en mia vivo sentis tian bezonon. La gastejestro iris preni ĝin.

"Kie do estas nia gvidanto ?" mi demandis al Saveliĉ.

"Ĉi tie, Via Ekscelenco," respondis al mi voĉo de supre.

Mi rigardis la tabulkuŝejon kaj vidis nigran barbon kaj du brilajn okulojn.

"Nu, amiko, ĉu fariĝis al vi malvarme ?" mi demandis.

"Kompreneble, en tiu ĉi maldika mantelo, kiun mi surhavas. Mi havis peltmantelon, sed, por diri al vi la veron, mi donis ĝin hieraŭ al kafejestro kiel garantiaĵon. Mi ne kredis, ke la frosto estos tiel akra hodiaŭ."

En tiu momento la gastejestro eniris kun bolanta samovaro⁹. Mi ofertis tason da teo al mia gvidanto, kaj la kampulo tuj forlasis sin kuŝejon. Lia ekstero ŝajnis al mi rimarkinda. Li estis proksimume kvardekjara, mezume granda, svelta sed kun larĝaj ŝultroj. En lia nigra barbo jam vidiĝis grizaj makuloj. Liaj viglaj nigraj okuloj turniĝis al ĉiuj direktoj. Lia vizaĝesprimo estis sufiĉe plaĉa, sed ruza. Liaj haroj estis tonditaj mallongaj. Li surhavis eluzitan mantelon kaj tartaran pufpantalono. Mi portis al li tason da teo. Li gustumis ĝin kaj suprentiris la nazon.

"Ĉu Via Ekscelenco bonvolus portigi al mi glaseton da brando ? Ni, kozakoj, ne trinkas teon !"

Mi volonte kontentigis lin.

La gastejestro prenis kruĉon kaj glaseton el la ŝranko, iris al li, rigardis lin en la vizaĝon kaj diris :

"Nu, nu ! Vi denove en nia najbareco. De kie do vi venas ?"

Nia gvidanto signifoplene okulumis kaj respondis per proverbo :

"Mi estis en la ĝardeno kaj pikis kelkajn grajnetojn. La avino ĵetis al mi ŝtonon, sed ne trafis min. Kaj kiel vi fartas ĉi tie ?"

⁷ Rusa kampulo kaj servutulo

⁸ Jajik, lago apud kiu loĝas kozaka tribo

⁹ Tipe rusa aparato por fari teon

"Ĉu ĉe mi?" respondis la gastejestro, kiu daŭrigis la konversacion per aludoj. "Nu, ni volis iri al la vesproj, sed la popedzino ne volis. La popo faras vojaĝon, kaj la diablo havas liberan vojon!"

"Silentu do, onkleto," diris la vagabondo. "Post pluvo kreskas la fungoj. Kaj se estas fungoj, ankaŭ troveblas korbeto? Sed nun," kaj li denove okulumis, "kaŝu la hakilon maltaŭ via dorso, ĉar la arbaristo faras sian rondon... Via Ekscelenco, je via sano!"

Ĉe tiuj vortoj li prenis la glason, krucosignis sin kaj eltrinkis ĝin per unu gluto. Tiam li klinis sin antaŭ mi kaj reiris al sia kuŝejo.

Tiutempe mi komprenis nenion de tiu fripona slango, sed poste mi divenis, ke temas pri la armeo de Jajik, kiu estis antaŭ nelonge – post la ribelo de 1772 – venkita. Saveliĉ aŭskultis kun tre malkontenta mieno. Malfide li jen rigardis la gastejestron jen la gvidanton. La gastejo, aŭ la *umet*, kiel oni nomas ĝin tie, staris meze de la stepo malproksime de ĉiu setlejo kaj multe similis al rabistejo. Sed oni povis fari nenion pri tio. Ne estis penseble, tuj daŭrigi nian vojaĝon. La maltrankvileco de Saveliĉ multe amuzis min. Intertempe mi pretigis min por la nokta ripozo kaj kuŝiĝis sur benkon. Saveliĉ decidis dormi sur la forno¹⁰, kaj la gastejestro kuŝiĝis sur la grundo. Baldaŭ la tuta domo ronkis, kaj mi profunde endormiĝis.

Kiam mi vekiĝis sufiĉe malfrue la sekvantan matenon, mi vidis ke la ŝtormo finiĝis. La suno brilis. La neĝo kuŝis sur la nemezurebla stepo kiel blindige blanka vestaĵo. La ĉevaloj estis jungitaj. Mi pagis la gastejestron, kiu petis tiel moderan sumon, ke eĉ Saveliĉ ne protestis kaj ne, kiel li kutimis, komencis marĉandi, kaj la suspektoj de la antaŭa tago tute malaperis el lia kapo. Mi vokis la gvidanton, dankis lin por lia helpo kaj diris al Saveliĉ, ke li devas doni al li duonan rublon kiel rekompenco. La vizaĝo de Saveliĉ malheliĝis.

"Ĉu duonan rublon," li demandis, "kial do? Ĉar vi mem permesis lin kuniri al la gastejo? Kiel vi volas, sinjoro, sed ni jam ne havas tro de rubloj. Se oni rekompencas ĉiun, oni baldaŭ mem malsatos."

Mi ne povis kvereli kun Saveliĉ.

Laŭ mia promeso, nur li kompetentis pri la mono. Mi bedaŭris tamen, ke mi ne povis

rekompenci la viron, kiu savis min se ne el malfeliĉo, tamen el tre malagrabla situacio.

"Bone," mi diris flegme, "se vi ne volas doni al li duonan rublon, tiam donu al li ion el miaj vestaĵoj. Li estas tro leĝere vestita. Donu al li mian leportulupon¹¹."

"Sed, patreto¹² Pjotr Andrejiĉ!" diris Saveliĉ. "Kion li faru per via leportulupo? La hundo certe fordrinkos ĝin en la unue renkontata drinkejo!"

"Ne estas via afero, maljunuleto," diris la vagabundo, "se mi fordrinkos ĝin aŭ ne. Lia Ekscelenco donacas al mi peltaĵon de sia propra dorso. Li estas la sinjoro, li volas tion, kaj vi, kiel servisto ne rajtas kontraŭdiri lin, sed devas obei lin."

"Vi, sendia rabisto!" kolere respondis Saveliĉ. "Vi vidas, ke li estas ankoraŭ neplenaĝa infano, kaj vi ĝojas pro tio, ke vi povas priŝteli lin pro lia naiveco. Kion vi farus per tiu sinjora peltaĵo? Li estas multe tro mallarĝa por viaj malbenitaj ŝultroj."

"Finu tiun pedantecon," mi diris al mia servisto, "kaj tuj dontu tiun peltaĵon al mi."

"Sinjoro Dio," balbutis Saveliĉ, "kaj la leportulupo estas ankoraŭ preskaŭ nova! Kaj tiam donaci ĝin al tiu senhava drinkemulo!"

Sed li serĉis la leportulupon. La kampulo tuj surmetis ĝin. La peltaĵo, el kiu ankaŭ mi jam estis elkreskinta, estis tro malgranda por li. Sed li sukcesis surmeti ĝin iamaniere, kvankam la kunkudroj krakis tie kaj tie ĉi. Saveliĉ preskaŭ ekploris, kiam li aŭdis, kiel la fadenoj rompiĝis. La vagabondo estis ege kontenta pri mia donaco. Li kondukis min ĝis la glitveturilo kaj diris kun profunda kliniĝo:

"Dankon, Via Ekscelenco, pro via nobela gesto. Neniam mi forgesos vian afablecon!"

Li daŭrigis sian vojiron sen atenti pri la kolero de Saveliĉ, kaj mi baldaŭ forgesis la ŝtormon de la antaŭa tago, la vagabundon kaj la leportulupon.

Kiam mi alvenis en Orenburgo, mi tuj anoncis min ĉe la generalo. Mi vidis altstaturan viron, kiu jam estis kliniĝinta pro la aĝo. Liaj longaj haroj estis tute blankaj. Per la malnova senkoloriĝinta uniformo oni rekonis la militiston el la tempo de imperiestrino Anna Ivanovna¹³, kaj en liaj vortoj oni bone aŭdis

¹⁰ En la antaŭa Rusio la kampuloj dormis sur la forno, kiu estis hejtata de ekstere..

¹¹ Tulupo: speco da rusa peltaĵo

¹² La rusaj geservistoj alparolis sian mastron per per 'patro', kaj la junan mastron per 'patreto'.

¹³ Imperiestrino de Rusio de 1730 ĝis 1740, nevino de Petro la I-a la Granda

germanan akĉenton. Mi donis al li la leteron de mia patro. Kiam li aŭdis la nomon de mia patro, li rapide rigardis min :

"*Mein Gott*, Dio mia," li diris. "ŝajnas, ke nur antaŭ mallonga tempo Andrej Petroviĉ havis vian aĝon, kaj nun li jam havas tiel grandan filon ! Ho, *wie die Zeii vergeht*, kiel rapide pasas la tempo !"

Li rompis la sigelon de la letero kaj komencis mallaŭte legi ĝin, dum li faris siajn rimarkojn : *Kara Ivan Karloviĉ, mi esperas, ke Via Ekscelenco...* Kial tiuj komplimentoj ? Li devus honti pri tio ! Kompreneble, disciplino antaŭ ĉio, sed ĉu oni tiel skribas al maljuna kamarado ?... *Via Ekscelenco ne forgesis...* hm... *kaj kiam la karmemora feldmarŝalo Mŭnich ... la militiron... kaj Karolineta...* Nu, nu, frato ! Li do ankoraŭ ne forgesis niajn bubajojn ! *Nu, la afero, pri kiu temas... mi sendas al vi mian bubon...* hm... *traktu lin per erinacaj gantoj ...* Kion tio signifas ? Tio devas esti rusa proverbo ... Kion signifas *per erinacaj gantoj ?*" li ripetis, alparolante min.

"Tio signifas," mi respondis, rigardante tiel senkulpe, kiel mi povis, "trakti iun afable, ne tro severe, doni al li iom da libereco, koncize dirite trakti per erinacaj gantoj."

"Hm, ĝuste, ĝuste...*kaj ne doni al li tro da libereco.* Ne, tiuj *erinacaj gantoj* certe signifas ion alian... *Kun tiu ĉi letero vi trovas lian pasporton ...*sed kie ĝi estas ? Ho jes, ĉi tie... *...elskribi el al regimento Semjonov...*Bone, bone, mi aranĝos ĉi tion. *Permesu min, ĉirkaŭbraki vin kiel maljuna kamarado kaj amiko sen titoloj kaj komplimentoj...* ha, finfine li divenis tion... kaj tiel plu...kaj tiel plu – Nu, patreto", li diris, leginte la leteron kaj flankenmetinte mian pasporton, "ĉio estos aranĝita : vi estis translokita kiel oficiro al la regimento... , kaj por ne perdi tempon, vi vojaĝos jam morgaŭ al la fortikaĵo de Bjelogorsk, kie vi estos sub la komando de kapitano Mironov, bona kaj honestas viro. Tie vi estos en vera servo kaj lernos la militistan disciplinon. En Orenburgo mem vi povus fari nenion, kaj neniofarado estas malbona por junulo. Hodiaŭ mi petas vin konsumi ĉe mi la vespermanĝon."

"Tio estas bele !" mi pensis. " Al kio servis por mi nun, ke mi jam estis preskaŭ serĝento en la ventro de mia patrino ? Kien tio kondukas min nun? Al regimento en unu el la plej forgesitaj fortikaĵoj ĉe la rando de la kirgizaj-kozakaj stepoj !"

Mi vespermanĝis ĉe Andrej Karloviĉ kune kun lia maljuna adjutanto. Severa germana ŝparemo estis la dominanta trajto de lia vespermanĝo, kaj mi kredas, ke la timo, devi ricevi iam kaj iam novan gaston ĉe sia fraŭla tablo, estis la kialo de mia hasta vojaĝo al mia garnizono. La sekvantan tagon mi adiaŭis la generalon kaj foriris al la loko de mia destino..

III. LA FORTIKAĴO

Ni en fortikaĵo vivas
De akvo kaj de nigra pano,
Sed kiam venas malamikoj
Al nia festo sen invito
Per kugloj ilin ni regalas.
(*Soldata kanto*)

La fortikaĵo de Bjelogorsk troviĝis je distanco de ĉirkaŭ kvardek verstoj¹⁴ de Orenburgo. La vojo kondukis nun laŭlonge de la kruta bordo de la lago Jajik. La rivero ankoraŭ ne estis kovrita per glacio, kaj ĝiaj plumbo-koloraj ondoj moviĝis nigre kaj sombre inter la monotonaj, neĝokovritaj bordoj. Malantaŭ ili etendiĝis la kirgizaj stepoj. Mi sinkis en pensojn, kiuj plejgrandparte estis malgajaj.

La garnizona vivo havis malmulton allogan por mi. Mi provis fari al mi bildon de kapitano Mironov, mia estonta ĉefo, kaj mi imagis lin kiel severan, maljunan kaj kolerikan viron, kiu konis nenion ol sian servon kaj kiu pretis aresti min pro sensignifa okazaĵeto kaj enprizonigi min kun pano kaj akvo. Intertempe la vesperkrepusko jam komenciĝis subeniri. Ni veturis sufiĉe rapide.

"Ĉu estas ankoraŭ for ĝis la fortikaĵo ?" mi demandis al mia veturigisto.

"Ne tre for," li respondis, "tie for oni jam vidas ĝin."

Mi rigardis en ĉiujn direktojn, esperante malkovri minacajn bastionojn, turojn, muregojn, sed mi vidis nenion alian ol vilaĝon, ĉirkaŭitan per ĉirkaŭbarilo de lignaj bretoj. En unu flanko staris tri aŭ kvar fojnostakoj, kiuj estis duone forsinkintaj en la neĝon ; ĉe la alia flanko mi vidis oblikviĝintan ventmuelejon kun tilibastaj aloj, kiuj malvigle pendis malsupren.

"Kie do estas tiu fortikaĵo ?" mi demandis, mirigita.

"Nu, tie !" respondis la veturigisto, montrante la vilaĝon, kaj post tiuj vortoj, ni enveturis ĝin. Ĉe la enirpordego mi vidis antikvan feran

¹⁴ 1 versto = 1,06 km

kanonon. La stratoj estis mallarĝaj kaj torditaj, la dometoj estis malaltaj kaj plej ofte kovritaj per pajlo. Mi diris al la veturigisto veturi al la komandanto, kaj mallonge post tio, la glitveturilo haltis antaŭ ligna dometo, kiu estis konstruita sur altaĵo apud ligna preĝejo.

Neniu venis renkonte al mi. Mi eniris la koridoron kaj malfermis la pordon de la antaŭĉambro. Maljuna invalido, kiu sidis sur tablo, kudris bluan pecon da ŝtofo sur la maniko de verda uniformo. Mi demandis lin anonci min.

"Nur eniru, patreto," respondis la invalido, "niaj homoj estas hejme."

Mi eniris puran, sed malmoderne meblitan ĉambreton. En angulo staris ŝranko kun manĝilaro, kontraŭ la muro pendis oficirdiplomo en kadro kaj malantaŭ vitro, ĉirkaŭ ĝi pendis lignoskulptaĵojn, kiuj figuris la ekokupon de Kistrin kaj Oĉakov flanke de la *elekto de novedzino* kaj la *enterigo de virkato*. Apud la fenestro sidis maljuna virino vestita en varma jako kaj kun tuko ĉirkaŭ la kapo. Ŝi malvolvis fadenon, kiun unuokula maljuna viro en oficiruniformo tenis per siaj disetenditaj manoj.

"Kion vi deziras, patreto?" ŝi demandi sen interrompi sian laboron.

Mi respondis, ke mi venis anonci min por la militista servo kaj ke mi venis prezenti min al la sinjoro kapitano, turnante min al la unuokula maljunulo, kiun mi prenis por la komandanto. Sed la dommastrino interrompis la paroladon kiun mi parkerigis.

"Ivan Kuzmiĉ ne estas hejme," ŝi diris. "Li iris viziti la popon, patron Gerasim, sed tio ne gravas, patreto, mi estas lia edzino. Estu bonvena! Sidiĝu, patreto."

Ŝi vokis knabinon kaj ordonis al ŝi serĉi la suboficiron. La maljunulo scivoleme rigardis min per sia unika okulo.

"Ĉu mi rajtus demandi," li diris, "en kiu regimento vi servis antaŭe?"

Mi kontentigis sian scivolemon.

"Kaj ĉu mi rajtus demandi," li daŭrigis, "kial vi transiris de la gvardio al la garnizono?"

Mi respondis, ke tio estas la volo de mia superuloj.

"Verŝajne pro agoj kiuj ne decas al oficiro de la gvardio?" daŭrigis la demandanto nelacigeble.

"Nur ĉesu nun tiun demandadon," diris la kapitanedzino. "Vi ja vidas, ke la junulo estas laca pro la longa vojaĝo kaj ne havas tempon por vi... Tenu do viajn brakojn rektaj... Kaj vi, patreto," ŝi daŭrigis, denove turnante sin al mi, "ne malĝoju, ĉar oni sendis vin al nia truo. Vi

ne estas la unua, kaj certe ankaŭ ne estos la lasta. Per pacienco ĉio aranĝiĝas. Aleksej Ivaniĉ Ŝvabrin estis translokita ĉi tien antaŭ kvin jaroj pro murdo kaj mortigo. La ĉielo scias, kiel tiu penso venis al li. Vi vidas, li forlasis la urbon kune kun leŭtenanto. Ili kunprenis siajn sabrojn kaj tie ili komencis piki unu la alian. Aleksej Ivaniĉ mortigis la leŭtenanton en la ĉeesto de du atestantoj. Kion oni povas diri pri tio? Peko estas potenca sinjoro."

En tiu momento eniris la suboficiro, juna kaj forta kozako.

"Maksimiĉ," diris la kapitanedzino, "konduku la sinjoron oficiron al lia loĝejo, sed serĉu decan loĝejon."

"Tre bone, Vasilisa Jegorovna," respondis la suboficiro, "ĉu ni ne loĝigus Lian Ekscelencon ĉe Ivan Polezjajev?"

"Sensencaĵo, Maksimiĉ," diris la kapitanedzino, "ĉe Polezjajev jam estas tiel malgranda, kaj li estas bona konatulo mia kaj neniam forgesas, ke ni estas liaj superuloj. Konduku la sinjoron oficiron... Kio estas via antaŭnomo kaj patronimo, patreto?"

"Pjotr Andrejiĉ."

"Konduku Pjotr Andrejiĉ ĉe Semjon Kuzov.. Tiu fripono lasis sian ĉevalon kuregi tra mia legumĝardeno. Nu, Maksimiĉ, ĉu ĉio estas en ordo?"

"Ĉio estas trankvilo, dankon al Dio," respondis la kozako, "nur korporalo Proĥorov luktis kun Ustinja Njegulina en la vaporbanejo pro kruĉo da varma akvo."

"Ivan Ignatiĉ!" diris la kapitanedzino al la unuokula maljunulo, "ekzamenu, kiu el ili pravas: Proĥorov aŭ Ustinja, kaj tiam punu ilin ambaŭ. Nu, iru kun Dio, Pjotr Andrejiĉ. Maksimiĉ kondukos vin al via loĝejo."

Mi adiaŭis ŝin, kaj la suboficiro kondukis min al dometo, kiu staris sur la alta bordo de la rivero, tute ĉe la fino de la fortikaĵo. La duonon de la dometo estis okupita de la familio de Semjon Zukov. La alia parto estis rezervita por mi. Estis sufiĉe propra ĉambro, dividita en du per apartiga vando. Saveliĉ tuj komencis instali sin, dum mi rigardis tra la malgranda fenestro. Antaŭ mi etendiĝis la trista stepo. Kelkaj dometoj staris oblikve ĉe la kontraŭa flanko. Sur la vojo promenis kelkaj kokinoj. Starante sur perono apud trogo, maljunulino vokis siajn porkojn, kiuj respondis al ŝi amike gruntante. Jen en kiu ĉirkaŭaĵo mi estis kondamnita pasigi mian junecon! Mi malĝojiĝis, malproksimiĝis de la fenestro kaj kuŝiĝis sen

vespermanĝo malgraŭ la admonoj de Saveliĉ, kiu ripetis per plenda voĉo :

"Sinjoro Dio ! Li volas nenion manĝ !. Kion diros la patrino, se ŝia infano malsaniĝos ?"

La sekvantan matenon mi apenaŭ komencis vesti min, kiam la pordo malfermiĝis kaj eniris malgranda, tre malbela juna oficiro kun sun-brunigita vizaĝo, sed ekstraordinare vigla.

"Ekskuzu min," li diris france, "pro tio, ke mi eniras ĉe vin senceremonie por konatiĝi kun vi. Hieraŭ mi eksciis vian alvenon, kaj tia deziro vidi veran homan vizaĝon superfortis min, ke mi ne povis retenigi min. Vi komprenos tio, kiam vi estos loĝinta kelkan tempon ĉi tie."

Mi divenis, ke li estas la oficiro, kiu estis forsendita de la gvardio ĉi tien pro tiu duelo. Ni tuj interkonatiĝis. Ŝvabrin tute ne estis mal-inteligenta. Lia parolo estis flua kaj sprita. Li tre gaje priskribis al mi la familion de la komandanto, lian ĉirkaŭaĵon kaj la regionon, kien kondukis min la sorto. Mi bonkore ridis, kiam eniris la sama invalido, kiu riparigis sian uniformon en la antaŭĉambro de la komandanto. Li invitis min nome de Vasilisa Jegorovna veni vespermanĝi ĉe ŝi. Ŝvabrin ofertis akompani min.

Alveninte ĉe la domo de la komandanto, ni rimarkis sur la malgranda placo dudekon da maljunaj invalidoj kun longaj perukoj kaj trikornoj sur la kapoj. Ili staris en unu vico. Antaŭ ili staris la komandanto, vigla kaj granda maljunulo surhavanta ĉapon kaj silkan hejmveston. Vidante nin, li venis al ni, diris al mi kelkajn afablajn vortojn kaj rekomencis ordoni. Ni volis halti kaj spekti la ekzercon, sed li permesis nin iri al Vasilisa Jegorovna, prometante tuj sekvi nin.

"Ĉi tie," li aldiris, "vi povas vidi nenion."

Vasilisa Jegorovna akceptis nin simple kaj tre kore traktis min, kvazaŭ ni konis nin jam delonge. La invalido kaj Palaŝka estis kovrantaj la tablon.

"Kial do mia Ivan Kuzmic tiel longe daŭrigas la ekzercadon?" demandis la edzino de la komandanto.

"Palaŝka, iru voki la sinjoron komandanton al la vespermanĝo. Sed kie estas Maŝa?"

Tiam eniris knabino de ĉirkaŭ dek ok jaroj kun ronda vizaĝo, ruĝaj vangoj kaj helblondaj haroj, kiuj estis kombitaj malantaŭ la ruĝaj oreloj. Ĉe mia unua rigardo ŝi nemulte plaĉis al mi. Mi rigardis ŝin kun antaŭjuĝo. Ŝvabrin estis priskribinta ŝin al mi kiel perfektan malbelulinon. Maria Ivanovna sidiĝis en angulo kaj komencis kudri. Intertempe oni alportis

brasiksupon. Vasilisa Jegorovna, ne vidante sian edzon, duafoje sendis Palaŝka voki lin.

"Diru al la sinjoro, ke la invititoj atendas kaj ke la brasiksupo malvarmiĝas. Danke al Dio, la ekzercado estas utila. Sed li havos ankoraŭ tiom da tempo amuzi sin."

La kapitano baldaŭ aperis akompanata de la unuokula maljunulo.

"Nu, mia etulo," diris al li lia edzino, "la manĝo jam delonge estas servita, kaj oni ne sukcesas tuj venigi vin."

"Sed, komprenu do, Vasilisa Jegorovna," respondis Ivan Kuzmiĉ, "mi estis okupita per la servo, mi instruis miajn soldatojn."

"Vi ne parolas serioze," replikis la edzino de la kapitano. "Ne kredigu al mi, ke vi instruas la soldatojn. Ili lernas nenion, kaj vi mem ne scias instrui. Estus pli bone resti hejme kaj preĝi al Dio. Karaj invititoj, bonvolu sidiĝi ĉe la tablon."

Ni sidiĝis ĉe la tablon. Vasilisa Jegorovna ne silentis eĉ minuton kaj superŝutis min per demandojn: kiuj estas miaj gepatroj, ĉu ili ankoraŭ vivas, kaj se jes, kion ili faras. Eksciante, ke mia patro posedas tricent animojn¹⁵, ŝi eksklamis:

"Ho, tio ne estas nenio! Estas multaj riĉaj homoj en la mondo. Sed ni havas entute nur unu servutulinon, nian Palaŝka. Jes, danke al Dio, ni vivas per malmulte. Estas nur unu afero, kiu maltrankviligas nin: nia filino Maŝa havas la aĝon por edziniĝi. Sed kian doton ŝi havas? Kombilon, broson kaj tri kopekojn. Dio pardonu min: tio ĝuste sufiĉas por iri al banejo. Ĉio iros bone, se ŝi trovos bonan edzon. Se ne, ŝi devos resti knabino, eterna fianĉino."

Mi ĵetis rigardon sur Maria Ivanovna: ŝi ruĝiĝis, kaj eĉ larmoj gutetis sur sian teleron. Mi kompatis ŝin, kaj mi rapidis ŝanĝi la temon de la konversacio.

"Mi aŭdis," mi diris malkoncerne la temon, "ke la baŝkiroj pretigas sin por ataki vian fortikaĵon."

"De kiu vi aŭdis tion, kara amiko?" demandis Ivan Kuzmiĉ.

"Mi aŭdis tion en Orenburgo," mi respondis.

"Mensogoj," diris la komandanto. "Ĉe ni ĉio estas jam delonge trankvila. La baŝkiroj ricevis bonan lecionon. Cetere ankaŭ la kirgizoj. Ne timu, ili ne riskos tion, kaj se ili venos, mi

¹⁵ La rusaj sinjoroj eŭfemisme nomis siajn servutulojn 'animoj'.

donos al ili tian bategon, ke ili tenos sin tran-
kvilaj dum dek jaroj."

"Kaj ĉu tio faras nenion al vi, resti en for-
tikaĵo elmetita al tiaj danĝeroj?" mi daŭrigis,
turnante min al lia edzino.

"Oni kutimiĝas al tio," ŝi respondis. "Antaŭ
dudeko da jaroj, kiam oni sendis nin ĉi tien, ho,
kiel mi timis tiam tiujn malbenitajn paganojn,
sed Dio protektas nin! Tuj kiam mi vidis
alveni linkan ĉapon, tuj kiam mi aŭdis ilian
hurladon – oni ne kredus tion, ĉu ne? – mia
koro minacis halti. Kaj nun, mi tiom kutimiĝis
al tio, ke mi ne forlasus mian lokon, se oni
venus diri al mi, ke tiuj sovaĝuloj saltadas
ĉirkaŭ la fortikaĵo."

"Vasilisa Jegorovna estas tre kuraĝa virino,"
serioze rimarkis Ŝvabrin. "Ivan Kuzmiĉ povas
atesti pri tio."

"Jes, kiel vi vidas," diris Ivan Kuzmiĉ, "ŝi
estas brava virino."

"Kaj Maria Ivanovna?" mi demandis. "Ĉu ŝi
estas tiel brava kiel vi?"

"Ĉu nia Maŝa estas brava?" respondis ŝia
patrino. "Ne, Maŝa estas timulino. Ĝis nun ŝi
ne povas aŭdi fusilpafon sen tremi per ĉiuj
membroj. Kiam antaŭ du jaroj Ivan Kuzmiĉ
ekhavis la ideon pafi per la kanono okaze de
mia nomfesto, la etulino apenaŭ ne mortis pro
timo. Ekde tiam ni decidis ne plu pafi per la
kanono... tiu malbenita kanono!"

Ni leviĝis de la tablo. La kapitano kaj lia
edzino foriris dormi, kaj mi iris ĉe Ŝvabrin,
kun kiu mi pasigis la reston de la vespero.

IV. LA DUELO

Permesu, ke mi metu min en pozicion.
Vi vidis, kiel mi traboras vian bruston.
(*Ĥnĵajnin*)

Kelkaj semajnoj pasis, kaj mia vivo en la
fortikaĵo de Bjelogorsk fariĝis ne nur eltenebla,
sed eĉ agrabla. Mi estis ricevita ĉe la koman-
danto kiel filo. Li kaj lia edzino estis vere
respektindaj personoj. Ivan Kuzmiĉ, kiu fariĝis
oficiro ekde ordinara soldato, estis simpla kaj
malmulte instruita viro, sed li estis tre honesta
kaj bonkora. Lia edzino gvidis lin, kio bone
konvenis al lia senzorgema karaktero. Vasilisa
Jegorovna okupiĝis eĉ pri la aferoj de la
militista servo, tute kiel pri tiuj de sia familio,
kaj gvidis la fortikaĵon tute tiel bone kiel sian
malgrandan domon. Maria Ivanovna tre baldaŭ
ĉesis esti sovaĝa kontraŭ mi. Ni interkonatiĝis.
Mi trovis en ŝi prudentan kaj senteman kna-

binon. Sen rimarki tion mi korligis min al tiu
familio de bravaj homoj, eĉ al Ivan Ignatiĉ, la
unuokula garnizonleŭtenanto.

Mi estis nomumita oficiro. Mia servo ne estis
superŝarĝita. Estis nek revuoj, nek ekzercoj,
nek gardistoj en tiu paca loko. Por sia persona
plezuro, la komandanto instruis la soldatojn de
tempo al tempo, sed li estis nur obteninta ĝis
nun, ke ĉiuj soldatoj povis distingi sian deks-
tran flankon de la maldekstra, malgraŭ tio ke
multaj inter ili ankoraŭ krucosignis sin antaŭ
ĉiu duonturniĝo por ne erari.

Ŝvabrin posedis kelkajn francajn librojn. Mi
komencis legi, kaj en mi vekigis literaran
guston. Matene mi legis, ekzercis min en la
tradukado de kelkaj versoj, kaj eĉ mem skribis
iam kaj iam kelkajn versojn. Preskaŭ ĉiutage
mi vespermanĝis ĉe la komandanto, kie mi
kutime pasigis la reston de la tago. Iam kaj iam
venis tien vespere patro Gerasimo kun sia
edzino Akulina Pamfilovna, la plej bone infor-
mita gazeto de la ĉirkaŭaĵo. Kompreneble mi
vidis Aleksej Ivanoviĉ Ŝvabrin ĉiutage, sed
iom post iom lia konversacio fariĝis al mi ĉiam
malpli agrabla. Liaj daŭraj serĉoj pri la familio
de la komandanto ne multe plaĉis al mi, kaj
precipe liaj kaŭstikaj rimarkoj pri Maria Iva-
novna. Ne estis alia kompanio trovebla en la
fortikaĵo, kaj mi ne deziris alian.

Malgraŭ la antaŭdiroj de la generalo la baŝ-
kiroj ne ribelis. Trankvileco regis ĉirkaŭ nia
fortikaĵo. Sed tiu paco estis rompita per
neatendata malkonkordo.

Mi jam diris, ke mi okupiĝas pri literaturo.
Miaj provoj estis sufiĉe bonaj por la epoko, kaj
kelkajn jarojn poste Aleksandro Petroviĉ
Sumarokov¹⁶ laŭdis ilin. Iam mi havis la bon-
ŝancon verki kanteton, kiu plaĉis al mi. Oni
scias, ke verkistoj, kun la preteksto peti kon-
silojn, ofte serĉas bonvolan aŭskultanton. Tial
mi kopiis mian kanteton, portis ĝin al Ŝvabrin,
kiu, sola en fortikaĵo, povis apreci mian ver-
kojn de poeto. Post mallonga enkonduko, mi
tiris el mia poŝo mian kajeron kaj legis al li la
sekvajn versojn:

*Luktante kontraŭ miaj amaj pensoj,
Klopodas mi forgesi belulinon.
Sed ve! Fuĝante antaŭ l' bela Maŝa,
Mi vane neas mian korinklinon.*

*Sed la okuloj kiuj min ekkaptis,
Senĉese nebuligas mian menson.*

¹⁶ Rusa poeto de la XVIII-a jarcento

*Demonon ili vekis en la koro,
Malebliganta ĉiun klaran penson..*

*Vin, kiu konas mian malesperon
Kaj vidas min en malfeliĉa stato,
Mi urĝe petas min kompati, kiu
Nun estas via sklavo kaj regato !*

"Kia vi trovas tiun poemon?" mi demandis al Ŝvabrin, atendente laŭdon, kvazaŭ al mi ŝuldatan donacon. Sed je mia granda elreviĝo Ŝvabrin, kiu kutime estis indulgema, deklaris ke mia poemo estas malbona.

"Kial do?" mi demandis, provante kaŝi mian bedaŭron.

"Ĉar," li respondis, "tiaj versoj estas dignaj de mia profesoro Vasilij Kiriloviĉ Tredjakovskij¹⁷ kaj ĉar ili tro memorigas al mi liajn belajn ampoemojn."

Tiam li prenis la kajeron el miaj manoj kaj komencis senkomptae ekzameni ĉiun verson kaj ĉiun vorton, primokante min en la plej mordanta maniero. Mi ne eltenis tion, tiris mian kajeron el liaj manoj kaj diris, ke mi neniam plu montros al li miajn poemojn. Ŝvabrin ekridis pri tiu minaco.

"Oni vidos," li diris, "ĉu vi plenumas vian promeson. La farantoj de versoj bezonas, ke oni aŭskultu ilin, tute kiel Ivan Kuzmiĉ bezonas malgrandan glason da vodko antaŭ ĉiu manĝo. Sed kiu estas tiu Maŝa, al kiu vi faras tiun ĉi deklaron de tenera pasio kaj amplenaj turmentioj? Ĉu ŝi ne estas Maria Ivanovna?"

"Tio ne estas via afero," mi respondis, kun-tirante la brovojn "Maŝa povas esti iu ajn. Mi ne demandas vian opinion nek viajn supozojn."

"Ho! Ho! La sinamo de versfaranto kaj la modesteco de enamiĝinto," daŭrigis Ŝvabrin, kiu ĉiam pli ekscitis min. "Sed aŭskultu konsilon de amiko: ĉar vi deziras havi sukceson, kreu min, vi devas agi alimaniere ol per kantoj..."

"Kion tio signifas, sinjoro? Ekspliku tion al mi."

"Kun plezuro. Tio signifas, ke anstataŭ fari tenerajn versojn vi devus doni al ŝi paron de orelingojn."

Mia sango faris nur unu rondon.

"Kaj kial vi havas tian opinion pri ŝi?" mi demandis, apenaŭ retenante mian koleron.

"Ĉar mi bone konas per mia sperto ŝian karakteron kaj ŝiajn kutimojn," li diris kun infereca rideto.

"Vi mensogas, maltaŭgulo!" mi kolere ek-kriis. "Vi mensogas en la plej hontiga maniero!"

La vizaĝo kaj la voĉo de Ŝvabrin ŝanĝiĝis.

"Tion mi ne toleras," li diris, kaptante mian brakon. "Vi donos al mi satisfakcion."

"Je via servo, kiam ajn vi volas," mi respondis al li, tre feliĉa.

En tiu momento mi pretis disŝiri lian kapon.

Tuj mi iris al Ivan Ignatiĉ kaj trovis lin kun kudrilo en la mano. Laŭ peto de la komandantedzino, li surdratigis ĉampinjonojn por sekigi ilin por la vintro.

"Ha, Pjotr Andrejiĉ," li diris, rimarkante min, "estu bonvena. Kiu bona vento alblovas vin ĉi tien? Pro kiu afero, se mi rajtas demandi tion?"

Mi eksplikis al li per kelkaj vortoj, ke mi disputis kun Aleksej Ivanoviĉ, kaj ke mi petis lin esti mia sekundanto. Ivan Ignatiĉ atente rigardis min grande malfermante sian unikan okulon.

"Ĉu vi volas diri, ke vi volas sangigi Aleksej Ivanoviĉ," li diris, "kaj ke vi deziras, ke mi ĉeestu tion kiel atestanto? Ĉu tio ne estas tiel? Mi permesas al mi, demandi tion."

"Efektive."

"Sed, Pjotr Andrejiĉ, kion vi faris? Vi disputis kun Aleksej Ivanoviĉ. Kiel bela afero! Tion oni ne vidas sur via vizaĝo. Li ofendas vin kaj vi insultas lin. Li donas al li pugnobaton, kaj vi frapas lin sur la nazon. Unufoje, dufoje, trifoje, tiam vi disiros. Kaj ni, ni repacigos vin. Sed ĉu estas bone, sangigi sian proksimumon? Permesu min demandi tion al vi. Tio ne estus tiel granda malbono, se vi sangigus lin. Des pli malbone por li! Mi ne tiom amas lin. Sed se li trapikus vin? Kia tiam estus la afero? Kiu tiam mortus, se mi rajtas demandi tion al vi?"

La argumentoj de la prudenta leŭtenanto ne ŝancelis min. Mi persistis en mia intenco.

"Kiel tio plaĉos al vi," diris Ivan Ignatiĉ. "Faru, kio plaĉos al vi. Sed kial mi devus atesti tion? La viroj ne malofte interbatiĝas, sed kial, mi permesas al mi demandi tion al vi. Danke al Dio, mi faris militiron kontraŭ la svedoj kaj la turkoj. Al mi tio sufiĉas."

Mi komencis ekspliki al li la rolon de sekundanto, sed Ivan Ignatiĉ neniel povis kompreni tion.

"Kiel plaĉas al vi," li diris. "Sed ĉar mi devus enmiksiĝi en tiun aferon, ĉu mi ankaŭ ne devus iri trovi Ivan Kuzmiĉ, raporti al li pro kialoj de la servo, ke en la fortikaĵo oni komplotas mur-

¹⁷ Rusa poeto de la XVIII-a jarcento

don, kontraŭan al la intereso de la patrio ? Eble plaĉos al la komandanto fari la necesajn aranĝojn..."

Mi ektimis kaj petis Ivan Ignatiĉ nenion diri al la komandanto. Kun granda peno mi sukcesis persvadi Ivan Ignatiĉ gardi la sekreton. Li promesis nenion diri, kaj mi decidis retiriĝi.

Kiel kutime mi pasigis la vesperon, ĉe la komandanto. Mi klopodis ŝajni gaja kaj trankvila por ne vekti suspektojn kaj eviti enuigajn demandojn. Sed mi devas konfesi, ke mi ne havis la malvarmsangecon, pri kiu ĉiam fanfaronas tiuj kiuj troviĝas en mia situacio Tiun vesperon mi provis esti afabla kaj tenera. Maria Ivanovna plaĉis al mi pli ol kutime. La penso, ke mi eble vidis ŝin lastfoje, donis al ŝi en miaj okuloj ion emocian. Ankaŭ Ŝvabrin venis. Mi trenis lin flanken kaj rakontis al li mian konversacion kun Ivan Ignatiĉ.

"Kial do ni bezonas sekundantojn?" li seke demandis. "Ni ne bezonas ilin."

Ni do interkonsentis interbatiĝi malantaŭ la fojnostakoj, kiuj staris flanke de la fortikaĵo kaj renkontiĝi tie la morgaŭon je la sepa matene. Ni ŝajne interparolis tiel amikece, ke Ivan Ignatiĉ perfidis nin per sia gaja babilado.

"Jam delonge tio devus esti okazinta," li diris al mi kun kontenta mieno. "Malbona paco pli valoras ol bona malpaco, kaj se oni estas honesta, oni restas sana."

"Pri kio vi parolas, Ivan Ignatiĉ ?" demandis la komandanto, kiu, en sia angulo, ludis per kartoĵoj. "Mi ne bone komprenis tion."

Rimarkante ĉe mi signojn de malkontenteco kaj memorante sian promeson, Ivan Ignatiĉ konfuziĝis kaj ne sciis, kion respondi. Ŝvabrin helpis lin.

"Ivan Ignatiĉ aprobas nian repaciĝon."

"Sed kun kiu do, patreto, vi disputis?" demandis la komandantedzino.

"Mi preskaŭ serioze disputis kun Pjotr Andrejiĉ."

"Sed pro kio?"

"Pro vera bagatelo, Vasilisa Jegorovna: pro kanto."

"Ĉu vi vere disputis pro kanto? Sed kiel tio do okazis?"

"Nu, jen, patrineto: antaŭnelonge Pjotr Andrejiĉ verkis kanton, kaj hodiaŭ li kantis ĝin por mi, kaj mi ekkantis mian favoratan kanton:

Filino de la kapitano,

Ne iru do promeni nokte...

Kaj rezultis disputo. Pjotr Andrejiĉ preskaŭ koleriĝis, sed tiam li pensis momenton kaj

decidis, ke ĉiu havas la rajton kanti, kion li trovas bela. Tiel la afero finiĝis."

La insolenteco de Ŝvabrin preskaŭ eksplozigis min pro kolero, sed neniu ekster mi komprenis liajn maldelikatajn aludojn. Almenaŭ neniu atentis pri ili. De kantoj la konversacio transiris al versfarantoj, kaj la komandanto rimarkis, ke ili ĉiuj estas nekorekteblaj diboĉuloj kaj drinkemuloj, kaj li amikece konsilis ne plu okupiĝi pri versfarado, kiu laŭ li kontraŭis la servon kaj el kiu estiĝas nenio bona."

La ĉeesto de Ŝvabrin estis neeltenebla por mi. Mi baldaŭ adiaŭis la komandanton kaj lian familion, reiris al mia ĉambro, ekzamenis mian sabron, kontrolis ĝian akrecon kaj enlitiĝis, ordonante al Saveliĉ vekti min je la sepa.

La morgaŭon, je la interkonsentita horo, mi troviĝis malantaŭ la fojnostakojn, atendante mian kontraŭulon, kiu baldaŭ alvenis.

"Oni povus surprizi nin," li diris, "ni devas rapidi."

Ni demetis niajn dolmanojn por resti en ĉemizmanikoj kaj ni elingigis niajn sabrojn. En tiu momento subite aperis de malantaŭ la finostakoj Ivan Ignatiĉ kaj kvin invalidoj. Li diris al ni iri kun li al la komandanto. Ni obeis kontraŭvole, la soldatoj ĉirkaŭis nin, kaj ni sekvis Ivan Ignatiĉ, kiu solene kondukis nin, marŝante kun miriga digneco.

Ni eniris la domon de la komandanto. Ivan Ignatiĉ malfermis la pordon kaj triumfe anoncis: "Jen ili estas !"

Vasilisa Jegorovna venis akcepti nin.

"Ha, miaj karaj infanoj !" ŝi ekkriis. "Kion tio signifas? Kiel? Pro kio? Ĉu entrepreni murdon en nia fortikaĵo? Ivan Kuzmiĉ ! Tuj arestu ilin. Pjotr Andrejiĉ ! Aleksej Ivaniĉ ! Donu viajn sabrojn, donu ilin ! Palaŝka, portu tiujn sabrojn al la provizejo. Pjotr Andrejiĉ, mi ne atendis tion de vi. Ĉu vi ne hontas ? De Aleksej Ivaniĉ mi povis atendi tion : li estis forsendita de la gvardio pro murdo. Li ne kredas je Dio, sed vi, vi ? Ĉu vi volas fari la samon?"

Ivan Kuzmiĉ tute konsentis kun sia edzino kaj diris:

"Hej! Hej! Vasilisa Jegorovna pravas. Dueloj estas formale malpermesitaj de la militista regularo."

Intertempe Palaŝka prenis niajn sabrojn kaj portis ilin al la provizejo. Mi ne povis ne ekridi. Ŝvabrin gardis sian dignecon.

"Malgraŭ la tuta respekto, kiun mi sentas por vi, Vasilisa Jegorovna," li diris malvarme, mi

devas rimarki, ke vi malprave maltrankviliĝis kaj subigis nin al via tribunalo."

"Jes, lasu tion al mi: Ivan Kuzmiĉ. Estas afero por kiu nur mi kompetentas," diris la komandanto.

"Aĥ, kara amiko," replikis la komandantedizno; "Ĉu edzo kaj edzino ne estas unu animo kaj unu karno? Ivan Kuzmiĉ, kion vi do fuŝparolas ĉi tie? Metu ili aparte en angulon kun akvo kan pano, por ke ilia stulteco pasu. Ke pastro Gerasim donu al ili pentofaron, por ke ili preĝu al Dio kaj pentu antaŭ la mondo."

Ivan Kuzmiĉ ne sciis, kion decidi. Maria Ivanovna estis ekstreme pala. Iom post iom la tempesto pasis. La komandantedzino trankviliĝis. Palaŝka realportis al ni niajn sabrojn. Ni eliris la domon de la komandanto, laŭŝajne repacigitaj. Ivan Ignatiĉ akompanis nin.

"Ĉu vi ne hontas," mi diris al li kolere, "pro tio ke vi denunciis nin al la komandanto, post kiam vi promesis silenti pri tio?"

"Tiel vere, ke Dio vivas, mi diris nenion pri tio al Ivan Kuzmiĉ," li respondis. "Vasilisa Jegorovna pridemandis min. Ŝi organizis ĉion sen ordono de la komandanto. Cetere, mi dankas Dion, pro tio, ke ĉio finiĝis tiel bone."

Post tiuj vortoj, li reiris hejmen, kaj Ŝvabrin kaj mi restis solaj.

"Ni ne povas lasi la aferon tia," mi diris al li.

"Kompreneble ne," respondis Ŝvabrin, "vian impertentecon vi pagos per via sango. Sed sen ia dubo oni tenos la okulojn sur ni. Ĝis revido!"

Kaj ni disiris, kvazaŭ nenio estus okazinta.

Reveninte ĉe la komandanton, mi sidiĝis laŭ mia kutimo flanke de Maria Ivanovna. Ivan Kuzmiĉ forestis. Vasilisa Jegorovna okupiĝis pri la mastrumado. Ni babilis mallaŭte. Maria Ivanovna tenere riproĉis al mi la maltrankvilecon, kiun kaŭzis al ŝi mia disputo kun Ŝvabrin

"Mi sentis min morti pro timo," ŝi diris, "kiam mi aŭdis, ke vi intencis interbatali per la sabro. Kial strangaj estas la viroj! Pro unu sola vorto, kiun ili forgesos post unu semajno, ili pretas mortigi unu la alian kaj forferi ne nur sian vivon, sed ankaŭ sian konsciencon kaj la feliĉecon de ĉiuj kiuj... Sed mi scias, ke vi ne estas la kaŭzo de la disputo. Certe kulpas pro tio Aleksej Ivaniĉ."

"Sed kial vi pensas tion, Maria Ivanovna?"

"Nu, li estas tia mokanto. Mi ne ŝatas Aleksej Ivaniĉ. Li malplaĉas al mi, sed estas strange: por nenio en la mondo, mi volus malplaĉi al li. Tio terure maltrankviligus min."

"Kaj kion vi kredas, Maria Ivanovna: ĉu vi plaĉas al li aŭ ne?"

Maria Ivanovna konfuziĝis kaj ruĝiĝis.

"Mi kredas, ke mi plaĉas al li."

"Kial vi kredas tion?"

"Ĉar li faris edziĝopeton al mi."

"Kiel? Li petis vin edziniĝi al li? Kiam do?"

"La pasintan jaron, du monatoj antaŭ via alveno."

"Kaj vi ne kunsentis?"

"Kiel vi povas vidi. Aleksej Ivaniĉ certe estas inteligenta viro de bona familio, kaj li estas riĉa. Sed kiam mi pensas, ke mi estis devonta kisi lin dum la ceremonio antaŭ ĉiuj. Ne, neniam, por nenio en la mondo."

La vortoj de Maria Ivanovna malfermis miajn okulojn kaj klarigis ĉion al mi. Mi komprenis, kial Ŝvabrin persekutas ŝin per sia obstina kalumniado. Verŝajne li estis rimarkinta nian reciprokan simpatian, kaj klopodis forigi nin unu de la alia. La vortoj kiuj servis kiel preteksto por nia disputo, ŝajnis nun al mi ankoraŭ pli malnoblaj, ĉar antaŭ maldelikata ironio mi vidis nun en ili antaŭpripensitan kalumniadon. La deziro puni tiun brutalan kalumnianton fariĝis en mi ankoraŭ pli forta, kaj mi pacience atendis favoran okazon.

Mi atendo ne daŭris longe. La morgaŭon, dum mi estis verkanta elegion kaj mi maĉis mian plumon, serĉante bonan rimon, Ŝvabrin frapis kontraŭ mian fenestreton. Mi demetis mian plumon, prenis mian sabron kaj eliris.

"Kial do prokrasti pli longe," Ŝvabrin diris al mi. "Oni ne atentis pri ni. Ni malsupreniru al la rivero. Tie neniu ĝenos nin."

Silentante ni iris tien. Post kiam ni sekvis krutan padon, ni haltis sur la bordo de la rivero kaj elingigis niajn sabrojn. Ŝvabrin estis pli lerta ol mi, sed mi estis pli forta kaj pli kuraĝa. Sinjoro Beaupré, kiu estis maljuna soldato, estis doninta al mi kelkajn lecionojn de skermado, de kiuj mi nun profitis. Ŝvabrin ne atendis trovi en mi danĝeran kontraŭulon. Longan tempon ni ne povis lezi nin unu la alian. Finfine, rimarkante, ke Ŝvabrin malfortiĝis, mi komencis ataki lin pli forte kaj preskaŭ puŝis lin en la riveron. Subite mi aŭdis iun krii mian nomon. Mi turnis min kaj rekonis Saveliĉ, kiu kuris al mi, malsuprenirante la padon. En tiu momento mi estis forte pikita en la bruston, kaj mi falis senkonscie.

V. AMO

Aĥ, mia kara, bela filineto,

Ne edziniĝu tiel tute juna !
Demandu vian patron kaj patrino,
Prudenta estu, mia filineto,
Kaj intertempe saĝon amasigu,
Kaj zorgu pri edziĝa doto via.

(Popola kanto)

Se vi ol min pli belan trovas,
Vi certe tute min forgesos;
Sed se vi trovos pli malbelan,
Vi kun bedaŭro min memoros.

(Popolkanto)

Kiam mi vekiĝis el mia senkonscienco, mi ne tuĝis povis memori kaj kompreni, kio okazis. Mi kuŝis sur lito en nekonata ĉambro kaj mi sentis grandan malfortecon. Antaŭ mi staris Saveliĉ kun kandelo en la mano. Iu zorge anstataŭigis la bandaĝojn sur miaj ŝultroj kaj brusto. Iom post iom miaj pensoj klariĝis. Mi memoris mian duelon kaj divenis, ke mi estas vundita. En tiu momento la perdo grinĉis.

"Nu, kiel li fartas?" flustre demandis voĉo, kiu igis min tremeti.

"Ĉiam same," respondis Saveliĉ, suspirante.

"Kie mi estas? Kiu estas tie?" mi demandis kun peno.

Maria Ivanovna proksimiĝis al la lito kaj kliniĝis super min.

"Nu, kiel vi sentas vin?" ŝi demandis.

"Dankon al Dio," mi diris per malforta voĉo. "Ĉu estas vi, Maria Ivanovna? Diru al mi..."

Mi ne havis la forton daŭrigi kaj eksilentis. Saveliĉ suspiris. Gojo legiĝis sur lia vizaĝo.

"Li rekonsciiĝis, li rekonsciiĝis," li ripetis.

"Gloro estu al Vi, Sinjoro Dio! Aĥ, mia infano, Pjotr Andrejeviĉ, vi forte timigis min. Ĉu vi pensas, ke kvin tagoj da senkonscienco estas trankviligaj?"

Maria Ivanovna interrompis lian paroladon.

"Ne alparolu lin tro longe, Saveliĉ, li estas ankoraŭ malforta."

Ŝi eliris kaj dolĉe fermis la pordon. Miaj pensoj estis konfuzaj. Mi do estis en la domo de la komandanto: Maria Ivanovna venis viziti min. Mi volis fari kelkajn demandojn al Saveliĉ, sed la maljunulo skuis la kapon kaj ŝtopis siajn orelojn. Kun bedaŭro mi fermis la okulojn, kaj mi baldaŭ endormiĝis.

Kiam mi vekiĝis, mi vokis Saveliĉ, sed en lia loko mi vidis Maria Ivanovna. Ŝia anĝela voĉo salutis min. Mi ne povas esprimi la senton de feliĉeco kiu plenigis mian koron en tiu momento. Mi prenis ŝian manon, kisis ĝin kaj malsekigis ĝin per miaj larmoj. Maŝa ne retiris ĝin, kaj subite ŝiaj lipoj tuŝis mian vangon, kaj mi sentis iliajn freŝan kison, kiu varmigis min. Tremeto trakuris mian korpon.

"Kara, bona Maria Ivanovna," mi diris al ŝi, "ĉu vi volas fariĝi mia edzino, ĉu vi volas feliĉigi min?"

"Ne parolu," ŝi diris, retirante sian manon de la mia. "Via vivo estas ankoraŭ en danĝero: la vundo povas remalfermiĝi. Estu singarda, almenaŭ por mi."

Post tiuj vortoj ŝi eliris, lasante min ebria de entuziasmo. Feliĉeco revivigis min.

"Ŝi estos la mia. Ŝi amas min." Tiu penso plenigis mian vivon.

Ekde tiu momento, mi fartis pli bone de tago al tago. La regimenta barbiro prizorgis min, ĉar en la fortikaĵo ne estis alia kuracisto, kaj, danke al Dio, li ne komplikis la aferojn. Mia juneco kaj la naturo plirapidigis mian resaniĝon. La tuta familio de la komandanto gardis min. Maria Ivanovna ne forlasis min. Komprenoble ĉe la unue veninta okazo mi ripetis mian interrompitan amdeklaron, kaj Maria Ivanovna aŭskultis min kun pli da pacienco. Sen ia koketeco ŝi konfesis al mi sian korinklinon por mi kaj diris, ke ankaŭ siaj gepatroj certe ĝojos pri ŝia feliĉeco.

"Sed bone pripensu vian decidon" ŝi aldiris. "Ĉu ne estos kontraŭaĵoj flanke de viaj nobelaj gepatroj?"

Mi ripensis tion. Mi ne dubis pri la tenereco de mia patrino, sed konante la karakteron de mia patro, mi suspektis, ke mia amo ne multe emocios lin, kaj ke li konsideros tion ĉi kiel kapricon de senpensa junulo. Mi simple kaj honeste konfesis tion al Maria Ivanovna kaj decidis skribi al mia patro kiel eble plej baldaŭ elokventan leteron por peti lin pri lia patra beno. Mi voĉlegis tiun leteron al Maria Ivanovna, kiu trovis ĝin tiel konvinka kaj emocia, ke ŝi ne dubis pri ĝia sukceso, kaj ŝi transdonis sin al la sentoj de sia tenera koro kun la tuta konfido de sia juneco kaj sia amo.

Mi repaciĝis kun Ŝvabrin tuĝ post mia resaniĝo. Ivan Kuzmiĉ faris al mi riproĉojn pri mia duelo.

"Hej, Pjotr Andrejiĉ, mi devus meti vin en malliberejon, sed vi jam estas sufiĉe punita sentio. Aleksej Ivaniĉ estas enfermita en la magazeno kun pano kaj akvo, kaj lia sabro estas enfermita ĉe Vasilisa Jegorovna. Ni lasu lin pripensi lian faron kaj iomete pentofari."

Mi estis tro feliĉa por gardi en mi senton de rankoro. Mi intervenis por Ŝvabrin, kaj la bona komandanto, en akordo kun sia edzino, decidis liberigi lin. Ŝvabrin venis viziti min. Li esprimis sian porfundan bedaŭron pri tio kio okazis inter ni, konfesis, ke li kulpas pri ĉio kaj

petis min forgesi la pasintecon. Ne estante rankora, mi sincere pardonis al li nian disputon kaj la vundon, kiun li faris al mi. En lia kalumniado mi vidis nur la ĵaluzecon de rifuzita enamiĝinto kaj mi grandanime pardonis mian malfeliĉan rivalon.

Mi baldaŭ resaniĝis, kaj mi povis reiri al mia loĝejo. Malpacience mi atendis la respondon de mia patro al mi letero sen kuraĝi esperi pozitivan respondon kaj klopodante sufoki miajn timigajn antaŭsentojn. Al Vasilisa Jegorovna kaj ŝia edzo Ivan Kuzmiĉ mi diris ankoraŭ nenion, sed mia peto ne estus miriginta ilin. Nek Maria Ivanovna nek mi klopodis kaŝi antaŭ ili niajn sentojn, ĉar jam antaŭe ni estis certaj pri ilia konsento.

Finfine iumatene Saveliĉ envenis mian ĉambron, tenante leteron en siaj manoj. Mi kaptis ĝin kun emocio. La adreso estis skribita per la mano de mia patro. Tiu konstato preparis min al io grava, ĉar kutime estis mia patrino kiu skribis al mi, kaj li nur alskribis kelkajn liniojn sub ŝia letero. Mi longe ne kuraĝis rompi la sigelon de la paketo, legante kaj relegante la solenan adreson : *Al mia filo Pjotr Andrejeviĉ Grinĵov, Gubernio Orenburgo, Fortikaĵo Bjelogorsk.*

Ekzamenante la skribon de mia patro, mi penis diveni, en kiu mensostato la letero estis skribita. Finfine mi decidis rompi la sigelon sur la koverton, kaj ekde la unuaj linioj mi komprenis, ke mia tuta afero fuŝiĝis. Jen kio estis la enhavo de la letero de mia patro :

Mia kara filo Pjotr!

Via letero, en kiu vi petas nian benon kaj nian konsenton por via edziĝo je Maria Ivanovna, filino de kapitano Mironov, alvenis ĉe ni la 15-an de tiu ĉi monato, kaj ne nur mi ne havas la intencon doni al vi mian benon kaj mian konsenton, sed mi ankaŭ promesas al mi meti mian manon sur vin kaj punkorekti vin pro la stultaj bubajoj, kiel oni traktas bubon, malgraŭ via grado de oficiro; ĉar vi pruvas, ke vi ankoraŭ ne meritas porti la sabron, kiun vi ricevis por defendi la patrimon, kaj ne por interbatiĝi en duelo kun maltaŭguloj kiaj vi. Mi tuj skribos al Andrej Karloviĉ por peti lin translokigi vin de la fortikaĵo de Bjelogorsk al iu alia malproksima loko, kie via foleco povos pasi. Via patrino, ekscianta, ke vi duelis kaj estis vundita, malsaniĝis kaj kuŝas en ŝia lito.

Kio fariĝos el vi? Mi preĝas al Dio, por ke vi korektiĝu, kvankam mi ne kuraĝas fidi Lian grandan kompaton. Via patro.

La legado de tiu letero vekis en mi diversajn sentojn. La kruelaj esprimoj, kiujn mia patro ne ŝparis, profunde ofendis min. La malestimo kun kiu li parolis pri Maria Ivanovna, ŝajnis al mi same tiel nekonvenaj kiel malĵustaj. La penso, ke mi povus esti translokita de la fortikaĵo de Bjelogorsk al alia timigis min, sed pli ol ĉio dolorigis min la novaĵo de la malsano de mia patrino. Mi koleris kontraŭ Saveliĉ, ĉar mi estis certa, ke miaj gepatroj povis esti informitaj pri mia duelo nur de li. Paŝante tien kaj reen tra mia malgranda ĉambro, mi haltis antaŭ li kaj diris, minace rigardante lin :

"Ne sufiĉas al vi, ke per via kulpo mi estis vundita kaj dum monato surrande de tombo : vi ankaŭ volas mortigi mian patrimon".

Saveliĉ estis frapita kvazaŭ de fulmo.

"Sed, patreto," li diris, preskaŭ singultante, "kion vi volas diri ? Ĉu mi estas la kaŭzo, ke vi estis vundita ? Dio scias, ke mi kuris por protekti vin per mia brusto kontraŭ la sabro de Aleksej Ivaniĉ. Mia malbenita maljuneco malebligis tion. Sed kion do mi faris al via kara patrino ?"

"Kion vi faris al ŝi?" mi respondis. "Kiu petis vin denunci min ? Ĉu vi estis metita apud min kiel spiono ?"

"Ĉu mi denunciis vin ?" respondis Saveliĉ, plorante. "Sinjoro Dio, Reĝo de la ĉielo ! Legu do, kion skribis al mi mia mastro : vi vidos, ĉu mi denunciis vin."

Tiam li tiris el sia poŝo leteron kaj mi legis, kio sekvas:

Hontu, maljuna hundo, ĉar vi, malestimante miajn severajn ordonojn, ne denunciis al mi mian filon Pjotr Andrejiĉ, kaj devigis fremdulojn informi min pri liaj bubajoj. Ĉu vi tiel plenumas vian devon kaj obeas al la volo de via mastro? Mi igos vin, maljunan hundon, gardi la porkojn pro tio, ke vi kaŝis al mi la veron kaj sekrete ligis vin al la junulo. Tuj kiam vi ricevos tiun ĉi leteron, mi ordonas vin informi min pri lia sanstato, pri kiu oni skribis al mi, ke ĝi pliboniĝas. Skribu al mi sur kiu loko de sia korpo precize li estis vundita, kaj ĉu oni bone prizorgas lin.

Estis klare, ke Saveliĉ pravis, kaj ke mi malpravus ofendante lin per miaj riproĉoj kaj suspektoj. Mi petis lin pardonon min, sed la maljunulo estis nekonsolebla.

"Kial mi devis travivi ĉion ĉi," li ripetis. "Jen la danko, kiun mi ricevas de miaj mastroj. Mi

estas maljuna hundo, taŭgas nur por gardi la porkojn kaj krom tio estas la kaŭzo de via vundo. Ne, patreto Pjotr Andrejiĉ, ne mi, sed tiu malbenita *mosjé* estas la kaŭzo de ĉio. Li instruis al vi piki per rostostango kaj paŝeti, kvazaŭ oni povus defendi sin kontraŭ malbona viro kiel Ŝvabrin, pikante per rostostango kaj farante paŝetojn. Ha jes ! Estis necese dungi tiun *mosjé* kaj senutile eldoni monon."

Sed kiu do ŝarĝis sin per la tasko informi mian patron pri mia konduto ? Ĉu la generalo ? Sed li laŭŝajne ne tro okupiĝis pri mi, kaj Ivan Kuzmiĉ ne kredis necese, fari raporton pri mia duelo. Mi perdiĝis en supozoj. Miaj suspektoj falis sur Ŝvabrin. Li estis la sola, kiun denunco povis avantaĝi, ĉar tiu denunco povus havi kiel sekvon, ke mi estos forigita de la fortikaĵo kaj tiel devigi min rompi ĉiun kontakton kun la familio de la komandanto. Mi iris al Maria Ivanovna por ekspliki ĉion al ŝi. Mi trovis ŝin sur la perono.

"Kio estas al vi ?" ŝi demandis, rimarkante min. "Kiel pala vi estas !"

Ŝi paliĝis siavice.

Leginte la leteron de mia patro, ŝi redonis ĝin al mi per tremetanta mano kaj diris :

"Ni devas kredi, ke tio ne estas mia destino. Viaj gepatroj ne volas havi min en sia familio. Ke la volo de Dio fariĝu en ĉio ! Dio scias pli bone ol ni, kion ni bezonas. Oni povas fari nenion kontraŭ tio, Pjotr Andrejiĉ. Forgesu min kaj provu esti feliĉa."

"Tio ne povas esti," mi ekkriis, kaptante siajn manojn. "Vi amas min, mi amas vin kaj mi pretas al ĉio. Ni iru ĵeti nin antaŭ la piedojn de viaj gepatroj. Ili estas simplaj homoj, sed ili ne estas orgojlaj kaj kruelaj... Ili benos nin. Ni geedziĝos, kaj kun la tempo ni konvinkos mian patron. Mia patrino estos por ni, ŝi pardonos min..."

"Ne, Pjotr Andrejiĉ," Maŝa respondis, "mi ne edziniĝos je vi sen la beno de via gepatroj. Sen ilia beno ne estos feliĉeco por vi. Ni submetu nin al la volo de Dio. Se vi trovos la virinon, kiu estas destinita por vi, se vi edziĝos je alia, povu Dio esti kun vi, Pjotr Andrejiĉ, kaj mi preĝos por vi ambaŭ..."

Tiam ŝi ekploris kaj foriris. Mi volis sekvi ŝin en sian ĉambron, sed mi sentis, ke mi ne kapablas regi min, kaj mi reiris al mia domo.

Mi troviĝis en profunda melankolio, kiam subite Saveliĉ venis interrompi miajn pensojn.

"Jen, patreto," li diris, donante al mi folion sur kiu teksto estis skribita. "Rigardu, ĉu mi

estas la denunciinta de mia mastro, kaj ĉu mi provas malpacigi la filon kun la patro."

Mi prenis la paperon el liaj manoj : ĝi estis la respondo de Saveliĉ al la letero kiun li ricevis de mia patro. Jen ĝi estas laŭlitere :

Sinjoro Andrej Petroviĉ, nia bona patro !

Mi ricevis vian bonan leteron en kiu vi dignis koleri kontraŭ mi, via servutulo, ĉar laŭ vi mi ne plenumis la ordonojn de miaj mastroj. Mi ne estas maljuna hundo, sed via fidela servisto. Mi obeis kaj obeas al la ordonoj de miaj mastroj, kaj mi ĉiam servis vin diligente dum mia tuta vivo ĝis miaj grizaj haroj. Mi skribis nenion al vi koncerne la vundon de Pjotr Andrejiĉ por ne timigi la patrinon pro negrava afero, kaj mi vidas, ke mia mastrino, nia patrino Avdotja Vasilievna, tamen malsaniĝis pro granda timo, kaj mi preĝos Dion, por ke Li resanigu ŝin. Pjotr Andrejiĉ estis vundita sub la dekstra ŝultro en la brusto. per piko de duona verŝok kaj estis enlitigita en la domo de la komandanto, kien ni transportis lin, kaj estis nia barbiro, Stjepan Paramonov, kiu prizorgis lin. Kaj nun Pjotr Andrejiĉ, danke al Dio, denove estas sana. La ĉefoj evidente estas kontentaj pri li. Li estas akceptata ĉe Vasilisa Jegorovna kvazaŭ filo. Koncerne la malfeliĉo kiu okazis al li, oni povas riproĉi nenion al la junulo : ĉevalo havas kvar kruojn, sed ĝi povas tamen stumbli. Vi bonvolis skribi al mi, ke vi volas sendi min gardi la porkojn. Tio estas via rajto kiel mastro.

Mi salutas vin tre humile,

Via fidela servutulo, Arĥip Saveliĉ

Mi ne povis malhelpi min plurfoje rideti, legante la leteron de la bona maljunulo. Mi ne sentis min kapabla respondi al la letero de mia patro, kaj por trankviligi mian patrinon, la letero de Saveliĉ sufiĉis.

Ekde tiu momento, mia situacio ŝanĝiĝis. Maria Ivanovna preskaŭ ne plu parolis al mi kaj provis kiel eble plej eviti min. La domo de la komandanto perdis por mi ĉiun ĉarmon. Iom post iom mi devigis min resti en mia ĉambro. Komence Vasilisa Jegorovna faris riproĉojn al mi, sed vidante mian obstinecon, ŝi lasis min trankvila. Mi malofte vidis Ivan Kuzmiĉ nur por la bezonoj de la servo, kaj sen plezuro Ŝvabrin, tiom pli ke mi malkovris en li kaŝitan malamikecon kontraŭ mi, kio konfirmis mian suspekton. La vivo fariĝis por mi netolerebla. Mi sinkis en sombran melankolion, kiun pli-fortigis mia soleco kaj neniofarado. Mia amo al

Maria Ivanovna flamis pli forte en mia izoleco kaj fariĝis ĉiun tagon pli eltenebla. Mi perdis ĉiun emon legi kaj verki. Mia humuro plimalboniĝis kaj mi timis freneziĝi aŭ esti trenata al diboĉo.

Sed neantaŭviditaj eventoj, kiuj forte estis influontaj mian pluan vivon, baldaŭ donis al mia animo brutalan sed bonfarantan ŝokon.

VI. LA EPOKO DE PUGAĈOV

Vi, junuloj, nun aŭskultu,
Kion ni, la maljunuloj,
Estas al vi rakontontaj.
(Popolkanto)

Antaŭ ol transiri al la priskribo de la strangaj eventoj, kies atestanto mi estis, mi devas diri kelkajn vortojn pri la situacio, en kiu troviĝis la gubernio Orenburgo fine de la jaro 1773-a.

En tiu vasta kaj riĉa gubernio loĝis precipe duone sovaĝaj popoloj, kiuj antaŭnelonge estis rekonintaj la suverenecon de la rusaj caroj. Iliaj kontinuaj ribeloj, ilia malinklino respekti la leĝojn de la civila vivo, ilia facilanimeco kaj ilia krueleco postulis de la rusa registaro daŭre gardi ilin por teni ilin en obeado. Fortikaĵoj estis konstruitaj sur lokoj kiuj estis konsiderataj favoraj kaj enloĝataj plejgrandparte de kozakoj, kiuj estis la malnovaj posedantoj de la bordoj de Jajik. Sed la kozakoj de Jajik, kiuj havis la mision sekurigi trankvilecon kaj sekurecon en tiu regiono, jam de kelka tempo mem fariĝis maltrankvilaj regatoj, danĝeraj por la registaro. En 1772 estiĝis ribelo en ilia malgranda ĉefurbo. Ĝia kaŭzo estis la severaj aranĝoj faritaj de general-majoro Traubenberg por devigi ilian armeon submeti sin. La rezulto estis la barbara murdo de Traubenberg, libervola ŝanĝo en la administrado kaj finfine repaĉigo per mitralkugloj kaj kruelaj punoj.

Tiuj eventoj estis okazintaj iom da tempo antaŭ mia alveno en la fortikaĵo de Bjelogorsk. Ĉio estis aŭ ŝajnis denove esti trankvila. La registaro leĝeranime kredis je la sincera bedaŭro de la ribeluloj, kiuj sekrete komplotis kaj atendis favoran okazon por kaŭzi novajn tumultojn.

Mi revenas al mia rakonto.

Iun vesperon komence de oktobro 1773 mi estis sola en mia ĉambro, aŭskultante la hurlantan aŭtunan venton kaj rigardante tra la fenestro la nubojn, kiuj pasis antaŭ la luno. Oni venis serĉi min laŭ ordono de la komandanto. Mi tuj iris al lia domo. Apud la komandanto mi trovis Ŝvabrin, Ivan Ignatiĉ kaj la serĝento de

la kozakoj. Nek Vasilisa Jegorovna, nek Maria Ivanovna estis tie. La komandanto respondis al mia saluto kun maltrankvila mieno. Li ŝlisis la pordon per la riglilo, petis ĉiujn sidiĝi, escepte de la serĝento, kiu restis staranta. apud la pordo, tiris paperon el sia poŝo kaj diris al ni :

"Sinjoroj oficiroj, mi ricevis gravan novaĵon. Aŭskultu, kion skribas la generalo."

Tiam li surmetis siajn okulvitrojn kaj legis, kio sekvas :

*Al la sinjoro komandanto de la fortikaĵo
de Bjelogorsk, kapitano Mironov,*

SEKRETO

Mi informas vin, ke la skisma donkozako, eskapinta el la prizono, Jemelja¹⁸ Pugaĉov, kiu havis la nedireblan insolentecon akapari la nomon de la forpasinta imperiestro Petro la III-a, kolektis bandon da banditoj, kaŭzis tumultojn ĉe la popoloj de Jajik, kaj jam prenis kaj detruis plurajn fortikaĵojn, ĉie plenumante rabadon kaj semante morton. Sekve, ricevante tiun ĉi leteron, Sinjoro Komandanto, vi devas kiel eble plej baldaŭ fari la necesajn aranĝojn por repuŝi la nomitan banditon kaj trompiston kaj kiel eble plej frue tute neniigi lin, se li atakas la fortikaĵojn, kiu estis konfidita al vi.

"Fari la necesajn aranĝojn," diris la komandanto, deprenante siajn okulvitrojn kaj pliante la leteron. "Hej, estas facile diri tion. Tiu bandito ŝajnas al mi esti tre forta, kaj ni havas entute nur cent tridek virojn, sen paroli pri la kozakoj, kiujn ni povas malfacile fidi Tion ĉi mi diras sen fari riproĉon al serĝento Maksimiĉ (kiu ekridis). Tamen ni ne povas agi alimaniere. Sinjoroj Oficiroj, estu striktaj, organizu la gardon kaj noktajn postenojn. En la kazo de atako, fermu la pordegojn, alarmu la soldatojn. Vi, Maksimiĉ, observu viajn kozakojn. Ekzamenu la kanonon, kaj bone purigu ĝin ! Kaj antaŭ ĉio, gardu ĉion ĉi sekreta, por ke neniu en la fortikaĵo sciu ion antaŭtempe."

Doninte siajn ordonojn, Ivan Kuzmiĉ, forsendis nin. Mi eliris samtempe kun Ŝvabrin, kaj ni komentis, kion ni ĵus aŭdis.

"Kion vi opinias? Kiel tio finiĝos?" mi demandis lin.

"Dio scias kiel," li respondis, "sed ni vidos."

Tiam li komencis mediti, distrite fajfante francan kanton.

Malgraŭ ĉiuj antaŭrimedoj la novaĵo de la apero de Pugaĉov disvastiĝis en la fortikaĵo.

¹⁸ Rusa formo de Emilio

Malgraŭ ke Ivan Kuzmiĉ alte estimis sian edzinon, li estus rivelinta por nenio en la mondo al ŝi la sekreton, kiun estis konfidita al li pro kaŭzoj de la servo. Ricevinte la leteron de la generalo, li tre lerte persvadis Vasilisa Jegorovna eliri, dirante al ŝi, ke patro Gerasim ricevis el Orenburgo ekstraordinare gravajn novaĵojn, kiujn li tenis sekretaj. Vasilisa Jegorovna deziris tuj viziti la edzinon de la popo kaj, laŭ konsilo de Ivan Ignatiĉ, ŝi prenis Maŝa kun ŝi, por ke tiu ĉi ne enuu sola.

Ivan Kuzmiĉ, restinta la sola mastro en la domo, tuj venigis nin kaj enfermis Palaŝka en la rezervejo por malhelpi ŝin spioni nin.

Vasilisa Jegorovna poste revenis hejmen, ne povinte ekscii ion novan de la popedzino, kaj ŝi eksciis, ke dum ŝia foresto okazis kunveno ĉe Ivan Kuzmiĉ, kaj ke Palaŝka estis enŝlosita. Ŝi divenis, ke ŝia edzo trompis ŝin kaj eniris ĉe lin por esplordemandi lin. Sed Ivan Kuzmiĉ estis preparinta sin por la atako. Li tute ne embarasiĝis kaj kuraĝe respondis al ŝia scivolema kompanino :

"Sed, mia etulino, niaj edzinoj ekhavis la ideon hejti siajn stovojn per pajlo, kaj ĉar el tio povas rezulti akcidento, mi donis severajn ordonojn, por ke estontece la virinoj ne plu bruligu pajlon, sed lignon."

"Sed kial do enŝlosi Palaŝka ?" demandis la komandantedzino. "Kial do la povra knabino devis resti en la rezervejo ĝis nia reveno ?"

Ivan Kuzmiĉ, kiu ne estis preparita al tiu demando, konfuziĝis kaj murmuris ion ne tre klaran. Vasilisa Jegorovna rimarkis la ruzon de sia edzo, sed sciante, ke ŝi ekscios nenion de li, ŝi finis la demandadon kaj komencis paroli pri la salitaj kukumetoj, kiujn la popedzino Akulina Pamfilovna estis preparinta en tute speciala maniero. La tutan nokton Vasilisa Jegorovna ne povis dormi, provante diveni, kio povus esti en la kapo de sia edzo, kion ŝi ne rajtis scii

La morgaŭon, reveninte de la meso, ŝi rimarkis Ivan Ignatiĉ, kiu retiris el la kanono la ĉifojn, ŝtonojn, rabotaĵojn, osetojn kaj ĉiujn speciajn malpuraĵojn, kiujn la buboj estis ĵetintaj en ĝin.

"Kion do signifus tiuj pormilitaj preparoj ?" pensis la komandantedzino. "Ĉu oni atendas atakon de la kirgizoj ? Sed ĉu Ivan Kuzmiĉ kaŝus al mi tiajn stultaĵojn ?"

Ŝi vokis Ivan Ignatiĉ kun la firma intenco tiri el li la sekreton, kiu turmentis ŝian virinan scivolemon.

Vasilisa Jegorovna faris al li kelkajn rimarkojn pri la mastrumado, kvazaŭ juĝisto kiu komencas enketon per akcesoraj demandoj por endormigi ekde la komenco la singardecon de la akuzato. Tiam post mallonga silento ŝi profunde suspiris kaj diris, skuante la kapon:

"Sinjoro Dio! Ha! Kiaj novaĵoj! Kio el ni fariĝos!"

"Ho, patrineto," respondis Ivan Ignatiĉ, "Dio estas bona. Ni havas sufiĉe da soldatoj, multe da pulvo, kaj mi purigas la kanonon. Kun iom da ŝanco ni repuŝos Pugaĉov. Kiun Dio helpas, tiun nenio povas noci."

"Sed kiu li do estas, tiu Pugaĉov ?" demandis la komandantedzino.

Tiam Ivan Ignatiĉ konsciiĝis, ke li diris tro multe kaj mordis sian langon. Sed jam estis tro malfrue. Vasilisa Jegorovna devigis lin konfesi ĉion, certigante lin, ke ŝi rakontos tion al neniu.

Vasilisa Jegorovna tenis sian promeson kaj diris nenion al neniu, escepte al ŝia amikino, la popedzino, kaj nur ĉar ties bovino paŝtiĝis en la stepo, kaj ke tiu ĉi povus esti ŝtelita de la kozakoj.

Baldaŭ ĉiuj parolis pri Pugaĉov. La famoj estis diversaj. La komandanto sendis la serĝenton kun la misio serioze informi sin en la vilaĝoj kaj najbaraj fortikaĵoj. La serĝento revenis du tagojn poste kaj deklaris, ke sur la stepo, je sesdeko da verstoj de la fortikaĵo, li vidis multajn fajrojn kaj aŭdis diri la baŝkirojn, ke nekonata granda armeo proksimiĝas. Cetero li ne povis diri ion certan, kaj li timis iri pli malproksimen sur la stepo.

En la fortikaĵo oni rimarkis ĉe la kozakoj nekutiman maltrankvilecon. Sur ĉuj stratoj ili kolektiĝis en grupoj, parolante tre mallaŭte kaj disirante tuj kiam ili vidis dragonon aŭ soldaton de la garnizono. Oni sendis al ili spionojn. Julaj, baptita kalmuko, raportis ion gravan al la komandanto. La deklaroj de la serĝento, laŭ Julaj, estis falsaj. Post lia reveno la perfida kozako estis deklarinta al siaj kamaradoj, ke li estis ĉe la ribeluloj kaj prezentis sin mem al la ĉefo, kiu permesis lin kisi lian manon kaj longe parolis kun li. La komandanto tuj enprizonigis la serĝenton kaj anstataŭigis lin per Julaj. Tiu novaĵo estis ricevita de la kozakoj kun klara malkontenteco. Ili forte protestis, kaj Ivan Ignatiĉ, kiu nur plenumis la ordonon de la komandanto, aŭdis per siaj propraj oreloj :

"Atendu, garnizona rato, ni pagos vin !"

Tiun tagon la komandanto intencis esplordemandi sian malliberulon, sed la serĝento

fuĝis el la prizono, verŝajne danke al la helpo de siaj samgantoj.

Nova cirkonstanco pligravigis la maltran- kvilecon de la komandanto. Oni arestis baŝ- kiron kiu portis ribeligajn proklamojn. Ĉe tiu okazo la komandanto pensis denove unuigi siajn oficirojn kaj volis denove forigi Vasilisa Jegorovna per akceptebla preteksto. Sed ĉar Ivan Kuzmiĉ estas tre simpla kaj sincera viro, li trovis nenian alian rimedon, ol tiun kiun li jam uzis unufoje.

"Aŭskultu, mia kara Vasilisa Jegorovna," li diris tusante. "Ŝajnas, ke patro Gerasim denove ricevis novaĵon el la urbo..."

"Jam sufiĉas viaj mensogoj, Ivan Kuzmiĉ," interrompis lin lia edzino. "Vi volas do denove kunvoki kunvenon kaj paroli pri Jemelja Puga- ĉov sen mi ? Nu! Vi ne denove mistifos min."

Ivan Kuzmiĉ malfermis grandajn okulojn.

"Bone, bone, mia knabino," li diris, "ĉar vi jam scias ĉion, vi povas resti. Ni diskutos en via ĉeesto."

"Kompreneble," ŝi respondis. "Ĉi-foje vi ne ludos la ruzulon. Kunvoku viajn oficirojn."

Ni do denove kunvenis. En la ĉeesto de sia edzino, Ivan Kuzmiĉ legis al ni alvokon de Pugaĉov skribita de preskaŭ analfabeta kozako. La bandito anoncis sian intencon tuj marŝi al nia fortikaĵo, invitante la kozakojn kaj la sol- datojn aliĝi al lia bando, kaj ne kontraŭstari la aŭtoritatulojn, minacante puni ilin en la kon- traŭa kazo. La alvoko estis skribita en brutala sed forta lingvo kaj devis produkti la impreson de granda danĝero sur la mensoj de simplaj homoj.

"Kia bandito !" ekkriis la komandantedzino. "Kion li ankoraŭ aŭdacas proponi al ni ? Ĉu iri renkonte al li kaj meti niajn flagojn ĉe liajn piedojn ? Ha, filo de hundo, kiu li estas. Sed ĉu li do ne scias, ke ni servas jam kvardek jarojn kaj ke ni jam vidis ĉion, danke al Dio! Ĉu estis tiaj komandantoj, kiuj obeis lin ?"

"Ili ne devus ekzisti," respondis Ivan Kuz- miĉ. "Sed mi komprenas, ke la bandito jam konkeris plurajn fortikaĵojn."

"Ni devas do kredi, ke li estas forta," rimar- kis Ŝvabrin.

"Nu, ni baldaŭ konos lian veran fortecon," diris la komandanto. "Vasilisa Jegorovna, donu al mi la ŝlosilon de la magazeno. Ivan Ignatiĉ, alkonduku ĉi tien la baŝkiron, kaj ordonu al Julaj alporti la vipojn."

"Atendu, Ivan Kuzmiĉ," diris la komandant- edzino ekstarante, "mi forigos Maŝa el la domo, ĉar alie ŝi ektimos, aŭdante la kriojn.

Kaj ankaŭ mi verdire ne ŝatas ĉeesti tortura- don. Bonan vesperon !"

La "esplordemandado" estis tiagrade parto de la normala proceduro en la malnova tempo, ke la ukazo¹⁹, kiu abolis ĝin, longe restis sen ia efiko. Oni pensis, ke persona konfeso de la krimulo estis necesa, por ke li estu tute sen- maskita, ideo kiu ne nur estas tute sen funda- mento, sed ankoraŭ tute kontraŭa al la spirito de sana justeco, ĉar se la neoj de la akuzito ne estas konsiderataj kiel pruvo de lia senkulpeco, ankoraŭ malpli liaj eltruditaj konfesoj devas esti konsiderataj kiel pruvo de lia kulpeco. Eĉ nun mi havas okazon aŭdi maljunajn juĝistojn plendi pri tio, ke oni abolis tiun barbaran kutimon. Sed en nia tempo neniu dubis pri la neceseco de tiu speco de esplordemandado – nek la juĝistoj, nek la akuzatoj. Tiel la ordono de la komandanto mirigis aŭ emociis neniun el ni. Ivan Ignatiĉ iris al la magazeno, kie la baŝkiro estis enŝlosita, kaj kelkajn minutojn poste li kondukis la malliberulon en la antaŭ- ĉambron. La komandanto ordonis al li prezenti sin al ni.

Kun peno la baŝkiro transpaŝis la sojlon, ĉar liaj piedoj estis katenitaj, kaj depreninte sian ĉapon, li restis staranta apud la pordo. Mi ĵetis rigardon sur lin kaj tremetis. Neniam mi for- gesis tiun homon. Li ŝajnis havi pli ol sepdek jarojn. Li havis nek nazon nek orelojn. Lia kapo estis razita. Anstataŭ barbo kelkaj blankaj haroj kovris lian mentonon. Li estis malgranda, maldika kaj kurba, sed liaj malgrandaj okuloj brilis kiel fajroj.

"Hej," diris la komandanto, rekonante per tiuj teruraj signoj unu el la punitaj ribeluloj de 1741, "mi bone vidas, ke vi estas maljuna lupro, kiu jam troviĝis en niaj kaptiloj. Ne estas la unuan fojon, ke vi ribelas, ĉar vi havas la kranion razita. Alproksimiĝu iom pli : diru al mi, kiu sendis vin."

La maljuna baŝkiro silentis kaj rigardis la komandanto per tute brutigita rigardo.

"Kial vi silentas ?" daŭrigis Ivan Kuzmiĉ. "Ha ! Sendube li komprenas nenian rusan vor- ton. Julaj, demandu lin en via lingvo, kiu sendis lin al nia fortikaĵo."

Julaj ripetis en la tartara la demandon de Ivan Kuzmiĉ. Sed la baŝkiro rigardis lin per la sama esprimo kaj respondis nenion.

"*Jakŝi*²⁰," diris la komandanto, "vi tamen parolos. Soldatoj, deprenu de li lian idiote stre-

¹⁹ Dekreto de la caro

²⁰ 'Bona' en la tartara

kitan mantelon kaj aranĝu lian spinon. Vi, Julaj, komencu ! Prizorgu lin!"

Du invalidoj komencis malvesti la baŝkiron. La vizaĝo de la malfeliĉulo esprimis maltran-kvilecon. Li rigardis al ĉiuj flankoj, kiel besto kiun estis kaptintaj infanoj. Unu el la invalidoj prenis liajn manojn, metis ilin ĉirkaŭ lian kolon kaj kaptis la maljunulon ĉe la ŝultroj, dum Julaj prenis kaj svingis vipon. Tiam la baŝkiro petegante ĝemis per malforta voĉo kaj, farante signon per la kapo, li malfermis la buŝon en kiu, anstataŭ lango moviĝis mallonga stumpo.

Kiam mi memoras, ke tiu mutilado okazis dum mia juneco, kaj ke nun mi atingis la mallongan regadon de imperiestro Aleksandro, mi ne povas ne miri pri la rapidaj sukcesoj de la instruado kaj la disvastigo de la reguloj kiuj koncernas la amon de la proksimulo. Junulo, se tiuj ĉi miaj paĝoj iam trafos en viajn manojn, memoru, ke la plej bonaj kaj la plej stabilaj ŝanĝoj estas tiuj kiuj estis faritaj por plibonigi la morojn sen violentaj skuoj.

Ĉiuj estis perpleksaj.

"Bone," diris la komandanto. "Estas klare, ke ni obtenos nenion de li. Julaj, rekonduku la baŝkiron en la magazanon. Sed ni, Sinjoroj, devas ankoraŭ diskuti."

Ni komencis komenti la situacion, kiam subite Vasilisa Jegorovna eniris la ĉambron, senspira kaj ekstraordinare emociita.

"Kio estas al vi?" demandis la komandanto, mirigita.

"Kia malfeliĉo, miaj infanoj," respondis Vasilisa Jegorovna. "La fortikaĵo de Niĵne-Ozero estis kaptita de Pugaĉov ĉi-matene. Laboristo de patro Gerasim revenis de tie for. Li vidis, kiel oni prenis ĝin. La komandanto kaj ĉiuj oficiroj estis pendumitaj. Ĉiuj soldatoj estis arestitaj. Post mallonga tempo la banditoj estos ĉi tie."

Tiu neatendata novaĵo multe mirigis min. Mi konis la komandanton de tiu fortikaĵo, tran-kvila kaj modesta junulo. Du monatojn antaŭe, li estis transirinta Orenburgon kun sia juna edzino kaj haltinta ĉe Ivan Kuzmiĉ. Niĵne-Ozero troviĝas je proksimume dudek kvin verstoj de nia fortikaĵo. De horo al horo ni povis atendi la atakon de Pugaĉov. La sorto de Maria Ivanovna klare prezentiĝis antaŭ mia menso, kaj mia koro estis preta halti sian batadon.

"Aŭskultu, Ivan Kuzmiĉ," mi diris al la komandanto. "Nia devo estas defendi la fortikaĵon ĝis nia lasta spiro. Ne estas dubo pri tio, ke li venos.. Sed ni devas unue pensi pri la

sekureco de la virinoj. Sendu ilin al Orenbur-go, se la vojo estas libera, aŭ al iu malprok-sima, pli sekura fortikaĵo, kie la banditoj ne povas atingi ilin."

Ivan Kuzmiĉ turnis sin al sia edzino kaj diris al ŝi :

"Aŭskultu do, mia knabino : ĉu mi ne devus sendi vin iom pli foren, ĝis ni estos venkintaj la ribelulojn ?"

"Ba ! Kia stultaĵo !" diris la komandant-edzino. "Kie troviĝas la fortikaĵo, en kiun la kugloj ne povas penetri ? Pro kio nia fortikaĵo de Bjelogorsk ne estus sekura ? Danke al Dio estas la dudek-duan jaron, kiun ni pasigas ĉi tie. Ni jam vidis la baŝkirojn kaj la kirgizojn, kaj tiun Pugaĉov ni certe ankaŭ forpelos..."

"Bone, bone," replikis Ivan Kuzmiĉ, "restu se vi volas, ĉar vi fidas nian fortikaĵon. Sed kion fari per Maŝa ? Estos bone, se ni sukcesos elteni la sieĝon, aŭ se ni povos atendi helpon. Sed se tiuj banditoj prenos la fortikaĵon ?"

"Nu, tiam..."

Tiam Vasilisa Jegorovna komencis balbuti kaj ŝi eksilentis profunde emociite.

"Ne, Vasilisa Jegorovna," reprenis la koman-danto, rimarkante, ke liaj paroloj imponis ŝin. "Maŝa ne povas resti ĉi tie. Ni sendu ŝin al ŝia baptopatrino en Orenburgo. Tie estas armeo kun sufiĉe da kanonoj kaj muroj el ŝtonoj. Kaj mi konsilas al vi, foriri kun ŝi. Vi certe jam estas maljuna, sed kio okazos al vi, se la banditoj prenos la fortikaĵon ?"

"Bone," diris la komandantedzino. "Bone, ni forsendos Maŝa, sed mi eĉ ne revas peti tion de mi mem : mi ne foriros. Kial je mia aĝo mi separus min de vi por serĉi solecan tombon en fremdan landon ? Ni vivis kune, kaj ni mortos kune."

"Bone, bone," diris la komandanto. "Tiam ni ne rajtas perdi tempon. Iru tuj prepari Maŝa por foriri. Morgaŭ matene ni forsendos ŝin kun eskorto, kvankam ni ne havas tro da viroj. Sed kie estas Maŝa ?"

"Ŝi estas ĉe Akulina Pamfilovna," respondis la komandantedzino. Ŝi eksentis sin malbone, kiam ŝi eksciis la kapton de Niĵne-Ozero. Mi timas, ke ŝi malsaniĝos. Sinjoro, Dio, kial ni devas vidi tion ĉi!"

Vasilisa Jegorovna foriris por organizi la foriro de sia filino. La konversacio daŭris ĉe la komandanto, sed mi enmiksiĝis en nenion plu kaj aŭdis nenion plu. Maria Ivanovna aperis ĉe la vespermanĝo, pala kaj elplorinta. Ni vesper-manĝis silentante kaj forlasis la tablon pli frue ol kutime. Adiaŭinte la tutan familion, ni reiris

al niaj ĉambroj. Sed mi intence forgesis mian sabron : mi antaŭsentis, ke mi retrovos Maria Ivanovna sola. Efektive, ŝi venis renkonte al mi ĉe la pordo kaj donis al mi mian sabron.

"Adiaŭ, Pjotr Andrejiĉ," ŝi diris al mi plorante. "Oni sendos min al Orenburgo. Restu senleza kaj estu feliĉa. Eble Dio permesos al ni revidi nin, se ne..."

Tiam ŝi ekploris. Mi ĉirkaŭbrakis ŝin.

"Adiaŭ, mia anĝelo," mi diris, "adiaŭ, mia tre kare amata. Kio ajn okazos al mi, estu certa, ke mia lasta penso kaj mia lasta preĝo estos por vi."

Maŝa eksingultis, premante la vizaĝon kontraŭ mian bruston. Mi pasie kisis ŝin kaj rapidis eliri la ĉambron.

VII. LA ATAKO

Bona povra kapo mia,	Nek afablan vorton iam,
Bona kap' de servutulo,	Nek pli altan rangon ian,
Bona knabo, kiu servis	Nur ricevis, povra kapo,
Ĝuste tridek kaj du jarojn,	Paron da tre altaj fostoj
Sen ricevi, ho mi, povra,	Unu trabon de acero
Nek profiton nek dankemon,	Kaj fortikan silkan ŝnuron.

(Popolkanto)

Tiun nokton mi ne malvestis min kaj ne dormis. Mi intencis iri ĉe la tagiĝo al la pordego de la fortikaĵo, kiun Maria Ivanovna estis traironta, irante al la urbo, por adiaŭi ŝin lastan fojon. Mi sentis en mi grandan ŝanĝon. La turmentoj de mia animo doloris malpli, ol la deprimiteco en kiu mi troviĝis ekde kelkaj tagoj. En la malĝojon de la separo miksiĝis obskuraj sed dolĉaj esperoj, la malpacienca atendo de la venontaj danĝeroj kaj la sento de ia nobla ambicio. La nokto pasis nerimarkite. Mi jam volis eliri mian domon, kiam la pordo malfermiĝis kaj korporalo anoncis, ke niaj kozakoj forlasis la fortikaĵon dum la nokto, perforte kunvenigante Julaj, kaj ke ĉirkaŭ la fortikaĵo cirkulis nekonataj viroj. La penso, ke Maria Ivanovna ne sukcesos eliri, timigis min, kaj mi tuj rapidis al la komandanto.

Jam estis la tagiĝo. Mi kuris tra la strato, kiam mi aŭdis iun voki min. Mi haltis.

"Kien vi iras?" demandis min Ivan Ignatiĉ, kiu aliĝis al mi. "Ivan Kuzmiĉ jam estas sur la remparo kaj sendas min por venigi vin. Pugaĉov alvenis."

"Ĉu Maria Ivanovna jam foriris?" mi demandis tremante.

"Ŝi ne havis la tempon," respondis Ivan Ignatiĉ. "La vojo al Orenburgo estas barita. La

fortikaĵo estas ĉirkaŭita. La situacio estas malbona, Pjotr Andrejiĉ!"

Ni supreniris la remparon, altaĵon formitan de la naturo kaj fortigitan de palisaro. Tie jam estis kolektiĝintaj amase ĉiuj loĝantoj de la fortikaĵo. La garnizono estis armita. La antaŭan vesperon oni estis treninta tien la kanonon. La komandanto marŝis tien kaj reen antaŭ sia malgrandnombra trupo. La proksimiĝo de la danĝero animis la maljunan militiston per nekutima fervoro. Sur la stepo, ne tre for de la fortikaĵo, cirkulis dudeko da rajdistoj, evidente kozakoj, sed inter ili estis ankaŭ baŝkiroj, kiujn oni facile rekonis per ilia linkaj ĉapoj kaj saguoj.

La komandanto revuis sian tutan armeon, dirante al la soldatoj :

"Nu, miaj infanoj, ni konsideru hodiaŭ kiel nia patrino, la Imperiestrino Katerina, kaj ni montros al la tuta mondo, ke ni estas bravaj kaj fidelaj viroj."

La soldatoj laŭvoĉe konfirmis sian fervoron. Ŝvabrin staris ĉe mia flanko kaj fikse rigardis la malamikojn. Rimarkante la movadon sur la fortikaĵo, la viroj kiuj cirkulis sur la stepo, kolektiĝis kaj komencis diskuti inter si. La komandanto ordonis al Ivan Ignatiĉ direkti la kanonon al ilia grupo kaj mem bruligis la meĉon. Fumante la kuglo flugis super iliaj kapoj sen fari malbonon al ili. La rajdistoj tuj disiĝis kaj malaperis. La stepo malpleniĝis.

Tiam Vasilisa Jegorovna aperis sur la remparo kun Maŝa, kiu ne volis separi sin de sia patrino.

"Nu," demandis la komandantedzino, "kiel fartas la batalo? Kie estas la malamiko?"

"La malamiko ne troviĝas malproksime," respondis Ivan Kuzmiĉ. "Se Dio volas, ĉio iros glate. Nu, Maŝa, ĉu vi timas?"

"Ne, paĉjo," respondis Maria Ivanovna. "Mi pli timas kiam mi estas sola en la domo."

Tiam ŝi rigardis min kaj provis rideti. Sentence mi premis la tenilon de mia sabro, memorante, ke la antaŭvesperon mi ricevis ĝin el ŝiaj manoj, kvazaŭ por defendi mian amatinon. Mia koro brulis. Mi konsideris min kiel ŝian kavaliron. Mi volis montri al ŝi, ke mi estas digna je ŝia amo kaj fido, kaj mi atendis la decidan minuton kun malpacienca.

En tiu momento aperis de malantaŭ la altaĵo, kiu troviĝis je duona versto de la fortikaĵo, novaj surĉevalaj trupoj, kaj baldaŭ la stepo kovriĝis per amaso da viroj armitaj per lancoj kaj halebardoj. Inter ili, rajdante sur blanka ĉevalo, troviĝis viro en ruĝa kaftano kun

videbla sabro. Tio estis Pugačov mem. Aliaj viroj ĉirkaŭis lin kaj, videble laŭ lia ordono, kvar viroj malproksimiĝis de la trupo kaj galopis al la fortikaĵo. Ni rekonis en ili niaj perfiduloj. Unu el ili tenis super sia ĉapo paketon da paperoj. Alia portis sur la finaĵo de sia lanco la kapo de Julaj, kiun li lanĉis al ni trans la palisaron. La kapo de la povra kalmuko falis ĉe la piedoj de la komandanto. La perfiduloj kriis :

"Ne pafu, sed eliru kaj venu al la imperiestro. La imperiestro estas ĉi tie."

"Vi vidos tion!" kuraĝe ekkriis Ivan Kuzmiĉ. "Soldatoj, pafu!"

Niaj soldatoj pafis salvon, kaj la kozako kiu tenis la paperojn en sia mano, ŝanceliĝis kaj falis de sia ĉevalo. La aliaj forfuĝis galopante. Mi rigardis Maria Ivanovna. Terurigite per la vido de la sanganta kapo de Julaj kaj konfuzite per la salvo, ŝi ŝajnis prirabita de de siaj sensoj. La komandanto vokis la korporalon kaj ordonis al li iri tiri la leteron el la mano de la pafmortigita kozako. La korporalo tuj eliris al la batalkampo kaj revenis, kondukante per la brido la ĉevalon de la kozako. Li donis la leteron al la komandanto. Ivan Kuzmiĉ legis ĝin kaj tiam disŝiris ĝin en malgrandajn pecetojn. Intertempe la ribeluloj preparis sin al la batalo. Baldaŭ la kugloj komencis sibli preter niaj oreloj, kaj kelkaj frapis en la teron ĉirkaŭ ni kaj en la palisaron.

"Vasilisa Jegorovna," diris la komando, "tio ĉi ne estas loko por virinoj. Forkonduku Maŝa. Vi bone vidas, ke la povra knabino estas pli morta ol viva pro timo."

Vasilisa Jegorovna, kiu estis impresita de la kugloj, rigardis la stepon, kie oni rimarkis grandan movadon, tiam turnis sin al sia edzo kaj diris al li :

"Ivan Kuzmiĉ, Dio disponas pri vivo kaj morto : benu Maŝa. Maŝa, iru al via patro."

Pala kaj tremetanta, Maŝa proksimiĝis al Ivan Kuzmiĉ, surgenuiĝis kaj salutis lin ĝis la tero. La maljuna komandanto benis ŝin trifoje. Tiam li relevis ŝin, kisis ŝin trifoje kaj diris per ŝanĝita voĉo:

"Maŝa, estu feliĉa. Preĝu al Dio. Li ne forlasos vin. Se vi trovos bravan viron, ke Dio donu al vi amon kaj akordon. Vivu kiel ni ĉiam vivis, Vasilisa Jegorovna kaj mi. Adiaŭ, Maŝa ! Vasilisa Jegorovna, tuj forkonduku ŝin."

Maŝa ĉirkaŭbrakis lin, sangultante.

"Ni ankaŭ ĉirkaŭbraku nin, Ivan Kuzmiĉ," diris la komandantedzino plorante. "Adiaŭ mia edzo. Pardonu min, se mi iam ĉagrenis vin."

"Adiaŭ, mia edzino," diris la komandanto, ĉirkaŭbrakante sian maljunan edzinon, "kaj se vi havas la tempon, vestu Maŝa per la saraŝano."

La komandantedzino malproksimiĝis kun sia filino. Mi sekvis Maria Ivanovna per la okuloj. Ŝi turnis sin kaj faris al mi signon per la kapo. Tiam Ivan Kuzmiĉ turnis sin al ni, kaj lia tuta atento denove iris al la malamiko. La ribeluloj kolektiĝis ĉirkaŭ sia ĉefo, kaj subite komencis deĉevaliĝi.

"Nun, tenu vin bone," diris la komandanto, "estas la atako."

En tiu momento resonis teruriga hurlado kaj kriado : la ribeluloj atakis. Nia kanono estis ŝargita per mitrajlo. La komandanto lasis ilin veni kiel eble plej proksime kaj subite ellasis novan kanonpafon. La ribeluloj saltis ambaŭflanken kaj retiriĝis, dum ilia ĉefo restis sola antaŭe. Li svingis sian sabron kaj ŝajne varme admonis ilin. La krioj kaj hurloj, kiuj silentis dum kelkajn minutojn, denove resonis...

"Nu, miaj infanoj," diris la komandanto, "malfermu nun la pordegojn, batu la tamburojn. Antaŭen, miaj infanoj, eliru malantaŭ mi."

La komandanto, Ivan Ignatiĉ kaj mi troviĝis en la daŭro de palpebrumo sur la remparo, sed la garnizono, malkuraĝigite, ne moviĝis.

"Kio mankas al vi, miaj infanoj, kial do vi retas tie?" Ivan Kuzmiĉ elkriis. "Ni mortu se necesas, ĉar tio estas nia devo."

En tiu momento la ribeluloj alkuris al ni kaj eniris la fortikaĵon. La tamburisto eksilentis, la soldatoj ĵetis siajn armilojn teren. Mi estis preskaŭ renversita, sed mi releviĝis kaj eniris la fortikaĵon samtempe kun la ribeluloj. La komandanto, vundita en la kapo, estis ĉirkaŭita de bando da banditoj, kiuj postulis la ŝlosilojn. Mi estis preta helpi lin, sed kelkaj fortaj kozakoj kaptis min kaj ligis min per siaj zonoj, dirante :

"Vi vidos, kiel ni traktas virojn kiuj ribelas kontraŭ la caro."

Ili trenis nin tra la stratoj. La loĝantoj eliris siajn domojn kun pano kaj salo²¹. Sonorilo komencis sonori. Subite oni kriis en la homamaso, ke la imperiestro atendas la malliberulojn sur la placo por ricevi ilian ĵuron de fideleco. La homamaso disvastiĝis sur la placo, kaj oni pelis ankaŭ nin tien.

Pugačov sidis en fotelo sur la perono de la domo de la komandanto. Li surhavis belan

²¹ Por bonvenigi ilin.

kozakan kaftanon ornamitan per galjonoj. Alta zebela ĉapo kun oraj kvastoj estis premita sur lian kapon ĝis ĝuste super liaj brilaj okuloj. Lia vizaĝo ŝajnis al mi nekonata. La plej maljunaj kozakoj ĉirkaŭis lin. Patro Gerasim, pala kaj tremetanta, staris apud la perono, krucon en la manoj, kaj ŝajnis silente petegi Pugaĉov ŝpari siajn vivojn. Sur la placo oni rapide konstruis pendumilon. Kiam ni proksimiĝis, la baŝkiroj forpelis la popolon kaj prezentis nin al Pugaĉov. La sonorado de la sonorilo tuj eksilentis. Ni estis en profunda silento.

"Kiu estas la komandanto?" demandis la trompisto.

Nia serĝento eliris el la amaso kaj montris Ivan Kuzmiĉ. Pugaĉov minace rigardis la maljunulon kaj diris al li:

"Kial vi kuraĝis kontraŭstari min, vian imperiestron?"

Malfortigite de la vundo, la komandanto kolektis siajn lastajn fortojn kaj respondis per firma voĉo:

"Vi ne estas mia imperiestro. Vi estas rabisto kaj trompisto, ĉu vi aŭdas?"

Pugaĉov kuntiris la brovojn kun sombra mieno kaj agitis blankan poŝtukon. Kelkaj kozakoj kaptis la maljunan kapitanon kaj trenis lin ĝis sub la pendumilo. Sur la transversa trabo sidis surĉevalo la mutilita baŝkiro, kiun ni volis esplordemandi la antaŭvesperon. En sia mano li tenis ŝnuron, kaj minuton poste mi vidis la povran Ivan Kuzmĉ levita en la aero. Tiam oni kondukis al Pugaĉov Ivan Ignatiĉ.

"Ĵuru fidelecon," diris al li Pugaĉov, "al via imperiestro Pjotr Feodoroviĉ."

"Vi ne estas nia imperiestro," respondis Ivan Ignatiĉ, ripetante la vortojn de la kapitano. "Vi estas rabisto kaj trompisto."

Pugaĉov denove movis sian poŝtukon, kaj la bona leŭtenantaŭ baldaŭ troviĝis flanke de sia maljuna ĉefo.

Nun estis mia vico. Mi kuraĝe rigardis Pugaĉov, pretigante min por ripeti la respondon de miaj bonaj kamaradoj. Tiam mi vidis je mia granda miro meze de la ribeluloj Ŝvabrin kun kalva tondita kapo kaj en kozaka kaftano. Li proksimiĝis al Pugaĉov kaj diris kelkajn vortojn en lian oreilon.

"Pendumu lin," diris Pugaĉov sen eĉ rigardi min. Oni metis pendbanton ĉirkaŭ mian kolon. Mi komencis diri en mi mem miajn preĝojn, direktante al Dio mian sinceran penton por ĉiuj miaj pekaj, kaj preĝante Lin savi ĉiujn, kiuj estis karaj al mia koro. Oni trenis min sub la pendumilon

"Estas nenio," ripetis al mi la ekzekutistoj, kaj eble ili vere deziris kuraĝigi min. Subite mi aŭdis laŭtan krimon:

"Haltu, malbenitoj!"

La ekzekutistoj haltis. Mi rigardis: Saveliĉ troviĝis sur la genuoj ĉe la piedoj de Pugaĉov.

"Bona patro," diris la povra maljunulo, "per kio utilis al vi la morto de familia filo? Liberigu lin. Por li oni donos al vi bonan elaçetan monsumon, kaj kiel ekzemplo, por timigi la aliajn, ordonu, ke oni pendumu, se necese, min, maljunulon."

Pugaĉov faris signon, kaj oni tuj malligis min.

"Nia patro pardonas vin," la ekzekutistoj diris al mi.

Mi ne povas diri, ke mi tiam ĝojis pri mia liberigo, sed tamen mi ne diras, ke mi bedaŭris tion. Miaj sentoj estis tro konfuzaj. Oni denove kondukis min al la trompisto kaj devigis min surgenuiĝi. Pugaĉov tendis al mi sian manon kovritan per dikaj vejnoj.

"Kisu lian manon, kisu lian manon," mi aŭdis diri ĉirkaŭ mi. Sed mi preferis la plej barbaran punon al tiu malnobla humiligo.

"Mia kara filo Pjotr Andrejiĉ," murmuris Saveliĉ, kiu staris malantaŭ mi, puŝante min, "ne estu tiel obstina. Kion tio kostas al vi? Sputu kaj kisu la manon de la ban..." Mi ne moviĝis. Pugaĉov lasis fali sian manon kun ironia rideto.

"Oni kredus, ke la nobela sinjoro frenezis pro ĝojo. Relevu lin."

Oni relevis min kaj lasis al mi mian liberecon. Mi komencis spekti la sekvon de tiu terura komedio.

La loĝantoj komencis ĵuri fidelecon al li. Ili proksimiĝis unu post la alia, kisis lian manon kaj poste salutis la trompiston. La soldatoj de la granizono ĉeestis la ceremonion. La tajloro de la regimento, armita per malakra tondilo, fortranĉis iliajn harplektaĵojn. Post kiam ili skuis sin, ili kisis la manon de Pugaĉov, kiu pardonis ilin kaj akceptis ilin en sian bandon. Tio daŭris proksimume tri horojn. Finfine Pugaĉov levis sin kaj malsupreniris la peronon akompanate de la maljunaj kozakoj. Oni kondukis al li lian blankan ĉevalon, ornamitan per riĉa harnesso. Du kozakoj prenis lin sub liaj brakoj kaj metis lin sur la selon. Al patro Gerasim li deklaris, ke li vespermanĝos ĉe li. En tiu momento resonis krio de virino. Kelkaj banditoj trenis sur la peronon Vasilisa Jegorovna tute nudan kaj kun malordigitaj haroj. Unu el ili jam trovis la tempon surmeti ŝian

virinjakon. La aliaj trenis plumlitaĵojn, kofrojn, ilaron por fari teon, tolaĵon kaj diversajn mas-trumadajn objektojn.

"Miaj infanoj," kriadis la povra maljunulino, "ŝparu min, bonaj patroj, konduku min al Ivan Kuzmiĉ."

Subite ŝi ĵetis rigardon sur la perndumilon kaj rekonis sian edzon.

"Bandtioj," ŝi ekkriis en kolero, "kion vi faris al li ? Ho, mia amata Ivan Kumiĉ, mia kuraĝa soldato ! Nek la prusaj sabroj, nek la turkaj kugloj tuŝis vin. Vi ne perdis la vivon sur la honora batalejo, sed vi pereis laŭ ordono de eskapinta krimulo."

"Silentigu tiun maljunan sorĉistinon !" kriis Pugaĉov.

Tiam juna kozako frapis ŝin per sia sabro, kaj ŝi falis morta sur la ŝtupojn de la perono. Pugaĉov foriris, kaj la popolo rapidis sekvi lin.

VIII. LA NEINVITITA GASTO

Neinvitita gasto estas
Pli malbona ol tartaro.
(*Proverbo*)

La placo estis dezerta. Mi restis staranta sur la sama loko kaj ne sukcesis ordigi miajn pensojn, konfuzitajn de teruraj emocioj.

La necerteco, en kiu mi troviĝis pri la sorto de Maria Ivanovna, turmentis min pli ol io ajn. Kie ŝi estis ? Kio el ŝi fariĝis ? Ĉu ŝi havis la tempon kaŝi ŝin ? Ĉu ŝia rifuĝejo estis sekura ? Maltrankviligita de tiuj konfuzaj pensoj, mi eniris la domon de la komandanto... Ĝi estis vida : la seĝoj, tabloj, kofroj kaj la vazaro estis rompigitaj. Ĉio estis detruita. Kurante mi grimpis supren laŭ la malgranda ŝtuparo, kiu kondukis al ŝia ĉambreto, kaj unuafoje mi penetris en la ĉambron de Maria Ivanovna. Mi vidis sian liton, renversitan de la banditoj, la ŝrankon kiu estis batrompita kaj prirabita. La noktolumo ankoraŭ brulis en la angulo de la ikonoj. Malgranda spegulo, kiu pendis kontraŭ la intervando, estis ŝparita.. Sed kie do estis la loĝantino de tiu paca knabina ĉelo ? Mi jam imagis ŝin inter la manoj de la banditoj... Mia koro ŝrumpis... Mi komencis amare plori kaj laŭte prononci la nomon de mia amatino... En tiu momento mi aŭdis leĝeran bruon, kaj rampante de malantaŭ la ŝranko, aperis Palaŝka, pala kaj tremetante.

"Aĥ, Pjotr Andrejiĉ," ŝi diris, kunfaldante la manojn, "kia tago, kiaj malfeliĉoj !"

"Kaj Maria Ivanovna ?" mi demandis, malpacience. "Kie estas Maria Ivanovna ?"

"La fraŭlino vivas," respondis Palaŝka. "Ŝi kaŝis sin ĉe Akulina Pamfilovna."

"Ĉe la popedzino ?" mi kriis, timigita. "Dio mia ! Pugaĉov estas vespermanĝonta tie..."

Mi rapide forlasis la ĉambron, troviĝis per unu salto sur la strato kaj rapide kuris ĉe la popon sen vidi aŭ senti ion ajn. Tie resonis krioj, ridoj kaj kantoj... Pugaĉov festis sian venkon kun siaj kamaradoj. Palaŝa kuris malantaŭ mi. Mi sendis ŝin sekrete serĉi Akulina Pamfilovna. Minutan poste la popedzino venis trovi min en la vestiblo kun malplena kalabasbotelo en la mano.

Pro la amo de Dio, kie estas Maria Ivanovna ?" mi demandis, neesprimeble konfuzita.

"Ŝi kuŝas, la povra etulino, ĉe mi en lito, tie, malantaŭ tiu vando," respondis la popedzino. "Aĥ, Pjotr Andrejiĉ, al ni preskaŭ okazis malfeliĉo, sed danke al Dio, ĉio bone pasis: Apenaŭ la krimulo sidiĝis ĉe la tablon, la etulino revekiĝis kaj komencis ĝemi... Mi kredis, ke mi mortas. Pugaĉov aŭdis tion.

"Sed kiu do tiel laŭte ĝemas en via domo, maljunulino ?" li demandis.

Mi tre mallaŭte salutis la rabiston kaj respondis :

"Tio estas mia nevinino, Sinjoro. Ŝi malsanas kaj jam du semajnojn kuŝas en lito."

"Kaj ĉu ŝi estas juna, via nevinino ?"

"Jes, Sinjoro, tre juna.."

"Tiam montru vian nevinon al mi, maljunulino."

Mi koro ŝrumpis, sed mi devis obei.

"Laŭ via ordono, Sinjoro : nur la knabino ne povas ellitiĝi kaj veni al vi."

"Tio ne gravas, maljunulino. Mi mem iros vidi ŝin."

"Kaj jen, la malbenito iris malantaŭ la vandon. Kaj kion vi pensas ? Li malfermas la kurtenon, rigardas per siaj okuloj de akcipitro, kaj jen... Dio savis nin. Vi kredas tion, se vi volas. Sed mia edzo kaj mi jam estis pretaj morti la morton de la martiroj. Feliĉe, ŝi, la kara infano, ne rekonis lin. Sinjoro Dio ! Tio estis bela tago ! Ve ! La povra Ivan Kuzmiĉ ! Kiu estis kredinta tion ?... Kaj Vasilisa Jegorovna ! Kaj Ivan Ignatiĉ ! Kion ili misfaris ? Sed vi ? Kial via vivo estis ŝparita ? Kaj kion vi diras pri Ŝvabrin ? Li igis tondi siajn tutajn harojn, kaj nun li estas ĉe ni, ĉi tie, kaj festas kun ili. Li estas ruza, tion oni devas rekoni. Kaj kiam mi parolis pri mia malsana nevinino, li rigardis min, kvazaŭ transpikante min per

tranciloj. Ŝi tamen ne perfidis min. Mi devas danki ŝin pro tio."

En tiu momento resonis la ebriaj krioj de la gastoj kaj la voĉo de patro Gerasim. La gastoj postulis vinon. La mastro vokis sian kompaninon. La popedzino rapidis al ili.

"Reiru hejmen, Pjotr Andrejiĉ," ŝi diris. "Nun oni ne bezonas vin. Ĉi tie baldaŭ estos nur ebruloj. Ve al vi, se vi falus inter iliajn krue-lajn manojn! Adiaŭ, Pjotr Andrejiĉ. Tio kio devos okazi, okazos. Mi esperas, ke Dio ne forlasos nin."

La popedzino foriris. Iomete trankviligite, mi iris al mia loĝejo. Pasante laŭlonge de la placo, mi vidis kelkajn baŝkirojn, kiuj interpretiĝis ĉirkaŭ la pendumilo kaj retiris la botojn de la kruroj de la pendumitoj. Mi apenaŭ povis reteni mian koleron, sentante la neutilecon de tia interveno. En la fortikaĵo cirkuladis la banditoj, kiuj prirabis la domojn de la oficiroj. Ĉie resonis la krioj de la ribeluloj dum la drinkula festo. Mi alvenis ĉe mi. Saveliĉ venis renkonte al mi sur la sojlo.

"Dio estu laŭdata!" li ekkriis, rimarkante min. "Mi demandis min, ĉu la banditoj denove arestis vin. Nu, mia filo Pjotr Andrejiĉ, ili ŝtelis ĉion ĉe ni: la vestaĵojn, la tolaĵojn, la aferojn, la vazaron, ili restigis nenion. Danke al Dio, ili lasis vin libera. Sed ĉu vi rekonis la atamanon²²?"

"Ne, mi ne rekonis lin. Kiu li do estas?"

"Kiel do, etulo? Ĉu vi jam forgesis la ebrulon, al kiu vi donis vian tulupon en la gastejo, vian bonan, tute novan leporan tulupon? Kaj li, la bruto, tute krakigis ĝin, surmetante ĝin!"

Mi estis senparola pro mirego. Efektive, la simileco de Pugaĉov kun mia gvidisto estis frapanta. Mi konstatis, ke Pugaĉov kaj li estis la sama viro, kaj nun mi komprenis, kial li pardonis min. Mi ne povis ne miri pri la stranga sekvo de la okazaĵoj. Infana tulupo donita al vagabondo savis min de la pendŝnuro, kaj drinkemulo, kiu vizitis la gastejojn, sieĝis la fortikaĵojn kaj skuis la Rusan imperion!

"Ĉu vi ne volas manĝi?" demandis Saveliĉ, konstanta en siaj kutimoj. "Hejme estas plu nenio, mi serĉos aliloke. Mi kuiras ion por vi."

Restinta sola, mi profundiĝis en miajn pensojn. Kion mi devis fari? Ĉu resti en la fortikaĵo, konkerita kaj detruita de la banditoj, aŭ sekvi ilian bandon, kio ne estis digna de oficiro? La devo postulis, ke mi aperu tie, kie

miaj servoj povus esti utilaj al mia patrio en la nunaj tre malfacilaj cirkonstancoj... Sed mia amo ordonis min resti proksime de Maria Ivanovna kaj esti ŝia defendanto kaj protektanto. Antaŭvidante ne pridubindan rapidan ŝanĝon en la cirkonstancoj, mi ne povis tamen ne tremi pensante pri la danĝeroj de mia situacio.

Miaj pensoj estis interrompitaj de la alveno de kozako, kiu alkuris por anonci al mi, "ke la granda imperiestro venigas min".

"Kie do li estas?" mi demandis, preta obei.

"En la domo de la komandanto," respondis la kozako. "Post la vespermango nia mastro prenis banon, kaj nun li ripozas. Jes, Via Nobelego, ĉio montras, ke li estas speciala persono: dum la vespermango, li manĝis du porkidojn, kaj en sia banujo li toleras tiel brulantan vaporon, ke Taras Kuroĉkin mem ne povis elteni tie la varmon kaj transdonis la balailon al Fomka Bikbajev, kaj estis necese verŝi multan akvon sur lin por ke li rekonsciĝu. Oni povas diri nenion kontraŭ tio: ĉiuj signoj estas evidentaj. Kaj en la banujo, li montris sur siaj brustoj siajn imperiestrajn signojn: sur unu brusto dukapan aglon, grandan kiel kvin-kopekan moneron, kaj sur la alia, sin mem."

Mi ne juĝis necese diskuti pri la opinio de la kozako, kaj ni iris kune al la domo de la komandanto. Mi provis antaŭe prezenti al mi mian interparoladon kun Pugaĉov, kaj mi provis diveni, kiel ĝi finiĝos. La leganto povas facile imagi, ke mi ne estis tute trankvila.

La krepusko jam komencis fali, kiam mi alvenis ĉe la domo de la komandanto. La pendumilo kun siaj viktimoj ŝajnis terure nigraj. La korpo de la povra komandantedzino ankoraŭ ĉiam kuŝis sur la perono, apud kiu du kozakoj gardostaris. La kozako kiu akompanis min, iris anonci min, kaj baldaŭ reveninte, li kondukis min en la ĉambron, kie la antaŭvesperon, mi diris adiaŭ al Maria Ivanovna.

Eksterordinara sceno prezentiĝis al mi. Ĉe la tablo, kovrita per tablotuko kaj ŝarĝita per du kalabasboteloj kaj glasoj, sidis Pugaĉov kaj dekduo da maljunaj kozakoj en multkoloraj ĉapoj kaj ĉemizoj, ekscititaj per la vino, kun ruĝaj vizaĝoj kaj brilaj okuloj. Inter ili troviĝis nek Ŝvabrin nek nia serĝento, la antaŭnelonge akceptitaj perfiduloj.

"Ha! Via Nobelego," diris Pugaĉov, vidante min. "Estu bonvena kaj faru al ni la gracon bonvoli sidiĝi."

Liaj partneroj kunŝoviĝis, kaj mi silentante sidiĝis ĉe la tablofino. Mia najbaro, juna sed

²² Ĉefo.ĉe la kozakoj

robusta kozako, versis por mi ordinaran vinon en glason, kiun mi ne tuŝis. Mi komencis scivoleme rigardi la grupon. Pugačov sidis sur la honora placo, la kubutojn sur la tablo, karesante sian nigran barbon per sia larĝa mano. La trajtoj de lia vizaĝo, regulaj kaj agrablaj, esprimis nenian sovaĝan. Li ofte turnis sin al viro de ĉirkaŭ kvindek jaroj, nomante lin jen princo, jen Timofejiĉ, kaj fojfoje donante al li la titolon onklon. Ĉiuj traktis sin kiel kamaradojn kaj donis nenian distingon titolon al sia ĉeĥo. La temo de la konversacio estis la matena atako, la sukceso de la ribelo kaj la estontaj agadoj. Ĉiuj parolis, esprimis sian opinion kaj libere diskutis kun Pugačov. Kaj dum tiu stranga interkonsiliĝo estis decidite tuj marŝi al Orenburgo : aŭdaca movo, kiu estis kronita per preskaŭ katastrofa sukceso. La marŝo tien estis fiksita por la morgaŭo.

"Nun, fratroj," diris Pugačov. Nun ni kantu kune kiel vesperpreĝon mian preferatan kanton. Komencu, Ĉumakov."

Mia najbaro ekkantis per leĝera, fajna voĉo la timtremigan kanton de la boattrenistoj, kaj ĉiuj reprenis la rekantaĵon :

*Ne faru bruon, bona verda kverkarbaro,
Ne min malhelpu pensi ĉiujn miajn pensojn,
Ĉar morgaŭ iri devas mi al la juĝejo,
Aperi antaŭ la juĝisto, nia caro.
Ankoraŭfoje li afable min demandas :
"Rakontu al mi, brava filo de kampulo,
Kun kiuj do vi ŝtelis, kaj kun kiuj rabis,?
Ĉu estis multaj tiuj viaj kamaradoj ?"
Mi diros tiam : "Kara ortoksa caro,
Al vi volonte diros mi la tutan veron :
Kvar kamaradojn ĉiam havis mi entute:
La nokto estis la unua kamarado,
La dua estis mia ŝtala tranĉileto
La tria estis mia bona ĉevalino,
La kvara estis mia tre tendita arko.
Senditoj miaj estis miaj akraj sagoj."
Kaj tiam diros nia ortoksa caro :
"Honoro estu al vi, brava kampulfilo,
Vi sciis ŝteli kaj respondi al mi bone.
Mi tial donos al v kiel rekompencan,
Belegan domon en la mezo de la kampoj :
Du altajn kverkajn fostojn kun traversa
trabo."*

Ne eblas priskribi kiun impreson faris sur min tiu simpla, popola kanto pri pendumilo, kantata de viroj kiuj estis destinotaj al ĝi. Iliaj minacaj vizaĝoj, iliaj harmoniaj voĉoj, la timtremiga

esprimo kiun ili donis al la paroloj, ĉio skuis min per profeteca timo.

Ĉiuj invititoj drinkis ankoraŭ unu glason kaj adiaŭis Pugačov. Mi volis sekvi ilin, sed Pugačov retenis min, dirante :

"Restu sidanta. Mi volas paroli al vi."

Ni do restis ambaŭ sen atestantoj.

Nia silento daŭris kelkajn minutojn. Pugačov fojfoje fikse rigardis min, okulumante kun miriga esprimo de maliceco kaj ironio. Finfine li ekridegis kun tiel sincera gajeco, ke mi ankaŭ, rigardante lin, ekridis, mem ne sciante kial.

"Nu, Via Nobelego," li diris al mi. "Ĉu vi ektimis, kiam miaj viroj metis la ŝnuron ĉirkaŭ vian kolon? Konfesu tion. Mi imagas, ke la tero tremetis sub viaj piedoj. Kaj vi balanĉiĝus sub la trabo, se ne estus estinta tie via servisto. Mi tuj rekonis la maljunan strigon. Ĉu vi estus pensinta, ke la viro kiu kondukis vin al la gastejo, estis la granda imperiestro mem ? (Tie ĉi li alprenis dignan kaj misteran sintenon.) Vi forte kulpas antaŭ mi," li daŭrigis, "sed mi pardonis vin pro via bonkoreco, ĉar vi faris al mi grandan servon, kiam mi estis devigita kaŝi min al miaj malamikoj. Vi vidis ankoraŭ aliajn aferojn ! Mi rekompencos vin ankoraŭ pli malavare, kiam mi estos rekuperinta mian laŭleĝan potencon. Ĉu vi promesos al mi diligente servi min ?"

La demando de la bandito kaj lia aŭdaco ŝajnis al mi tiel groteskaj, ke mi ne povis retenigi min rideti.

"Kial vi ridetas ?" li demandis min, kuntirante la brovojn. Ĉu vi ne kredas, ke mi estas la granda imperiestro Petro la III-a ? Sincere respondu min."

Mi konfuziĝis. Mi ne povis rekoni imperiestron en tiu vagabondo. Tio ŝajnis al mi nepardonebla malkuraĝeco. Sed trakti lin en lia ĉeesto kiel trompiston, signifis kondamni min al certa morto. Kaj tion, kion mi pretis fari sub la pendumilo antaŭ la okuloj de la tuta popolo kaj en la unua febro de mia indigneco, ŝajnis al mi neutila braveco. Pugačov atendis mian respondon kun sombra mieno. Finfine – kaj ankoraŭ nun mi memoras tiun momenton kun kontenteco – la devosento venkis en mi mian homan malfortecon. Mi respondis al Pugačov :

"Aŭskultu, mi diras al vi la tutan veron. Juĝu mem, ĉu mi povas rekoni en vi imperiestron. Petron la III-an. Vi estas prudenta homo, kaj vi ceerte vidis, ĉu mi ruzas."

"Sed kiu mi do estas laŭ vi ?"

"Nur Dio scias tion. Sed kiu ajn vi estas, vi ludas danĝeran ludon."

Pugačov ĵetis sur min rapidan rigardon.

"Vi do ne kredas, ke mi estas la imperiestro Pjotr Feodoroviĉ ? Bone, bone. Sed ĉu ne la aŭdaculo ĉiam sukcesas ? Ĉu antaŭe ne regis Griŝka Otrepjev²³ ? Pensu, kion vi volas, sed ne malproksimiĝu de mi. Kion la resto povus fari al vi ? Oni povas esti iu grava sen esti popo. Servu min lojale kaj fidele, kaj mi faros el vi eĉ marŝalon aŭ princon. Kion vi pensas pri tio ?"

"Ne," mi respondis decidema. Mi naskiĝis nobela kaj mi ĵuris fidelecon al la Imperiestro : mi ne povas servi vin. Se vi vere volas fari al mi bonon, permesu min iri al Orenburgo."

Pugačov meditis.

"Kaj se mi lasos vin foriri," li demandis, "ĉu vi promesos al mi almenaŭ ne servi kontraŭ mi ?"

"Kiel mi povus promesi tion al vi ?" mi respondis. "Vi mem tute bone scias, ke tio ne dependas de mi. Se oni ordonos al mi marŝi kontraŭ vi, mi marŝos : kion alian mi povus fari ? Vi mem estas nun ĉefo, kaj vi postulas, ke viaj viroj obeu vin. Kiel mi aspektos, kiam oni bezonos min ? Mia vivo estas en via povo : se vi liberigas min, dankon; se vi punas min, Dio estu via juĝisto. Mi diris al vi la veron."

Mia sincereco mirigis Pugačov.

"Tiel estu," li diris, frapante min sur ŝultron. "Ĉu oni punas, ĉu oni pardonas, oni devas fari tion bone. Foriri al la kvar ventoj kaj faru kion vi volos. Venu adiaŭ min morgaŭ, sed nun enlitiĝu. Kio koncernas min, mi estas tre laca."

Mi forlasis Pugačov kaj iris sur la straton. La nokto estis trankvila kaj frostis. La luno kaj la steloj brilis, prilumante la placon kaj la pendumilon. En la fortikaĵo ĉio estis trankvila kaj malluma. Nur en la kabareto brulis lumo kaj resonis la krioj de malfruaj gastoj. Mi rigardis la domon de la popo. La fenestrokovriloj kaj la pordo estis fermitaj.

²³ Ivan la IV-a la Terura (1533-1584) postlasis du filojn : Feodor (caro de 1584-1598), kiu mortis sen infanoj, kaj Dmitri, kiu estis murdita en 1591. Tial Boris Gudunov, bofrato de Feodor estis elektita caro (1598-1605). Ĉirkaŭ 1600 disvastiĝis la famo, ke Dmitri ankoraŭ vivas. Verŝajne temis pri la forkurinta monaĥo Gregorij Otrepjev, kiu estis sanktoleita caro en 1605. Iom poste li estas murdita. Tiam oni elektis kiel caron Miĥajil Romanov, pranevo de la unua edzino de Ivan la IV-a, Anastasia. Li fondis la dinastion Romanov.

Mi alvenis ĉe mi kaj trovis Saveliĉ, kiu estis maltrankvila pri mia foresto. La novaĵo de mia liberigo igis lin tre feliĉa.

"Gloro estu al Vi, Sinjoro !" li diris kruco-signante sin. "Ĉe la tagiĝo ni forlasos la fortikaĵon kaj ni iros rekte antaŭ ni. Mi igis kuirion por vi, mia etulo, kaj nun enlitiĝu kaj dormu ĝis la mateno, kiel kiam vi estis ĉe via patrino."

IX. LA SEPARO

Dolĉa estis la renkonto,
Mia belulin', kun vi.
Trista estis la separo,
Kvazaŭ l' vivon perdis mi..
(Heraskov)

Mi estis vekita tre frue per la tamburo. Mi iris al la loko de la kolektiĝo. Tie jam formiĝis la trupoj de Pugačov ĉirkaŭ la pendumilo, de kiu pendis ankoraŭ la viktimoj de la antaŭa tago. La kozakoj sidis sur siaj ĉevaloj, la soldatoj estis armitaj. La flagoj estis malfalditaj. Kelkaj kanonoj, inter kiuj mi rekonis la nian, estis lokitaj sur la militirajn afustojn. Ankaŭ ĉiuj loĝantoj troviĝis tie, atendante la trompiston. Apud la perono de la komandanta domo kozako tenis la bridon de tre bela blanka ĉevalo de kirgiza raso. Per la okuloj mi ŝercis la korpon de la komandantedzino. Ĝi estis trenita iomete flanken kaj kovrita per tuko. Finfine Pugačov venis el al vestiblo. Ĉiuj demetis siajn ĉapojn. Pugačov haltis sur la perono kaj salutis ĉiujn. Unu el la maljunuloj donis al li sakon plenan je kupraj moneroj, kaj li komencis ĵeti ilin per manplenoj. Kriante la popolo rapidis preni ilin de la grundo, kaj tio ŝajne ne okazis sen rompitaĵoj kaj brakoj. Pugačov estis ĉirkaŭita de siaj precipaj komplicoj. Inter ili estis Ŝvabrin. Niaj rigardoj kruciĝis : en la mia li povis legi malestimon, kaj li forturnis sin kun esprimo de malamo kaj ironio. Rimarkante min en la homamaso, Pugačov faris al mi signon per la kapo kaj vokis min al si.

"Aŭskultu," li diris, "rapide foriri al Orenburg kaj diru de mi al la guberniestro kaj ĉiuj generaloj, ke ili povas atendi min post unu semajno. Konsilu ilin akcepti min kun la amo kaj la obo de infanoj, se ne, ili ne eskapos al severa puno. Bonan vojaĝon, Via Nobelego."

Post tio li turnis sin al la popolo kaj diris, montrante Ŝvabrin :

"Jen, miaj infanoj, via nova komandanto. Obeu lin en ĉio. Li respondecas pri vi kaj la fortikaĵo."

Mi aŭdis tiujn vortojn kun timo : Ŝvabrin estis nomumita ĉefo de la fortikaĵo. Maria Ivanovna estis do restonta inter liaj manoj ! Dio mia, kio okazos al ŝi ? Pugaĉov mal-supreniris de la perono. Oni alkondukis lian ĉevalon. Lerte li saltis sur ĝin sen atendi la kozakojn kiuj volis helpi lin.

En tiu momento mi vidis mian Saveliĉ veni el la homamaso . Li proksimiĝis al Pugaĉov kaj transdonis al li paperfolion. Mi ne povis imagi, kion tio signifas.

"Kio estas ?" demandis Pugaĉov kun grava mieno.

"Legu, kaj vi vidos," respondis Saveliĉ.

Pugaĉov prenis la paperon kaj longe ekzamenis ĝin kun grava mieno.

"Kial do, diable, vi skribas tiel klare ?" li finfine diris. "Niaj klaraj okuloj povas nenion deĉifri. Kie estas mia unua sekretario ?"

Junulo en uniformo de korporalo rapide kuris al Pugaĉov.

"Legu tion laŭtvoĉe," li diris, donante al li la paperon.

Mi eksterordinare deziris ekscii, kion mia mentoro juĝis bona skribi al Pugaĉov. La unua sekretario komencis klare literumi tion, kio sekvas :

"Du hejmvestoj, unu el kotono, la alia el striita silko : ses rubloj."

"Kio tio signifas ?" demandis Pugaĉov, kuntirante la brovojn.

"Bonvolu ordoni, ke oni daŭrigu la legadon," trankvile respondis Saveliĉ.

La unua sekretario daŭrigis.

"Unu uniformo el verda lino : sep rubloj. Du pantalonoj el blanka lino : kvin rubloj. Dekduo da ĉemizoj en holanda tolo kun manumoj: dek rubloj. Provizokorbo kun teservico: du rubloj kaj duono..."

"Kia historio!" interrompis Pugaĉov. "Ĉu mi okupiĝu pri provizokorboj kaj pantalonoj kun manumoj?"

Saveliĉ tusetis kaj komencis ekspliki.

"Temas, kiel vi povas vidi, bona patro, pri la inventaro de mia mastro, ŝtelitaj de la banditoj..."

"De kiuj banditoj ?" demandis Pugaĉov en minaca tono.

"Pardonu, mia lango perfidis min," respondis Saveliĉ. "Ne temas pri banditoj, sed pri viaj viroj, kiuj bone traserĉis la domojn kaj ŝtelis la havaĵon de mia mastro. Ne koleriĝu : eĉ ĉevalo

sur kvar piedoj povas stumbli. Bonvolu ordoni, ke oni finlegu la legadon."

"Finlegu la legadon," diris Pugaĉov.

La sekretario daŭrigis :

"Unu hinda litkovrilo, unu piedkovrilo el tafto plenigita per kotono : kvar rubloj. Unu mantelo el renarda pelto, kovrita per skarлата patino : kvardek rubloj. Unu peltojako el lepóra pelto, donita al Via Graco en gastejo: dek kvin rubloj."

"Kio ankoraŭ ?" ekkriis Pugaĉov kun fajre-rantaj okuloj.

Mi konfesas, ke mi iomete timis pro mia povra mentoro. Li estis preta denove doni eksplikojn, sed Pugaĉov interrompis lin:

"Kiel vi kuraĝis veni tedi min per tiaj stultaj-ĵoj?" li ekkriis, kaptante la paperon el la manoj de lia sekretario kaj ĵetante ĝin al la kapo de Saveliĉ.

"Maljuna idioto! Oni kaptis ilin. Kia malfeliĉo por vi ! Vi devus, maljuna strigo, preĝi al Dio vian tutan vivon por mi kaj miaj soldatoj, tial ke vi ne estis pendumitaj, vi kaj via mastro ĉi tie kun tiuj ribeluloj... Leporpelta mantelo ! Mi faros el vi leporpeltan mantelon ! Mi ordonos al miaj viroj senhaŭtigi vin viva, por fari peltmantelon el via haŭto !"

"Kiel vi volas," respondis Saveliĉ, "sed mi estas nur servutulo, kaj mi devas respondeci pri la posedaĵoj de mia mastro."

Evidente Pugaĉov tiam ekhavis atakon de grandanimeco. Li deturnis sin kaj foriris sen diri ion pli. Ŝvabrin kaj la maljunuloj sekvis lin. La bando eliris la fortikaĵon en bona ordo. La popolo akompanis Pugaĉov. Mi restis sola sur la placo kun Saveliĉ. Mia mentoro tenis en la manoj la inventaron, ekzamenante ĝin profunde elrevigita.

Vidante mian bonan akordon kun Pugaĉov, li estis kredinta, povi profiti de ĝi, sed lia bona intenco havis nenian sukceson. Mi pretis skoldi lin pro lia troa diligenteco, sed mi ne povis reteni mian ridon.

"Ridu nur, mia mastro," respondis Saveliĉ. "Ridu nur, sed kiam ni devos reordigi nian mastrumadon, oni vidos, ĉu vi ankoraŭ ridos."

Mi rapidis al la popo, por viziti Maria Ivanovna. La popedzino ricevis min per malĝojiga novaĵo. Dum la nokto Maria Ivanovna ekhavis alton febron. Ŝi kuŝis senkonscia en sia lito kaj deliris. La popedzino kondukis min en ŝian ĉambron. Mi mallaŭte proksimiĝis al ŝia lito. La ŝanĝo de ŝia vizaĝo timigis min. La malsanulino ne rekonis min. Mi longe staris ĉe ŝi, sen aŭskulti patron Gerasim nek lian bonan

edzinon, kiuj evidente provis konsoli min. Sombraj pensoj konfuzis min. La situacio de la povra, sendefenda orfino, forlasita meze de kruelelaj ribeluloj, kaj mia propra senpoveco timigis min. Ŝvabrin pli ol iu ajn turmentis mian imagon. Investita de potenco far la trompisto, mastro de la fortikaĵo, kie restiads la povra malfeliculino, objekto de lia malamo, li povis fari ion ajn al ŝi. Kion mi devis fari? Kiel helpi ŝin? Kiel liberigi ŝin el la manoj de la krimulo? Unu sola rimedo restis al mi: mi decidis tuj riri al Orenburgo por rapidigi la liberigon de la fortikaĵo Bjelogorsk kaj atribui mem al tio per ĉiuj miaj fortoj. Mi diris adiaŭ al la popo kaj al Akulina Pamfilovna, varme konfidante al ili tiun kiun mi konsideris kiel mian edzinon. Mi prenis la manon de la povra knabino kaj kisis ĝin., aspergante ĝin per miaj larmoj.

"Adiaŭ, Pjotr Andrejiĉ," diris al mi la popedzino. "Mi esperas, ke ni revidos nin en pli bona tempo. Ne forgesu nin kaj ofte skribu al ni. La povra Maria Ivanovna havas nun nek konsolon, nek protekton escepte de vi."

Sur la placo, mi haltis momenton. Mi rigardis la pendumilon, kliniĝis antaŭ ĝi kaj forlasis la fortikaĵon, sekvante la vojon al Orenburgo en la kompanio de Saveliĉ, kiu ne foriris de mia flanko.

Dum mi, marŝante, pripensis nian situacion, mi aŭdis malantaŭ mi galopantan ĉevalon. Mi turnis min: kozako, kiu venis de la fortikaĵo, galopis al ni, tenante ĉe la brido baŝkiran ĉevalon kaj signante min de fore. Mi haltis kaj baldaŭ rekonis nian antaŭan serĝenton. Alveninte proksime al ni, li saltis de la ĉevalo kaj diris al mi, donante al mi la bridon de la alia ĉevalo:

"Via Nobeleco, la imperiestro donacas al vi ĉevalon kaj peltaĵon el sia vestokesto (de la selo pendis ŝafpeltaĵo).

"Kaj cetere," li daŭris balbutante, "li donacas al vi duonrublon... Sed mi perdis ĝin survoje. Estu bona, kaj pardonu min."

Saveliĉ rigardis lin de flanke kaj diris:

"Ĉu li perdis ĝin survoje? Sed kio do tintas sub via ĉemizo, senkonscienca homo?"

"Kio tintas sub mia ĉemizo?" respondis la serĝento, sen konfuziĝi. "Nu, mia bravulo, tio ne estas mono, sed ornamaĵo de mia ĉemizo."

"Estas bone," mi diris, finante la disputon. "Danku de mi tiun kiu sendis vin, kaj, kio koncernas la duonrublon, provu trovi ĝin rerajdante kaj gardu ĝin por trinki guton."

"Multan dankon, Via Nobeleco," li respondis, turnante sian ĉevalon. "Mi preĝos al Dio por vi mian tutan vivon."

Post tiuj vortoj li regalopis, tenante unu manon sub sia ĉemizo, kaj minuton poste li malaperis.

Mi surmetis la peltaĵon, surĉevaliĝis kaj helpis Saveliĉ grmpi malantaŭ min.

"Nun Sinjoro," diris la maljunulo, "vi vidas, ke mi pravis donante mian postulon al la trompisto: li havis konscienciproĉojn. Malgraŭ ke la maldika baŝkira ĉevalo kaj la ŝafpeltaĵo ne valoras la duonon de tio kion vi donis al li. Nu, ĉio povas utili. De malbona kuniklo oni ĉiam povas deŝiri felon."

X. SIEĜO DE LA URBO

Okupante ĉiujn montojn kaj herbejojn,
De altaĵo aĝle rigardante l' urbon.
Li, post la tendaro, faris kanonejon,
Kaj kaŝante tie la kanonojn, nokte
Trenigis ilin li proksime de la urbo.
(Heraskov)

Proksimiĝante al la urbo, ni rimarkis grupojn da punlaboristoj kun razitaj kapoj kaj vizaĝoj kiuj estis misformitaj per la pinĉteniloj de torturisto. Ili laboris ĉe la remparoj sub la gardo de la invalidoj de la garnizonoj. Unuj forigis en ĉaroj la malpuraĵojn kiuj plenigis la fosojn, aliaj fosis en la tero per ŝpatoj. Sur la remparo masonistoj portis brikojn kaj konstruis muron. Apud la pordegoj gardistoj haltigis nin kaj demandis niajn pasportojn. Tuj kiam la serĝento eksciis, ke mi venis de la fortikaĵo de Bjelogorsk, li kondukis min al la domo de la generalo.

Mi trovis lin en la ĝardeno. Li ekzamenis siajn pomarbojn, nudigitajn de la aŭtunaj ventoj, kaj, helpate de maljuna ĝardenisto, li zorgeme envolvis ilin per varma pajlo. Lia vizaĝo respiris trankvilecon, sanon kaj bonvolecon. Li ĝojis revidi min kaj komencis esplordemandi min pri la teruraj eventoj; kies atestanto mi estis. Mi rakontis ĉio al li. La maljunulo atente aŭskultis min, kaj intertempe daŭre fortranĉis la sekajn branĉojn.

"Povra Mironov," li diris, kiam mi finis mian historion. "Domaĝe: li estis bona oficiro. Kaj Sinjorino Mironova estis bona virino, kaj kia artistino por saligi ĉampinjonojn. Kaj Maŝa, la filino de la kapitano?"

Mi respondis, ke ŝi restis en la fortikaĵo inter la manoj de la popedzino.

"Aj ! Aj ! Aj !" rimarkis la generalo. "Malbone, tre malbone ! Oni tute ne povas fidi la disciplinon de la ŝtelistoj. Kio fariĝos el la povra knabino ?"

Mi respondis, ke la fortikaĵo de Bjelogorsk ne troviĝas tre malproksime, kaj mi esperas, ke Lia Ekscelenco baldaŭ sendos tien armeon por liberigi la povrajn loĝantojn. Nekredante la generalo skuis la kapon.

"Ni vidos, ni vidos," li diris. "Ni havos ankorau tempon paroli pri tio. Venu trinki teon kun mi. Vi povos doni informojn pri la maltaŭgulo Pugačov kaj pri lia armeo. Nun ripozu intertempe."

Mi iris al la apartamento kiu estis rezervita al mi, kaj kie Saveliĉ jam instalis sin, kaj mi senpacience atendis la fiksitan horon. La leganto facile imagos, ke mi ne preterlasis la okazon aperi en la konsilio, kiu devis havi tiom da influo sur mia sorto. Je la interkonsentita horo, mi jam estis ĉe la generalo.

Mi trovis ĉe li unu el la municipaj oficistoj, direktoro de la dogano, tiom mi memoros, dika kaj ruĝa maljunulo en brokata kaftano. Li komencis meti demandojn al mi pri la sorto de Ivan Kuzmiĉ, kiun li nomis sia amiko, kaj, ridetante, li interrompis mian rakonton per demandoj aŭ moralaj rimarkoj, kiuj, se ili ne malkaŝis en li viron spertan en militistaj aferoj, almenaŭ malkovris liajn sagacecon kaj naturan menson. Intertempe alvenis la aliaj gastoj. Kiam ĉiuj estis sidiĝintaj kaj ricevintaj tason da teo, la generalo eksplikis, en kio konsistas la afero.

"Nun, Sinjoroj," li daŭrigis, "konvenas al ni decidi, kiel ni devas agi kontraŭ la ribeluloj : ofensive aŭ defensiva. Ĉiu el la du procedoj havas siajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn. La ofensivo permesas pli da espero rapide detruiri la malamikon. La defensivo estas pli certa kaj malpli danĝera... Tial do ni nun kolektos la voĉojn laŭ la leĝa sinsekvo, tio estas, komentante per la plej juna laŭgrade inter ni. Sinjoro leŭtenanto," li daŭrigis, turnante sin al mi, bonvolu ekspliki al ni vian vidpunkton."

Mi leviĝis kaj, priskribinte per kelkaj vortoj kiel Pugačov kaj lia bando procedis en Bjelogorsk, mi insistis sur la fakton, ke la trompisto disponis pri neniuj rimedoj rezisti kontraŭ regulan armeon, kaj konkludis, ke ofensivo estas la plej taŭga taktiko.

Mia konsilo estis akceptita de la funkciuloj kun evidenta malbona graco. Il vidis en mi la temerarecon kaj aŭdacecon de juna oficiro. Murmuroj leviĝis, kaj mi klare distingis la

vorton 'flavbekulo', prononcita duonlaŭte de unu el ili. La generalo turnis sin al mi kaj diris ridetante :

"Sinjoro leŭtenanto, la unuaj voĉoj dum la militistaj konsiloj ĝenerale favoras la ofensivon. Tio esta regulo. Nun ni daŭrigos kolekti la voĉojn. Sinjoro Kolegia Konsilisto, mi petas vin, eldiri vian opinion."

La maljunulo en brokarda kaftano rapidis malpleniĝi sian trian tason da teo kun iom da rumo kaj respondis al la generalo :

"Mi pensas, Via Ekscelenco, ke oni devas agi nek ofensive nek defensiva."

"Kiel do, Sinjoro Kolegia Konsilisto?" demandis la generalo, mirigita. "La taktiko ne antaŭvidas alian rimedon : ĉiu militista movo estas defensiva aŭ ofensiva.."

"Via Ekscelencon procedu per subaĉetado."

"Hej, hej, via konsilo estas tute racia. La procedo per subaĉetado estas tute permesita de la taktiko, kaj ni profitos de via konsilo. Por la kapo de la maltaŭgulo oni povus promesi sesdekon aŭ centon da rubloj el niaj sekretaj fondusoj..."

"Tiam," diris la direktoro de la dogano, "mi estu kirgiza ŝafo kaj ne kolegia konsilisto, se tiuj rabistoj ne kondukos al ni sian atamanon kun ligitaj manoj kaj piedoj."

"Ni repensas kaj reparolos pri tio," respondis la generalo. "Tamen ĉiakaze konvenas ankaŭ fari militistajn aranĝojn. Sinjoroj, donu vian voĉon laŭ la leĝa sinsekvo."

Ĉiuj aliaj opinioj aperis oponi la mian. Ĉiuj funkciuloj diris, ke oni ne povas kalkuli je la armeo, ke oni ne povis esti certa pri la sukceso, ke oni devas esti singarda, kaj tiel plu. Ĉiuj opiniis, ke estus pli racia resti sub la protekto de la kanonoj malantaŭ solida ŝtona muro, ol provi la ŝancon de la armiloj en malplena kamparo. Aŭskultinte ĉiujn opiniojn, la generalo finfine skuis la cindron de sa pipo kaj prononcis la sekvantan paroladon :

"Sinjoroj, mi devas respondi ke, miaflanke mi tute konsentas kun la sinjoro leŭtenanto, ĉar tiu opinio tute baziĝas sur sana taktiko, kiu preskaŭ ĉiam preferas la ofensivajn movojn al la defensivaj."

Tiam li haltis kaj komencis replenigi sian pipon per tabako. Mia sinamo triumfis. Fiere mi rigardis la funkciulojn, kiuj flustris inter si kun malkontentaj kaj malkvietaj mienoj.

"Tamen, Sinjoroj, li daŭrigis, elblovante kun profunda suspiro kolonon da densa fumo," mi ne kuraĝas preni sur min tiel grandan respondecon, kiam temas pri la sekureco de la pro-

vincoj, kiujn konfidis al mi Ŝia Tre Indulga Imperiestra Moŝto. Tial mi aliĝas al la plimulto de la voĉoj, ke la plej racia kaj la malplej danĝera sinteno estos atendi la sieĝon en la urbo kaj repuŝi la atakojn de la malamiko per la forto de la artilerio kaj, se eblas, per eliroj."

La funkciuloj siavice rigardis min kun ironio. La konsilio disiris. Mi ne povis ne badaŭri la malfortecon de la honorinda militisto, kiu, kontraŭ sia propra konvinko, decidis sekvi la opiniojn de nekompetentaj kaj nespertaj viroj.

Kelkaj tagoj post tiu fama konsilio, ni jam eksciis, ke Pugaĉov proksimiĝis al Orenburgo. Starante sur la ŝtona remparo, mi vidis la ribelulojn proksimiĝi. Ŝajnis al mi, ke ilia nombro dekobliĝis ekde la lasta atako, kies atestanto mi estis. Cetere ili kuntrenis la artilerion, kaptitan de Pugaĉov en la malgrandaj fortikaĵoj, kiujn ili jam konkeris. Pensante pri la decido de la konsilio, mi antaŭvidis longan enfermadon inter la muroj de Orenburgo, kaj mi preskaŭ ploris pro bedaŭro.

Mi ne priskribos la sieĝon de Orenburgo, kiu apartenas al la historio kaj ne al familiaj rakontoj. Mi mallonge diras, ke tiu sieĝo, pro la nesingardeco de la loka komandanto, estis katastrofo por la loĝantoj, kiuj suferis pro malsato kaj ĉiaj specoj de mizero. Estas facile imagi, ke la vivo en Orenburgo estis tute netolerebla. Deprimataj ĉiuj atendis la decidon de la sorto. Ĉiuj plendis pri la multekosteco de la vivo, kiu estis vere terure alta. La loĝantoj kutimiĝis al la kanonkugloj kiuj falis sur siajn domojn. Eĉ la atakoj de Pugaĉov ne plu interesis ilin.

Dume mi morte enuis. La tempo malrapide pasis. Mi ne ricevis leterojn de la fortikaĵo de Bjelogorsk. Ĉiuj vojoj estis tranĉitaj. Mia disiĝo de Maria Ivanovna fariĝis netolerebla por mi. La necerteco de ŝia sorto turmentis min. Mia sola distraĵo estis rajdado sur mia ĉevalo. Danke al Pugaĉov, mi posedis bonan ĉevalon, kun kiu mi dividis mian magran porcion kaj sur kiu mi ĉiutage elrajdis la urbon kun la kavalerio por inciteti la kavalirojn de Pugaĉov. Dum tiuj bataletoj la banditoj, bone nutritaj, ebriaj kaj rajdantoj sur bonaj ĉevaloj, ĝenerale estis pli fortaj ol ni. La malgranda kavalerio de la urbo ne povis superi ilin. Fojfoje ankaŭ nia malsata infanterio eliris, sed la dika tavolo da neĝo malhelpis ĝin sukcese agi kontraŭ la disvastigitaj kavaliroj de la malamiko. La artilerio malofte tondris de la remparo, kaj en la aperta kamparo ĝi sinkis en la neĝo kaj ne plu povis antaŭeniri pro la

elĉerpiteco de la ĉevaloj. Tiel aspektis nia militista agado ! Jen kion la funkciuloj de Orenburgo nomis singlardeco kaj racieco !

Unufoje ni sukcesis dispeli kaj fuĝigi sufiĉe grandan grupon da ribeluloj. Mi atakis kozakon, kiu restis post siaj kamaradoj. Mi jam pretigis min frapi lin per mia turka sabro, kiam li subite deprenis sian ĉapon kaj ekkriis :

"Saluton Pjotr Andrejiĉ ! Kiel vi fartas ?"

Mi rigardis lin kaj rekonis nian antaŭan serĝenton. Mi multe ĝojis revidi lin.

"Saluton, Maksimiĉ," mi diris al li . "Ĉu vi jam delonge forlasis Bjelogorsk ?"

"Ne, nur hieraŭ mi venis ĉi tien. Mi havas leteron por vi."

"Kie ĝi estas ?" mi ekkriis malpacience.

"Ĉe mi," Maksimiĉ respondis, metis manon inter sian ĉemizon kaj sian bruston. "Mi promesis al Palaŝa doni ĝin al vi ĉe la unua okazo."

Tiam li tendis al mi falditan paperon, kaj tuj fuĝis en galopo. Mi malfaldis la leteron, kaj tremetante mi legis la sekvajn liniojn :

Kara Pjotr Andrejiĉ,

Dio permesis, ke mi perdis mian patron kaj mian patrinon: mi havas sur la tero plu nek gepatrojn nek protektantojn. Mi turniĝas al vi ĉar vi ĉiam deziris fari al mi bonon. Mi preĝas Dion, por ke tiu ĉi letero iel ajn atingu vin. Maksimiĉ promesis min transdoni ĝin al vi. Palaŝa ankaŭ aŭdis diri Maksimiĉ, ke li ofte vidas vin de malproksime dum viaj atakeliroj, kaj ke vi tute ne atentis pri via sekureco kaj ke vi ne pensas pri tiuj kiuj plorante preĝas por vi al Dio. Mi longe estis malsana, kaj kiam mi estis resaniĝinta, Aleksej Ivanoviĉ, kiu nun ĉi tie komandas anstataŭ mia patro, devigis patron Gerasim liveri min al li, minacante lin per Pugaĉov. Mi vivas gardata en nia domo. Aleksej Ivanoviĉ devigas min edziniĝi al li .Li diras, ke li savis al mi la vivon, subtenante la mensogon de Akulina Pamfilovna, kiu diris al la imperiestro, ke mi estas ŝia nevino. Sed mi preferas morti, ol fariĝi la edzino de viro kia estas Aleksej Ivanoviĉ. Li traktis min tre kruele kaj minacas konduki min al la tendaro de la banditoj, se mi ne ŝanĝos min sintenon kontraŭ li kaj konsentos, ka li diras, ke mi suferos tiam la saman sorton kiun suferis Lizaveta Ĥarlova. Mi demandis al Aleksej Ivanoviĉ doni al mi tempon por pripensi tion. Li konsentis atendi ankoraŭ tri tagoj, kaj se post tiuj tri tagoj mi ankoraŭ rufizas edziniĝi al li, li ne plu kompatos min. Bona Pjotr Andrejiĉ, vi estas mia

sola protektanto. Intervenu por mi. Demandu la generalon kaj ĉiujn komandantojn sendi kiel eble plej rapide helpon al mi, kaj ankaŭ vi, venu, se vi povos. Mi restas via povra kaj humila orfino. Maria Mironova.

Leginte tiun leteron, mi preskaŭ freneziĝis. Mi regalopis al la urbo, senkompatate spronante mian povran ĉevalon. Survoje mi provis elpensi planon por liberigi la povran knabinon, sed ne sukcesis. Alveninte ĉe la generalo, mi eniris ĉe lin kiel ventekblovo.

La generalo marŝis tien kaj reen tra ŝia ĉambro, fumante sian marŝaŭman pipon. Ekvidante min, li haltis. Mia aspekto sendube mirigis lin. Zorgema li informiĝis pri la kaŭzo de mia subita alveno.

"Via Ekscelenco," mi diris al li, "mi venas al vi kiel al mia propra patro : pro la amo de Dio, ne malakceptu mian peton. Temas pri la feliĉeco de mia tuta vivo."

"Pri kio temas, mia filo ?" demandis min la maljunulo. "Kion do mi povas fari por vi ? Parolu !"

"Via Ekscelenco, ordonu min preni grupeton da soldatoj kaj kvindekono da kozakoj, kaj sendu min purigi la fortikaĝon de Bjelogorsk."

La generalo fikse rigardis min, sendube supozante, ke mi freniziĝis (pri kio li ne tute malpravus).

"Kiel do ? Ĉu purigi la fortikaĝon de Bjelogorsk ?" li finfine diris.

"Mi garantias al vi sukceson," mi respondis, entuziasma. "Vi devas nur sendi min tien."

"Ne, junulo," li diris skuanter la kapon. "Je tiu distanco la malamiko povas facile tranĉi ĉiun komunikadon kun la ĉefa strategia punkto kaj tute venki vin. Tranĉitaj komunikadoj..."

Mi ektimis, kiam li komencis diserti pri militistaj konsideroj, kaj mi rapidis interrompi lin.

"La filino de kapitano Mironov," mi diris al li, "skribis leteron al mi : ŝi petas helpon. Ŝvabrin devigas ŝin edziniĝi al li."

"Tio ne eblas! Ho, tiu Ŝvabrin, tiu maltaŭgulo. Se li falos inter miaj manoj, mi igos juĝi lin ene de dudek kvar horoj, kaj ni fusilos lin sur la parapeto de la fortikaĝo. Sed, intertempe ni devas pacienci..."

"Ĉu pacienci ?" mi ekkriis ekster mi mem, "kaj dum tiu tempo li edziĝos al Maria Ivanovna !..."

"Ho ! Tio ne estas tiel granda malfeliĉo," replikis la generalo. "Estas pli bone por ŝi esti provizore la edzino de Ŝvabrin. Li povas protekti ŝin nun, kaj kiam ni estos fusilintaj lin,

tiam Dio zorgos pri tio : edzino estos trovita por ŝi. Belaj vidvinoj ne restos solaj. Mi volas diri, ke vidvino pli rapide trovas edzinon ol knabino."

"Mi preferas morti," mi diris kolere, "ol lasi ŝin al Ŝvabrin !"

"Ba, ba, ba !" diris la maljunulo. "Nun mi komprenas : vi, evidente, enamiĝis al Maria Ivanovna. Ho ! Sed tio estas alia afero. Povra etulo. Sed tamen mi absolute ne povas doni al vi kompanion da soldatoj kaj kvindekono da kozakoj. Tia ekspedicio ne estas racia. Tiun respondecon mi ne povas preni sur min."

Mi klinis la kapon. Malespero superfortis min. Subite alia ideo transiris mian menson. La leganto ekscios en la sekvanta ĉapitro, kiun ideon mi ekhavis, kiel diris la romanverkistoj en la malnova tempo.

XI. LA URBETO DE LA RIBELULO

En tiu ĉi momento estas
satigita la leono,
kvankam ĉiam de naturo
li malsatas, manĝegemas.
"Kial vi vizitas min en
mia groto ?" ĝi demandis.
.
(A. Sumarokov)

Mi forlasis la generalon kaj rapidis hejmen. Saveliĉ ricevis min per sia kutima babilado :

"Kial vi volas batali kontraŭ ebriaj rabistoj? Ĉu tio estas la devo de sinjoro ? La sorto estas ŝanceliĝema. Por nenio tio povus finiĝi malbone por vi. Kaj se ili ankoraŭ estus turkoj aŭ svedoj, sed tiu kanajlaro ! Estas honto, nur paroli pri ĝi."

Mi interrompis lian babiladon por demandi lin, kiom da mono mi havas entute.

"Ĝi ne mankos al vi," li respondis kun kontenta mieno. "Kvankam la rabistoj traserĉis ĉion, mi sukcesis savi ĝin."

Post tiuj vortoj, li tiris el sia poŝo, longan burson plena je mono.

"Nu, Saveliĉ," mi diris al li. "Donu al mi la duonon kaj gardu la reston. Mi iros al la fortikaĝo de Bjelogorsk..."

"Sed, mia filo Pjotr Andrejiĉ," diris la bona maljunulo per tremetanta voĉo. "Timu Dion! Kiel vi povos fari vojaĝon dum tempo kiam oni povas iri nenien pro la ĉeesto de rabistoj. Ŝparu almenaŭ viajn gepatrojn, se vi ne volas ŝpari vin mem. Kien vi bezonas iri ? Kial? Atendu iomete : trupoj venos kapti la rabistojn. Tiam vi povos iri kien vi volas."

Sed mia intenco estis firma.

"Sufiĉe da rezonado," mi respondis al la maljunulo; "Mi devas foriri, mi ne povas ne foriri. Ne ploru, Saveliĉ. Dio estas bona, kaj ni certe revidos nin. Mi petas vin, ne havu skrupulojn kaj ne estu avara. Aĉetu kion vi bezonas, eĉ por trifoje la prezo. Mi donacos al vi la monon, se mi ne revenos post tri tagoj..."

"Sed, Sinjoro," interrompis min Saveliĉ, "ĉu mi devus lasi vin foriri tute sola? Eĉ ne pensu pri tio en sonĝo! Ĉar vi decidis foriri, mi iros kun vi, eĉ piede: mi ne forlasos vin. Ĉu mi resti sen vi malantaŭ tiu ŝtona muro? Ĉu mi perdis la prudenton? Faru kion vi volas, sed mi ne forlasos vin."

Mi sciis, ke estis neutile diskuti kun Saveliĉ, kaj mi permesis lin prepari sin por foriri. Duonhoron poste, mi metis min sur mian bonan ĉevalon kaj Saveliĉ sur la maldikan, laman ĉevalaĉon, kiun donis al li senpage loĝanto de la urbo, kiu havis plu nenion por nutri ĝin. Kiam ni alvenis ĉe la pordego, la gardistoj lasis nin pasi kaj ni eliris Orenburgo.

Jam noktiĝis. La vojo pasis laŭlonge de la urbeto Bjerd, azilo de Pugaĉov. La rekta vojo estis kovrita per neĝo, sed sur la tuta stepo, oni vidis spurojn de ĉevaloj, renovigitajn ĉiutage. Mi antaŭienris per bona troto. Saveliĉ povis apenaŭ sekvi min kaj kriis al mi en ĉiu momento:

"Pli malrapide, Sinjoro, pro la amo de Dio, pli malrapide! Mia maljuna ĉevalo ne povas kuri tiel rapide, kiel via longkrura folulo. Kial kuri kiel frenezuloj? Se estus ankoraŭ por iri al geedziĝa festo! Kaj ĉiumomente ni povas trafi en la buŝegon de lupo. Pjotr Andrejiĉ, mia filo, estu prudenta! Ah, Sinjoro Dio, protektu la infanon de mia mastro!"

Baldaŭ la fajroj de Bjerd brilis antaŭ ni. Ni proksimiĝis al la ravino, kiu estis la natura defendilo de la urbeto. Saveliĉ ne forlasis min kaj ne interrompis siajn preĝojn kaj plendojn. Mi esperis povi eviti la urbeton sen akcidento, kiam subite mi rimarkis en la duonmallumo ĝuste antaŭ mi, kvin aŭ ses virojn armitajn per bastonoj: tio esti la antaŭposteno de la kvartalo de Pugaĉov. Oni haltigis nin. Mi ne konis la pasvorton, kaj mi volis preteriri ilin sen diri ion ajn. Sed ili tuj ĉirkaŭis min, kaj unu el ili kaptis mian ĉevalon per la bridon. Mi tiris mian sabron kaj frapis la viron sur la kapon. Li ĉapo savis lin. Li tamen ŝanceliĝis kaj ellasis la bridon. La aliaj konfuziĝis kaj forkuris. Mi profitis de tiu momento kaj spronis mian ĉevalon.

La krepusko protektis min de ĉia danĝero, kiam subite, returniĝante, mi rimarkis, ke Saveliĉ ne plu estas kun mi. La povra maljunulo sur sia lama ĉevalo ne estis povinta eskapi al la banditoj.

Kion fari? Mi atendis kelkajn minutojn kaj persvadis min, ke li estas retenita. Mi turnis mian ĉevalon kaj revenis liberigi lin. Proksimiĝante al la ravino, mi aŭdis bruon, kriojn kaj la voĉon de Saveliĉ. Mi rapidis kaj baldaŭ mi retrovis min inter la gardistoj kiuj haltigis min kelkajn minutojn pli frue. Saveliĉ troviĝis inter ili. Li estis tirintaj la maljunulon de sia ĉevalo kaj volis ligi lin. Mia alveno ĝojigis ilin. Kriante ili ĵetis sin sur min kaj senarmigis min en okulumo. Unu el ili, verŝajne la ĉefo, deklaris, ke li kondukos nin al la imperiestro.

"Li, nia mastro," li aldonis, "estas libera ordoni, ke oni tuj pendumu vin, aŭ ke oni atendu la tagon."

Mi ne rezistis. Saveliĉ sekvis mian ekzemplon, kaj la gardistoj triumfe forkondukis nin.

Ni transiris la ravinon kaj eniris la urbeton. Ĉiuj kabanoj estis prilumitaj. Ĉie resonis bruoj kaj krioj. Sur la strato mi renkontis multajn homojn, sed neniu atentis pri ni en la mallumo kaj ne rekonis en mi oficiron de Orenburgo. Oni kondukis nin rekte al dometo, kiu troviĝis ĉe angulo de vojkruciĝo. Ĉe la pordo staris kelkaj bareloj da vino kaj du kanonoj.

"Jen la palaco de la imperiestro," diris unu el la viroj. "Ni anoncos vin."

Li eniris la dometon, kaj mi rigardis Saveliĉ: la maljunulo krucosignis sin kaj preĝis tute mallaŭte. Mi longe atendis. Finfine la viro revenis kaj diris:

"Nia mastro ordonis enirigi la oficiron."

Mi eniris en la dometon, aŭ la palacon, kiel diris la viroj. Ĝi estis prilumita per du graskandeloj, kaj la muroj estis kovritaj per orkolora papero. Krom tio troviĝis tie benkoj, tablo, lavabo pendita je ŝnureto, tualetotuko pendita je najlo, ŝovelilo por enformigi brulaĵon en angulo apud larĝa forno, kovrita per potoj kaj kaseroloj, — ĉio estis kiel en ordinara dometo.

Pugaĉov en ruĝa kaftano kaj alta ĉapo sidis sub la ikonoj kun la manoj sur la koksoj. Ĉirkaŭ la tablo sidis kelkaj el liaj plej gravaj kompanoj kun hipokrite servisteca mieno. Estis klare, ke la alveno de oficiro el Orenburgo vekis ĉe la ribeluloj fortan kuziozecon, kaj ke ili preparis sin por triumfe akcepti min. Pugaĉov tuj rekonis min. La graveco de sia vizaĝo tuj malaperis.

"Nu, Via Nobelego," li vive diris al mi, "kiel vi fartas? Kiu bona vento blovis vin ĉi tien?"

Mi respondis, ke mi vojaĝis por personaj aferoj kaj liaj viroj arestis min.

"Kaj por kia persona afero vi riskas vian vivon?" li demandis.

Mi ne sciis, kion respondi, kaj silentis. Supozante, ke mi ne volis respondi antaŭ atestantoj, Pugačov turnis sin al siaj kamaradoj kaj ordonis ilin eliri. Ĉiuj obeis escepte de du, kiuj ne moviĝis.

"Vi povas libere paroli antaŭ ili," diris Pugačov; "Mi havas nenion kaŝendan por ili."

Mi ĵetis oblikvan rigardon sur la konfidenculojn de la trompisto. Unu el ili, debila kaj ĝiba maljunulo kun blanka barbo, havis nenion rimarkindan ekster kordono de sankta Andreo kiu pendis de la ŝultro sur sia griza kitelo. Sed mian tutan vivon mi neniam forgesos lian kamaradon. Granda, dika, kun larĝaj ŝultroj, li ŝajnis kvardek-kvinjara. Lia rufa densa barbo, liaj grizaj brilaj okuloj, lia nazo sen truoj, lia frunto kaj liaj vangoj kun flavruĝaj makuletoj donis al lia larĝa varioldifektita vizaĝo nedireblan malallogan esprimon. Li estis vestita per ruĝa ĉemizo, kirgiza hejmvesto kaj larĝa kozaka pantalone. La unua, kiel mi poste eksciis, estis la eskapinta korporalo Bjeloborodok, la dua nomiĝis Afanasij Sokolov, kromnomata Ĥlopuŝa, punlaboristo trifoje eskapinta el la minejoj de Siberio. Malgraŭ miaj sentoj, kiuj konfuzis min, la kompanio en kiu mi troviĝis tiel neatendate, forte distris mian imagon. Sed Pugačov igis min reveni al mi mem per sia demando:

"Diru al mi pro kia afero vi forlasis Orenburg."

Stranga ideo trakuris mian menson. Ŝajnis al mi, ke la Providenco, kiu duafoje kondukis min al Pugačov, donis al mi la okazon realigi mian planon. Mi decidis profiti de la okazo, kaj sen preni la tempon pripensi mian decidon, mi respondis al la demando de Pugačov:

"Mi iris al la fortikaĵo de Bjelorgsk liberigi orfelinon, kiu estas malbone trakta tie."

La okuloj de Pugačov ekflamis.

"Kiu el miaj viroj havas la aŭdacon malbone trakti orfelinon?" li ekkriis. "Eĉ se li estas pli ruza ol la diablo, li ne eskapos al mia tribunalo. Diru, kiu estas la kulpulo."

"Ŝvabrin estas la kulpulo," mi respondis. Li tenas malliberigita la knabinon, kiun vi vidis malsana ĉe la popedzino kaj volas edziĝi al ŝi uzante perforton."

"Mi donos lecionon al Ŝvabrin!" diris Pugačov minace. "Li ekscios, kion kostos al li agi laŭ sia plaĉo ĉe mi kaj malbone trakti la popolon. Mi pendumos lin."

"Permesu, ke mi diru vorton," diris Ĥlopuŝa per raŭka voĉo. "Vi tro rapide nomumis Ŝvabrin komandanto de la fortikaĵo, kaj nun vi tro rapide kondamnas lin. Vi jam humiligis la kozakojn, metante ĉe ilia kapo nobelon. Ne timigu la nobelojn punante unu el ili ĉe la unua kalumnio."

"Ili ne meritas nek kompaton nek gracon," diris la maljunulo kun la blua kordono. "Puni Ŝvabrin ne estas malbono, sed ankaŭ ne estus malbone demandi al la sinjoro oficiro, kial li faras al ni la honoron viziti nin. Se li ne rekonas vin kiel imperiestron, li ne rajtas peti justecon de vi. Se li rekonas vin, kial li restis ĝis nun en Orenburgo kun viaj malamikoj? Ĉu vi ne ordonos, ke oni konduku lin en la torturĉambron kaj ke oni bruligu tie fajron. Mi kredas, ke Lia Graco estis sendita de siaj ĉefoj de Orenburgo."

La logiko de la maljuna krimulo ŝajnis al mi sufiĉe konvinka. Tremeto kuris tra mia tuta korpo ĉe la penso, ke mi trovis en tiaj manoj.

Pugačov rimarkis mian konfuzecon:

"Hej, Via Nobelego," li diris al mi, okulumante, "ŝajnas al mi ke mia feldmarŝalo parolas ĝuste. Kion vi pensas pri tio?"

La ironio de Pugačov donis al mi kuraĝon. Mi trankvile respondis, ke mi trovas en lia potenco kaj li estas libera trakti min, kiel al li ŝajnis bone.

"Bone," diris Pugačov. "Nun diru al mi en kia situacio troviĝas via urbo."

"Danke al Dio, la situacio estas bona."

"La situacio estas bona," ripetis Pugačov, "kaj la popolo mortas pro malsato."

La trompisto diris la veron, sed mi ĵuris, konfirmante, ke tio estis nur famoj, kaj ke en Orenburgo troviĝas sufiĉe da ĉiuspecaj provizoj.

"Vi vidas," diris la maljunulo, "ke li mensogas antaŭ via vizaĝo. Ĉiuj dezertuloj akordiĝas por diri, ke en Orenburgo regas malsatego kaj pesto, kaj ke oni manĝas tie kadavrojn. Sed Lia Graco konfirmas, ke tie ĉio troviĝas en abundeco. Ĉar vi volas pendumi Ŝvabrin, pendumu do ankaŭ tiun junulon de la sama pendumilo, por ke neniu el ili estu ĵaluza de la alia."

La vortoj de la malbenita maljunulo ŝajnis meti dubon en Pugačov. Feliĉe Ĥlopuŝa kontraŭdiris lian kompanon.

"Tio sufĉas, Naumiĉ. Vi ŝajnas opinii, ke ni devas strangoli kaj buĉi ĉiun. Jen heroo ! Oni demandas sin, kiel vi tenas vin staranta. Vi havas jam unu piedon en la tombo, kaj vi volas ĵeti la aliajn en ĝin. Ĉu vi ne jam havas sufiĉe da sango sur via konscienco ?"

"Jen sanktulo," replikis Bjeloborodok. "De kie vi havas tiun kompaton ?"

"Certe," respondis Ĥlopuŝa, " ankaŭ mi estas pekulo, kaj tiu ĉi mano (li fermis sian pugnon kaj, suprenŝovante sian manikon, montris sian senkarniĝintan harkovritan brakon), kaj tiu ĉi mano verŝis kristanan sangan. Sed mi mortigis nur kontraŭstarantojn, sed ne gastojn: ekstere, apud vojkruĉigoj, en sombra arbarego, sed ne hejme, en domo, sidanta ĉe la stovo. Per klabo aŭ bastonego, sed ne per virina klaĉo..."

La maljunulo deturnis sin kaj murmuris:

"Speco de sennaza fripono."

"Kion do vi murmuras, maljuna strigo ?" ekkriis Ĥlopuŝa. "Atendu iomete, ke mi forfrapu vian nazon. Ankaŭ via horo venos. Ne timu, ankaŭ vi iam sentos tenajlon sur via nazo. Intertempe atentu, ke mi ne deŝiru vian malpuran barbon !"

"Sinjoroj generaloj," digne intervenis Pugaĉov, sufiĉe da diskutoj ! Ne estus malfeliĉo vidi ĉiujn bruemulojn barakti je la sama pendumilo, sed estus malfeliĉo, se niaj hundoj mordus unuj la aliajn. Repaciĝu !"

Ĥlopuŝa kaj Bjeloborodov diris plu nenian vorton, sed rigardis sin kun sombra mieno. Mi rimarkis la neceson ŝanĝi la temon de la konversacio, kiu povis fariĝi danĝera por mi, kaj, turnante min al Pugaĉov, mi gaje diris al li :

"Aĥ, mi forgesis danki vin pro la ĉevalo kaj la tulupo. Sen vi, mi ne estus alveninta en la urbo kaj estus mortinta survoje."

Mia ruzaĵo sukcesis. Pugaĉov malstreĉiĝis.

"Servo por servo," li diris okulumante. "Sed diru al mi, kial vi interesiĝas pri tiu knabino, kiun Ŝvabrin malbone traktas. Ĉu via juna koro ne estus hazarde tuŝita?"

"Ŝi estas mia fianĉino," mi respondis al Pugaĉov, vidante ŝanĝon en lia sinteno, tiel ke mi ne plu juĝis necesa, kaŝi la veron.

"Ĉu via fianĉino ?" ekkriis Pugaĉov. Kial vi ne diris tion pli frue ? Ni geedzigos vin, kaj ni festos la geedziĝon."

Tiam turnante sin al Bjeloborodok :

"Aŭskultu, feldmarŝalo, Lia Nobelego kaj mi estas maljunaj amikoj. Morgaŭ ni vidos, kion ni povos fari.":

Mi estus estinta feliĉa povi rifuzi tiun honoron, sed mi ne povis. Du junaj kozakinoj, la

filinoj de la dommastro, kovris la tablon per blanka tablotuko, alportis panon, fiŝsupon kaj kelkajn kruĉojn da vino kaj da biero. Duafoje mi troviĝis ĉe la tablo de Pugaĉov kaj de liaj teruraj kompanoj.

La orgio, kies nelibervola atestanto mi estis, daŭris ĝis tre malfrue en la nokto. Finfine ebrieco venkis la kunmanĝantojn. Pugaĉov dormetis sidante sur sia loko. Liaj kompanoj levis sin kaj faris al mi signon forlasi lin. Mi eliris kun ili. Laŭ ordono de Ĥlopuŝa gardisto kondukis min en la torturĉambron, kie mi trovis Saveliĉ, kaj oni tie enŝlosis min kun li. Mia mentoro tiom miris pri ĉio, kio estis okazinta, ke li metis neniun demandon al mi. Li kuŝiĝis en la mallumo kaj longe suspiris kaj ĝemis. Finfine li komencis ronki, kaj mi transdonis min al pensoj, kiuj la tutan nokton malhelpis min ekdormi.

Matene oni venis serĉi min laŭ ordono de Pugaĉov. Mi iris al li. Antaŭ la pordo de la domo staris glitveturilo, antaŭ kiu staris jungitaj tri tartaraj ĉevaloj. La popolo amase kolektiĝis sur la strato. En la vestiblo mi renkontis Pugaĉov. Li estis vestita en vojaĝkostumo : peltaĵo kaj kirgiza ĉapo. Liaj kompanoj de la antaŭvespero ĉirkaŭis lin. Ili estis alprenintaj servistecajn mienojn, kiuj forte kontrastis kun ĉio kion mi vidis kaj aŭdis la antaŭvesperon. Pugaĉov gaje ricevis min kaj igis min sidiĝi kun li en la glitveturilo.

"Al la fortikaĵo de Bjelogorsk," li diris al la tartaro kun larĝaj ŝultroj, kiu kondukis la trojkon. Mia koro forte ekbatis. La ĉevaloj ekrotis, la sonoriletoj ektintis kaj la glitveturilo ekmoviĝis.

"Haltu ! Haltu !" resonis voĉo, kiun mi bone konis, kaj mi vidis Saveliĉ, kiu kuris renkonte al ni. Pugaĉov ordonis halti.

"Mia infano, Pjotr Andrejiĉ," ekkriis la maljunulo, "ne forlasu min je mia aĝo meze de tiuj ban..."

"Ha, maljuna strigo," diris al li Pugaĉov. Unu plian fojon Dio metas nin unu kontraŭ la alia. Nu, sidiĝu sur la kondukbenkon."

"Dankon, sinjoro, dankon, bona patro," diris Saveliĉ, sidiĝante. "Donu Dio, ke vi vivu cent jarojn en bona sano pro tio ke vi akceptis min, maljunulon. Mian tutan vivon mi preĝos al Dio por vi, kaj mi ne plu mencios la leportulupon."

Tiu leportulupo povis finfine grave iriti Pugaĉov. Feliĉe la trompisto ne aŭdis aŭ tute neglektis tiun tedan aludon. La ĉevaloj galopis. La homoj sur la stratoj haltis kaj kliniĝis ĝis

sur la grundo. Pugačov salutis ilin per la kapo en ĉiuj direktoj. Minuton poste ni glitis el la urbeto kaj veturis sur la plata vojo.

Estas facile imagi kion mi sentis en tiu momento. Kelkajn horojn poste mi estis revidonta tiun kiun mi konsideris jam perdinta por mi. Mi provis imagi la momenton de la renkonto. Mi ankaŭ pensis pri la viro inter kies manoj troviĝis mia sorto, kaj kiu pro stranga ŝanĝiĝo de la cirkonstancoj estis ligita al mi. Mi memoris la neutilan kruelecon kaj la sangajn procedojn de tiu kiu promesis liberigi mian amatinon. Sed mi ne kuraĝis diri al Pugačov, ke ŝi estas la filino de kapitano Mironov. Amariĝinta Ŝvabrin povus rakonti ĉion al li. Pugačov povus ekscii la veron ankaŭ alimaniere... Kio okazus al Maria Ivanonva en tiu kazo ? Tremeto kuris laŭ mia spino., kaj la haroj stariĝis sur mia kapo...

Subite Pugačov interrompis miajn pensojn, farante al la sekvantan demandon:

"Pri kio vi pensas, Via Nobeleco ?"

"Kiel ne pensi ? Ankoraŭ hieraŭ mi batalis kontraŭ vi, kaj hodiaŭ mi troviĝas kun vi en la sama glitveturilo : mia feliĉeco tute dependas de vi."

"Ĉu vi timas min ?" demandis Pugačov.

Mi respondis, ke mi jam unufoje ricevis lian pardonon, kaj mi nun esperis ne nur je lia kompato sed ankaŭ je lia helpo.

"Vi pravas, je Dio, vi pravas !" diris la trompisto. "Vi vidis, kiel miaj kamaradoj rigardis vin deflanke, kaj hodiaŭ la maljunulo revenis ataki vin, dirante, ke vi estas spiono kaj ke oni devas torturi kaj pendumi vin."

Plimaltigante sian voĉon, por ke Saveliĉ kaj la tartaro ne povu kompreni lin, li aldiris :

"Sed mi ne volis, memorante vian glason da brando kaj vian leportulupon, kiujn vi donacis al mi. Mi vidas, ke mi ne estas sangotrinkisto, kiel nomas min viaj similuloj."

Mi memoris la kapton de la fortikaĵo de Bjelogorsk kaj la sorto de kapitano Mironov kaj lia edzino, sed mi preferis ne diskuti pri tio kun li, kaj mi respondis nenion.

"Kion oni diras de mi en Orenburgo ?" li demandis post mallonga silento.

"Oni diras, ke vi estas malfacile kontentigebla. Kion vi volas ? Vi klare montris, kio vi estas."

La vizaĝo de la trompisto esprimis kontentigitan sinamon.

"Jes," li gaje diris, "kio koncernas la militon, mi bone faras ĝin. Ĉu vi konas la batalon de Juzejeva. Kvardek mortigitaj generaloj, kvar

armeoj malliberigitaj. Kion vi pensas : ĉu la reĝo de Prusio povus rivali kun mi?"

La fanfaronado de la bandito ŝajnis al mi lugubra

"Kaj vi, kion vi pensas pri tio ?" mi demandis al li. Ĉu vi povus venki reĝon Frederikon ?"

"Sed kial ne ? Mi venkis viajn generalojn, kaj ili batis lin. Ĝis nun miaj armeoj ĉiam venkis. Atendu ankoraŭ iomete : oni vidus tion pli klare, kiam ni marŝos al Moskvo."

"Ĉu vi do volas marŝi al Moskvo ?"

La trompisto meditis kelkajn momentojn kaj diris malaŭtvoĉe:

"Nur Dio scias tion. Mia vojo estas mallarĝa. Miaj kamaradoj tro multe rezonas. Ili estas ŝtelistoj. Mi devas bone atenti. Ĉe la unua malsukceso, ili aĉetos siajn kolojn per mia kapo."

"Tio estas certa !" mi replikis. "Ne estus pli saĝe, ke vi forlasu ilin en favora momento kaj petegu la kompaton de la Imperiestrino ?"

Pugačov amare ridetis.

"Ne," li respondis, "jam estas tro malfrue por mi penti. Ne estos pardono por mi. Mi daŭrigos kiel mi komencis. Kaj ne forgesu, ke ankaŭ Griŝka Otrepjev ²⁴ regis Moskvon ! Mi povas sukcesi."

"Sed ĉu vi scias, kiel li finiĝis. Oni ĵetis lin tra fenestro, tranĉis lian ĝorgon, kvaronigis lin, bruligis lin, ŝargis kanonon per sia cindro kaj oni pafis."

"Aŭskultu," diris Pugačov kvazaŭ sekve de sovaĝa inspiraĵo, "mi volas rakonti al vi historion, kiun dum mia infaneco rakontis al mi maljuna kalmuko. Unutage aglo demandis al korako: 'Diru al mi, bona korako, kial vi vivas tricent jarojn, dum mi entute vivas nur tridek tri jarojn?' La korako respondis : 'Ĉar vi trinkas vivan sangon, dum mi nutras min per kadavroj.' La aglo pripensis kaj diris : 'Se vi volas, ni provu nutri nin ambaŭ sammaniere ?' 'Bone,' diris la korako, kaj ambaŭ birdoj forflugis. Momenton poste ili vidis mortintan ĉevalon, malsupreniris kaj instalas sin sur ĝin. La korako komencis piki, trovante la karnon bongusta. La aglo pikis unufoje, dufoje, kaj tiam forflugis, dirante al la korako : 'Ne, mia brava korako, mi preferas ebrigi min unufoje per viva sango ol manĝi tricent jaroj kadavrojn, kaj tiam okazu tio, kion volas Dio !' Kiel vi trovas tiun kalmukan rakonton ?"

²⁴ Por tiu nomo vidu piednoton n° 23.

"Sagaca," mi respondis al li. "Sed por mi, vivi per murdoj kaj ŝteloj estis piki kadavrojn."

Mirigita, Pugačov rigardis min kaj respondis nenion. Ni ambaŭ silentis, ĉiu okupante sin per siaj propraj pensoj. La tartaro komencis kanti timtremiga kanton. Saveliĉ dormetis sur sia sidejo. La glitveturilo glitis sur la plata vintra vojo. Subite mi rimarkis malgrandan vilaĝon ĉe la kruta rando de la rivero Jajik kun palisaro kaj sonorilturo, kaj kvaronhoron poste ni eniris la fortikaĵon de Bjelogorsk.

XII. LA ORFINO

Jen nia arbo, jen nia pomarbo
Havas nek supron, nek iajn sproŝetojn.
Jen nia bela, jen nia princino:
Havas nek patron, nek karan patrinon.
Por ŝin pretigi troviĝas jes iu,
Sed por ŝin beni troviĝas neniu.
(*Geedaiĝa kanto*)

La glitveturilo alvenis antaŭ la perono de la domo de la komandanto. La popolo rekonis la sonorileton de Pugačov kaj alkuris amase malantaŭ ni. Ŝvabrin venis akcepti la trompiston sur la perono. Li estis vestita kiel kozako kaj lasis kreski sian barbon. La perfidulo helpis Pugačov malsupreniri de la veturilo, esprimante sian ĝojon kaj diligentecon per flatantaj vortoj. Vidante min, li konfuziĝis, sed rapide denove regis sin. Li tendis al mi la manon, dirante :

"Ĉu ankaŭ vi aliĝis al ni ? Vi jam delonge devus esti aliĝinta."

Mi deturnis min de li kaj respondis nenion.

Mi koro ŝrumpis, kiam mi troviĝis en la ĉambro, kiun mi tiel bone konis kaj en kiu pendis kontraŭ la muro la diplomo de la forpasinta komandanto kiel sombra epitafio de la pasinta tempo. Pugačov sidiĝis sur la divanon, sur kiu ofte dormetis Ivan Kuzmiĉ, endormigita de la grumbloj de sia edzino. Ŝvabrin mem alportis al li brandon. Pugačov drinkis glaseton da ĝi kaj diris al li :

"Servu ankaŭ Lian Nobeledon."

Ŝvabrin proksimiĝis al mi kun sia pleto, kaj duafoje mi deturnis min de li. Li ne ŝajnis senti sin trankvila. Per sia kutima sagaceco li certe divenis, ke Pugačov ne estis kontenta pri li. Li timis lin kaj rigardis min kun malfido. Pugačov informis sin pri la situacio en la fortikaĵo, la famoj koncerne la malamikaj armeoj kaj tiel plu. Tiam subite li demandis lin :

"Diru, mia etulo, kiun knabinon vi gardas ĉe vi ? Montru ŝin al mi !"

Ŝvabrin fariĝis pala kiel mortinto.

"Sinjoro," li diris per tremetanta voĉo, "ŝi ne estas gardata., ŝi estas malsana kaj kuŝas en sia ĉambro."

"Konduku min al ŝi," diris la trompisto; levigante.

Ŝvabrin ne povis rifuzi tion kaj kondukis Pugačov en la ĉambro de Maria Ivanovna. Mi sekvis ilin.

Ŝvabrin haltis sur la ŝtuparo.

"Sinjoro," li diris, "vi havas la rajton postuli de mi kion vi volas, sed ne lasu eniri fremdulon en la dormoĉambro de mia edzino."

Mi ekstremetis.

"Vi do estas edziniĝinta ?" mi demandis al Ŝvabrin, preta mortigi lin.

"Mallaŭte," interrompis min Pugačov. "Tio estas mia afero. Kaj vi," li daŭrigis, turnante sin al Ŝvabrin, "ne rezonu kaj ne objektu: ŝi estu via edzino aŭ ne, mi kondukas al ŝi kiun mi volas. Via Nobeledo, venu kun mi."

Ĉe la pordo de la ĉambro, Ŝvabrin denove haltis kaj diris per tremanta voĉo:

"Sinjoro, mi avertas vin, ke ŝi havas la varman febron kaj deliras senĉese jam la trian tagon."

"Malfermu," diris Pugačov.

Ŝvabrin komencis serĉi la ŝlosilon en siaj poŝoj kaj diris, ke li ne havis ĝin sur si. Pugačov frapis la pordon per piedo, la ŝloso rompita, la pordo malfermiĝis kaj ni eniris.

Mi rigardis. Mi estis frapita de hororo. Sur la planko vestita en kampulinaj ĉifonoj, sidis Maria Ivanovna, pala kaj maldika kaj kun hirtaj haroj. Antaŭ ŝi starus kruĉo da akvo kovrita per peco da pano. Vidante min, ŝi tremetis kaj komencis plori. Kion mi tiam sentis, mi eĉ ne volas memori.

Pugačov rigardis Ŝvabrin kaj diris kun amara rideto :

"Vi havas belan malsanulejon !"

Tiam li proksimiĝis al Maria Ivanovna. :

"Diru al mi, etulino, kial via edzo punas vin. Kion mabonan vi faris?"

"Mia edzo?" ŝi ripetis. "Li ne estas mia edzo. Mi neniam estos lia edzino. Mi preferus morti ol edziniĝi al li, kaj mi mortos, se oni ne liberigos min."

Pugačov minace rigardis Ŝvabrin.

"Vi do kuraĝis trompi min," li diris al li. "Ĉu vi scias, maltaŭgulo, kion vi meritas?"

Ŝvabrin falis sur la genuojn. En tiu momento, malestimo sufokis en mi ĉiun senton de malamo kaj kolero. Mi rigardis kun naŭzo tiun nobe-

lon, falintan ĉe la piedoj de la eskapinta kozako. Pugaĉov dolĉiĝis.

"Mi pardonas vin tiun ĉi fojon," li diris al Ŝvabrin, "sed sciu, ke ĉe via unua manko, mi rememoros ankaŭ tiun ĉi."

Tiam, turnante sin al Maria Ivanovna, li afable diris al ŝi :

"Venu eksteren, bela infano, mi donas al vi la liberecon. Mi estas la imperiestro."

Maria Ivanovna ĵetis rapidan rigardon sur lin kaj tuj divenis, ke antaŭ ŝi staras la murdisto de ŝiaj gepatroj. Ŝi kovris sian vizaĝon per ambaŭ manojn kaj falis sinkonscia. Mi rapidis al ŝi, sed en tiu momento mia maljuna amikino Palaŝa kuraĝe eniris la ĉambron kaj komencis prizorgi sian mastrinon. Pugaĉov eliris, kaj ni reiris al la salono.

"Nu, Via Nobelego," ridante diris Pugaĉov. "Ni savis la belan knabinon. Kion vi dirus, se oni venigus la popon kaj devigus lin beni vian edziĝon kun sia nevino? Mi estos unu el la atestantoj kaj Ŝvabrin la alia. Ni dancos, trinkos kaj fermos la pordojn.."

Kion mi timis, okazis : aŭdante la proponon de Pugaĉov, Ŝvabrin preskaŭ eksplodis pro kolero.

"Sinjoro," li ekkriis kolere, "mi kulpas, ĉar mi mensogis al vi, sed Grinĵov ankaŭ trompis vin. Tiu knabino ne estas la nevino de la ĉi-tiea popo, sed la filino de Mironov, kiun vi punis kaptinte la fortikaĵon."

Pugaĉov turnis la rigardon de la fajro.

"Kio alia ankoraŭ estas nun?" li demandis, preskaŭ senvorta.

Ŝvabrin diris la veron," mi firme respondis.

"Vi ne diris tion al mi," rimarkis Pugaĉov, kies vizaĝo sombrigiĝis.

"Juĝu vi mem pri tio," mi respondis al li. "Ĉu mi povus deklari antaŭ viaj viroj, ke la knabino de Mironov ankoraŭ vivas? Ili estus vorintaj ŝin : nenio estus povinta savi ŝin."

"Jes, vi pravas," diris ridante Pugaĉov. "Miaj ebruloj ne estus ŝparintaj la povran knabinon. La popedzino bone agis, trompante ilin."

"Aŭskultu," mi daŭrigis, "vidante lin en bona humoro, "mi ne scias, kiel nomi vin kaj mi ne volas scii tion... Sed Dio atestas, ke mi estus feliĉa pagi per mia propra vivo kion vi faris por mi. Nur postulu nenion, kio kontraŭas mian honoron kaj mian konsciencon de kristano. Vi estas mia bonfaranto. Perfektigu, kion vi komencis : lasi min iri kun la povra orfino, kien Dio kondukos nin. Por ni kie ajn vi estos kaj kio ajn okazos al vi, ni ĉiam preĝos al Dio, por via pekula animo..."

Verŝajne la maldolĉa animo de Pugaĉov estis tuŝita de miaj vortoj.

"Estu ĉio, kiel vi deziras," li diris. "Ĉu oni punas, ĉu oni pardonas, oni devas bone fari ĉion., tia estas mia kutimo. Forkonduku vian belulinon, kaj konduku ŝin, kien vi volas, kaj Dio donu al vi amon kaj konkordon !"

Tiam li turnis sin al Ŝvabrin, kaj ordonis lin, doni al mi pasportojn por ĉiuj postenoj aŭ fortikaĵoj, submetitaj al lia potenco. Ŝvabrin, tute batita, staris tie kvazaŭ fiksita. Pugaĉov iris inspekti la fortikaĵon. Ŝvabrin akompanis lin, kaj mi restis sola pretekstante, ke mi devas prepari mian foriron.

Mi kuris en la ĉambron.

"Kiu estas?" demandis Palaŝa.

Mi nomis min. La tenera voĉo de Maria Ivanovna resonis malantaŭ la pordo :

"Atendu, Pjotr Andrejiĉ, mi ŝanĝas miajn vestaĵojn. Iru ĉe Akulina Pamfilovna. Ankaŭ mi tuj iros tien."

Mi obeis kaj iris ĉe patron Gerasim. Li kaj la popedzino kuris renkonte al mi. Saveliĉ jam estis avertinta ilin.

"Bonan tagon, Pjotr Andrejiĉ," diris la popedzino. Dio venigis vin ĉi tien. Kial vi fartas? Ĉiun tagon ni parolis pri vi. Kaj Maria Ivanovna tiom suferis sen vi, la povra karulino Diru al ni, etulo, kion vi faris por tiel amike rilati kun Pugaĉov? Kiel okazis, ke li ne strangolis vin? Ni devas esti dankemaj al li pro tio."

"Sufiĉas, maljunulino," interrompis ŝin patro Gerasim, "ne rakontu ĉion kion vi scias. Babilajoj servas al nenio. Mia filo, Pjotr Andrejiĉ, eniru, estu bonvena. Ni jam longe ne vidis nin."

La popedzino regalis min laŭ la hazardo de la menuo kaj intertempe babilis senĉese. Ŝi rakontis al mi, kiamaniere Ŝvabrin devigis ilin liveri al li Maria Ivanovna, kiom ŝi ploris kaj ne volis forlasi ilin. Kiel Maria Ivanovna restis en kontakto kun ili per Palaŝa (tiu energia knabino, kiu kondukis per la naso eĉ la serĝenton), kiel ŝi konsilis al Maria Ivanovna skribi al vi leteron, k.t.p....

Miavice mi mallonge rakontis mian historion La popo kaj la popedzino krucosignis sin, eksciante, ke Pugaĉov estis informita de ilia mensogo.

"Dio protekto nin!" diris Akulina Pamfilovna, "Li deturnu de ni la fulmotondron! Ha, tiu Aleksej Ivaniĉ! Kia maltaŭgulo!"

En la sama minuto malfermiĝis la pordo, kaj Maria Ivanovna eniris kun rideto sur sia pala

vizaĝo. Ŝi estis demetinta sian kostumon de kampulino, kaj estis vestita kiel kutime, simple kaj subtilguste.

Mi prenis sian manon kaj longe povis diri nenian vorton. Ni ambaŭ silentis kun tro plena koro. Niaj gegastigantoj sentis, ke ni ne bezonis ilin kaj lasis nin solaj. Ni do restis solaj. Ĉio estis forgestita. Kiam ni komencis interparoli, ni ne povis satigi nin per vortoj. Maria Ivanovna rakontis al mi ĉion, kio okazis al ŝi ekde la kupto de la fortikaĵo kaj priskribis al mi la tutan hororon de sia situacio, ĉiujn afliktojn al kiuj submetis ŝin la malnobla Ŝvabrin. Ni memoris ankaŭ la malnovan feliĉan tempon... Ni ambaŭ ploris... Finfine mi komencis proponi al ŝi miajn planojn. Lasi ŝin en la fortikaĵo, submetita al Pugaĉov kaj komandata de Ŝvabrin, estis neeble. Oni ankaŭ ne povis pensi pri Orenburgo, kiu suferis ĉiujn hororojn de la sieĝo. Mi proponis al ŝi iri al la vilaĝo de miaj gepatroj. Komence ŝi hezitis. La opinio de mia patro pri ŝia persono, timigis ŝin. Mi trankviligis ŝin. Mi sciis, ke mia patro konsideros kiel feliĉon kaj devon akcepti la filinon de maljuna soldato, moritgita por la patrio.

"Mia malgranda Maria Ivanovna," mi finfine diris al ŝi, "mi konsideras vin kiel mia edzino. Miraklaj cirkonstancoj unuigis nin por ĉiam. Nenio en la mondo povos separi nin."

Maria Ivanovna simple aŭskultis min sen afektita ĝeno, sen falsa timideco. Ŝi sentis, ke ŝia sorto estas ligita al la mia. Sed ŝi ripetis, ke ŝi ne fariĝos mia edzino sen la konsento de miaj gepatroj. Mi ne kontraŭdiris ŝin. Ni pasie kaj sincere kisadis nin, kaj ĉio estis aranĝita inter ni.

Unu horon poste la serĝento alportis al mi pasporton, subskribitan de Pugaĉov per muŝkruretojn. Mi trovis lin preta por preni la returnvojon. Mi ne povis esprimi, kion mi sentis, separiĝante min de tiu terura viro, kiu estis monstro, sovaĝulo por ĉiuj escepte por mi. Kial ne diri la veron? En tiu momento forta simpatio altiris min al li. Mi arde deziris deŝiri lin el la kompanio de la banditoj kiujn li komandis kaj savi sian kapon dum ankoraŭ estis tempo por tio. Ŝvabrin kaj la popolo, kiuj interpuŝiĝis ĉirkaŭ ni kaj malhelpis min diri ĉion kio plenis mian koron.

Ni separis nin kiel amikoj. Ekvidante Akulina Pamfilovna en la homamaso, Pugaĉov minacis ŝin per fingro kaj okulumis per signifa mieno. Tiam li paŝis en la veturilon kaj igis veturigi sin al Bjerd. Kiam la glitveturilo

startis, li ankoraŭfoje kliniĝis eksteren kaj kriis al mi :

"Adiaŭ, Via Nobelego! Kiu scias! Eble ni ankoraŭfoje iam renkontos nin!"

Efektive ni ankoraŭfoje renkontis ni, sed en kiaj cirkonstancoj!

Pugaĉov estis foririnta. Mi longe rigardis la blankan stepon, sur kiu rapidis lia trojko. La popolo disiris. Ŝvabrin malaperis. Mi revenis al la domo de popo. Ĉio estis preta por nia vojaĝo. Mi ne volis atendi pli longe. Ĉiuj niaj aferoj troviĝis en la malnova veturilo de la komandanto. La kuĉeroj jungis la ĉevalojn en okulumo. Maria Ivanovna iris diri adiaŭon al la tomboj de siaj gepatroj, enterigitaj malantaŭ la preĝejo. Mi volis akompani ŝin, se ŝi petis min, lasi ŝin iri sola. Kalkajn minutojn poste ŝi revenis, silente plorante. La veturilo estis preta. Patro Gerasim kaj lia edzino eliris sur la perono. Ni sidiĝis triope en la veturilon : Maria Ivanovna, Palaŝa kaj mi. Saveliĉ trovis lokon sur la kondukbenko.

"Adiaŭ, Maria Ivanovna, mia kara filino. Adiaŭ, Pjotr Andrejiĉ, adiaŭ nia heroo !" diris la bona popedzino. "Bonan vojaĝon, kaj Dio donu al vi feliĉecon !"

Kaj ni forveturis.

Ĉe la fenestro de la domo de la komandanto mi vidis Ŝvabrin staranta, lian vizaĝon reflektis sombran malamon. Mi ne volis triumfi super la neniigita malamiko kaj deturnis miajn okulojn aliflanken. Finfine ni pasis tra la pordegojn kaj ni forlasis la fortikaĵon de Bjelogorsk por ĉiam.

XIII. LA MALLIBERULO

- Ne koleriĝu, ho, Sinjoro, mia devo
- Ordonas min konduki vin al la prizono.
- Mi estas preta, sed esperas, ke antaŭe
- Vi lasas min ekspliki mian fremdan kazon.

(*Knjajnin*)

Tiel neatendate kunigita kun la knabino kiun mi amis, kaj kies sorto turmentis min ankoraŭ la antaŭan matenon, mi ne povis kredi je mia nuna feliĉeco, kaj mi imagis, ke ĉio estis nur signifiĝa sonĝo. Maria Ivanovna melankolie rigardis jen min, jen la vojon, kaj ŝi ŝajne ankoraŭ ne retransilentiĝis. Ni silentis. Niaj koroj estis tro lacaj. Sen rimarki tion, ni troviĝis du horojn poste en la proksima fortikaĵo, ankaŭ subigita al Pugaĉov. Tie ni ŝanĝis la ĉevalojn. Laŭ la rapideco kun kiu oni jungis ilin kaj la diligenta hasto de la barbula kozako, kiu estis nomumita de Pugaĉov, mi rimarkis ke, danke al la parolemo de la kuĉero kiu

kondukis la glitveturilon, oni konsideris min kiel favorulon.

Ni daŭrigis nian vojaĝon. Kiam noktiĝis, ni proksimiĝis al urbeto, kie, se kredi la barbulan komandanton de la antaŭa fortikaĵo, troviĝis forta bataliono, kiu estis aliĝontaj al la trupoj de la trompisto. Sed malgraŭ mia pasporto, ni estis arestitaj de la gardistoj. Al la demando : *Kiu vi estas ?* la koĉero laŭtvoĉe respondis :

"Amiko de la imperiestro kun sia mastrino."

Subite amaso da husaroj ĉirkaŭis nin kaj, terure blasfemante, la lipharhava kavaleria serĝento ordonis min :

"Malsupreniru, amiko de la diablo. Ni montratos ion al vi, al vi kaj al via mastrino."

Mi descendis de la veturilo kaj postulis, ke oni konduku min al la ĉefo. Vidante oficiron, la soldatoj eksilentis. La kavaleria serĝento kondukis min al la majoro. Saveliĉ ne forlasis min, murmurante al si mem :

"Jen bela traktado por amiko de la caro... Sinjoro Dio, kiel tio finiĝos?"

La veturilo sekvis nin paŝe.

Kvin minutojn poste ni alvenis ĉe malgranda forte prilumita domo. La kavaleria serĝento lasis min kun la gvardio kaj iris anonci min. Li tuj revenis kaj deklaris, ke Lia Grandeco ne havis tempon ricevi min, kaj ke li ordonis konduki min al la prizono, sed enirigi mian mastrinon ĉe lin."

"Kion tio signifas ?" mi ekkriis. kolere. "Ĉu li frenezus?"

"Mi ne scias, Via Nobeleco," respondis la kavaleria serĝento. "Sed Lia Grandeco ordonis konduki vin al la prizono kaj la Sinjorinon en lian domon, Via Nobeleco."

Mi suriris la peronon. La gardistoj eĉ ne havis la ideon reteni min, kaj mi eniris ĉambron kie ses husaroficiroj ludis je kartoj. La majoro disdonis la kartojn. Granda estis mia miro, kiam mi rekonis Ivan Ivanoviĉ Zurin, kiu instruis min ludi bilardon kaj ruze forprenis de mi mian monon en la gastejo de Simbirsk.

"Ĉu estas eble ?" mi ekkriis. "Ivan Ivanoviĉ, ĉu estas vi ?"

"Hej, hej, Pjotr Andrejiĉ ! Kia hazardo. De kie vi venas ? Ĉu vi ne volas ludi kun ni ?"

"Dankon, prefere donu al mi loĝejon."

"Ĉu vi bezonas loĝejon? Restu ĉe mi !"

"Mi ne povas. Mi ne estas sola."

"Nu, alkonduku vian kamaradon."

"Mi ne estas kun kamarado, mi estas kun damo."

"Ĉu kun damo? Kie do vi trovis ŝin? Hej, hej, frato!"

Ĉe tiuj vortoj Zurin komencis fajfi tiel signifoplene, ke la aliaj ekridegis kaj ke mi tute konfuziĝis.

"Nu, tiel estu!" daŭrigis Zurin, "Vi ricevos loĝejon. Sed estas bedaŭrinde, ke ni ne povos festi kun mi kiel antaŭe... Kiel do vi ne alkondukis la amikino de Pugaĉov? Ĉu ŝi ne volis ? Diru al via damo, ke ŝi ne bezonas timi. La mastro de la domo estas bonega viro. Li ne faras al ŝi malbonon. Donu al ŝi malgrandan puŝon."

"Kion vi diras ?" mi demandis al Zurin. "Kiu amikino de Pugaĉov? Ŝi estas la filino de la forpasinta kapitano Mironov. Mi liberigis ŝin el prizono, kaj nun mi akompanas ŝin al la vilaĝo de mia patro, kie ŝi restados."

"Kiel ? Estas do vi kiun oni venis anonci. ? Nu, kio tio signifas ?"

"Mi rakontos tion al vi poste. Por la momento, en la nomo de Dio, retransviligu la povran knabinon, kiun timigas la husaroj."

Zurin tuj donis kelkajn ordonojn. Li mem eliris sur la straton por ekskuzi sin antaŭ Maria Ivanovna de la nelibervola eraro kaj ordonis al la kavaleria serĝento doni al ŝi la plej bonan loĝejon de la tuta urbeto. Mi estis tranoktiĝonta ĉe li.

Ni vespermanĝis, kaj kiam ni estis solaj, mi rakontis al li miajn aventurojn. Zurin atente aŭskultis min. Post kiam mi finis mian rakonton, li skuis la kapon kaj diris :

"Ĉio ĉi estas tre bona, frato,, sed unu solan aferon mi ne komprenas : kial diable vi volas edziĝi al ŝi ? Mi estas honesta oficiro, kaj mi ne volas trompi vin, sed kredu min : edziĝo estas folajo. Ĉu vi vere bezonas embarasi vin per edzino kaj fariĝi la nutristino de viaj infanoj ? Ba ! Aŭskultu min kaj senigu vin de la filino de tiu kapitano. Mi balais la vojnon al Simbirsk : ĝi estas sekura. Sendu ŝin sola al viaj gepatroj kaj restu kun mi en la eskadrono. Ne havas sencon por vi reiri al Orenburgo. Vi denove falos inter la manojn de la ribeluloj, kaj vi ne povos esperi ankoraŭfoje eskapi de tie. Tiel via stulta enamiĝo pasos tute sola, kaj ĉio estos en ordo."

Kvankam mi ne tute konsentis kun li, mi sentis, ke mia honoro postulas, ke mi restu en la armeo de la Imperiestrino. Mi do decidis sekvi la konsilon de Zurin : sendi Maria Ivanovna al la vilaĝo de miaj gepatroj kaj resti en lia eskadrono.

Saveliĉ venis malvesti min. Mi klarigis al li, ke la morgaŭon li devos esti preta por foriri

kun Maria Ivanovna kaj Palaŝa. Sed li obstine protestis :

"Hej, mastro, kion vi diras ? Kiel mi povus forlasi vin ? Kiu gardos vin ? Kion diros viaj gepatroj ?"

Konante la obstinecon de mia mentoro, mi decidis konvenki lin per dolĉeco kaj sincereco.

"Mia amiko Arĥip Saveliĉ," mi diris al li, "ne rifuzu fari tion, estu mia bonfaranto. Mi ne bezonos serviston, kaj mi ne estus trankvila, se Maria Ivanovna forirus sen vi. Servante ŝin, vi servos min, ĉar mi firme decidis edziĝi al ŝi, tuj kiam la cirkonstancoj permesos tion."

Tiam Saveliĉ kunfaldis la manojn kun mieno de nepriskribebla konsterneco.

"Ĉu edziĝi?" li ripetis. "Ĉu la infano deziras edziĝi ? Sed kion diros via patro kaj via patrino, kiam ili ekscios tion ?"

"Ili certe konsentos, kiam ili pli bone konos Maria Ivanovna," mi respondis. "Mi ankaŭ kalkulas je vi. Mia patro kaj mia patrino kredos vin. Vi intervenos por ni, ĉu ne ?"

La maljunulo estis kortuŝita.

"Aĥ, mia infano, Pjotr Andrejiĉ," li respondis. "Vi pensas iom tro frue pri geedziĝo. Sed Maria Ivanovna estas tiel bona knabino, ke estus peko lasi eskapi tiun okazon. Estu do, kiel vi volas. Mi akompanos ŝin, tiun anĝelon de la bona Dio, kaj mi humile raportos al viaj gepatroj, ke tia finĉino ne bezonas doton."

Mi dankis Saveliĉ kaj kuŝiĝis en la ĉambro de Zurin. Varmigita kaj konfuzita, mi estis perdiĝinta en babilajoj. Komence plaĉis al Zurin paroli kun mi, sed iom post iom liaj vortoj fariĝis pli maloftaj kaj malpli prudentaj. Finfine kiel respondo al mi ne plu scias kiu demando, li komencis ronki. Mi eksilentis kaj baldaŭ sekvis lian ekzemplon.

La morgaŭon mi iris ĉe Maria Ivanovna kaj eksplikis al ŝi mian proponon. Ŝi rekonis ilian ĝustecon kaj tuj konsentis kun mi. La eskadrono de Zurin devis forlasi la vilaĝon la saman tagon. Ni ne povis perdi tempon. Mi separiĝis de Maria Ivanovna, post kiam mi konfidis ŝin al Saveliĉ kaj donis al tiu ĉi leteron por miaj gepatroj. Maria Ivanovna ploris.

"Adiaŭ, Pjotr Andrejiĉ," ŝi diris per dolĉa voĉo. "Nur Dio scias, ĉu ni ankoraŭ renkontos nin, sed mi ne forgesos vin mian tutan vivon. Ĝis mia tombo vi restos la sola en mia koro."

Mi povis respondi nenion. Homoj ĉirkaŭis nin. Antaŭ ili mi ne volis lasi liberan kuron al miaj sentoj, kiuj superfortis min. Finfine ŝi foriris. Malgaja kaj silentema mi reiris al

Zurin. Li volis amuzi min, kaj mi volis distri min. Ni pasigis tagon en gajeco kaj foleco, kaj vespere ni foriris al la kamparo.

Estis la fino de februaro. La vintro, kiu ĝenis la militistajn operaciojn, finiĝis, kaj niaj generaloj preparis sin al komuna operacio. Pugaĉov ĉiam troviĝis proksime al Orenburgo. De ĉiuj flankoj tamen regulaj trupoj kolektiĝis ĉirkaŭ li kaj proksimiĝis al la nido de la trompisto. Vidante la proksimiĝon de nia granda armeo, la vilaĝoj tuj submetis sin al ni. La bandoj de la banditoj forfuĝis ĉiufanken, kaj ĉio permesis antaŭvidi baldaŭan favoran finon.

Iom poste princo Galicin venkis Pugaĉov apud la fortikaĵo de Tatuŝĉev, disbatis liajn trupojn, liberigis Orenburgo kaj laŭŝajne finis la ribelon. En tiu momento Zurin ekhavis la komision batali kontraŭ bando da ribelantaj baŝkiroj, kiuj disiris eĉ antaŭ oni vidis ilin. La printempo surprizis nin en malgranda tartara vilaĝo. La riveroj transbordiĝis kaj ĉiuj vojoj fariĝis neuzeblaj. Ni konsolis nin de nia neniofarado, esperante, ke tiu teda kaj malglora milito kontraŭ banditoj kaj sovaĝuloj baldaŭ finiĝos.

Sed oni ankoraŭ ne sukcesis kapti Pugaĉov. Li aperis en siberiaj fabrikoj, kie li kolektis novajn bandojn, kaj baldaŭ rekomencis rabi. La famoj pri liaj sukcesoj denove propagiĝis. Ni eksciis la detruon de siberiajn fortikaĵojn. Baldaŭ la novaĵo de la konkero de Kazan konfuzis la ĉefojn de nia armeo, kiu pace dormetis kalkulante je la senpovo de la malestiminda ribelo. Zurin ricevis la ordonon transiri la riveron Volgon

Mi ne priskribos nian militiron kaj la finon de la milito. Mi mallonge diros, ke la mizero atingis sian paroksismon. Ni trairis vilaĝojn kiuj estis detruitaj de la ribeluloj, kaj vole nevole prenis de la malriĉaj loĝantoj ĉion kion ili estis povintaj savi. Nenie estis guberniestroj. La proprietuloj kaŝis sin en la arbaroj. La bandoj de la ribeluloj ĉie rabis kaj detruis ĉion. La ĉefoj de niaj taĉmentoj tute sendepende punis kaj pardonis. La situacio de tiu vaste regiono, kie furiozis incendioj, estis terura... Dio malhelpu, ke vi iam vidu tian frenezan kaj senkompatan rusan ribelon !

Pugaĉov fuĝis, persekutata de Ivan Ivanoviĉ Miĥelson. Baldaŭ ni eksciis lian kompletan malvenkon. Finfine Zurin ricevis la novaĵon, ke oni arestis la trompiston kaj samtempe la ordonon ĉesi la agadon. La milito estis finita. Finfine mi povis iri al miaj gepatroj. La ideo, ke mi estis ĉirkaŭbrakonta ilin kaj revidi Maria

Ivanovna, pri kiu mi ricevis nenian novaĵon, plenigis mi per entuziasmo kaj malpacienca. Mi saltetis kiel infano. Zurin ekridis kaj diris, suprentirante la ŝultrojn :

"Ne, vi malbone finiĝos ! Se vi edziĝos, tio estos via perdiĝo."

Stranga sento tamen konfuzis min en mia ĝojo. Mi pensis pri la bandito kovrita de la sango de tiom da senkulpaj viktimoj, pri la puno kiu atendis lin, kaj mi estis konsternita malgraŭ mi mem :

"Jemelja, Jemella," mi pensis kun bedaŭro, kial vi ne pereis per glavo aŭ per mitrajlo? Vi havis nenion pli bone farendan!"

Kion vi volas? Mi ne povis pensi pri li sen ankaŭ pensi pri la pardono, kiun li donis al mi en la plej terura momento de mia vivo kaj pri la liberigo de mia fianĉino.

Zurin donis al mi forpermeson. Kelkajn tagojn poste, mi estis troviĝonta ĉe mia familio kaj revidonta Maria Ivanovna...

Sed tiam neatendata fulmotondro frapis min.

La tagon de mia foriro, en la sama momento, kiam mi preparis min adiaŭi Zurin, tiu ĉi eniris ĉe min, tenante paperon en sia mano, kun eksterordinare zorgema mieno. Mi estis kvazaŭ frapita en la koro. Li forsendis mian prizorgiston kaj deklaris, ke li volis paroli al mi sen atestantoj..

"Pri kio temas ?" mi demandis lin, malpacienca.

"Malgranda malagrablaĵo," li respondis, enmanigante al mi la paperon. "Legu, kion mi ĵus ricevis."

Mi komencis legi. Temis pri sekreta ordono adresita al ĉiuj taĉmentĉefoj aresti min sur kia ajn loko mi troviĝos kaj sendi min sub eskorto al Kazan al la esplorkomisiono, kreita por trakti la aferon Pugaĉov.

La papero preskaŭ falis el miaj manoj.

"Nenio estas farebla pri tio," diris Zurin, "sed estas mia devo obei al la ordono. Verŝajne la famo de viaj amikaj rilatoj kun Pugaĉov atingis la registaron. Mi esperas, ke la afero ne havos malbonan sekvon, kaj ke vi povos pravigi vin antaŭ la komisiono. Ne malesperu kaj foriru !"

Mia konscienco estis pura. Mi ne timis la tribunalon, sed la penso, ke mi devis prokrasti mian agrablan reiron hejmen, eble por kelkaj monatoj, terurigis min. La veturilo estis preta. Zurin amike adiaŭis min. Oni igis min enpaŝi la veturilon. Du husaroj akompanis min, tenante nudan sabron en sia mano, kaj mi foriris sur la ĉefvojo.

XIV. LA JUĜO

Bona famo estas kiel undo.

(Proverbo)

Mi estis konvinkita, ke mia libervola foresto de Orenburgo estis la kaŭzo de ĉio. Mi povis facile pravigi min. La surĉevalaj eliroj neniam estis malpermesitaj, sed ili estis eĉ forte aprobataj. Mi povis esti akuzata pro tro granda temerareco, sed ne pro malobeco. Sed miaj amikecaj rilatoj kun Pugaĉov povis esti pruvataj de granda nombro da atestantoj, kaj devis ŝajni almenaŭ tute suspektaj. Dum la tuta vojaĝo mi pensis pri la esplordemandoj kiuj atendis min. Mi preparis miajn respondojn, kaj mi decidis deklari antaŭ la tribunalo la tutan veron, pensante, ke tio estas la plej simpla maniero kaj samtempe la plej sekura maniero pravigi min.

Mi trovis la urbon Kazan bruligita kaj dezerta. Laŭlonge de la stratoj staris, anstataŭ domoj, amasoj da cindroj kaj leviĝis nigraj muroj sen tegmentoj kaj fenestroj. Tio estis la spuroj kiujn postlasis Pugaĉov. Oni kondukis min en fortikaĵon, kiu estis restinta netuŝita meze de la bruligita urbo. La husaroj donis min al oficiro de la gvardio, kiu vokigis forĝiston. Tiu ĉi metis ĉenon al miaj piedoj, kiun li firme ŝlosis. Tiam oni kondukis min en prizanon kaj lasis min sola en malvasta kaj sombra hundejo, en unu el kies nudaj muroj troviĝis malgranda fenestro ekipita per fera kradeto.

Tiu komenco antaŭdiris sl mi nenion bonan. Mi tamen perdis nek mian kuraĝon nek mian esperon. Mi rifuĝis al la konsolo de ĉiuj afliktitoj, kaj gustante la dolĉecon de preĝo, kiu fluis el pura, sed vundita koro, kaj mi trankvile endormiĝis sen fari al mi zorgojn pri tio kio okazis al mi.

La morgaŭon la gardisto vekis min, deklare, ke oni vokas min al la komisiono. Du soldatoj igis min transiri la korton, kondukis min en la domon de la komandanto, haltis en la antaŭĉambro kaj igis min sola eniri la salonon.

Mi eniris en sufiĉe vasta salono. Malantaŭ tablo kovrita per paperoj sidis du viroj : generalo de matura aĝo kun severa, malvarma mieno, kaj kapitano de la gvardio de proksimume dudek kvin jaroj kun tre agrabla eksteriĝo, eleganta kaj bonmaniera. Apud la fenestro ĉe aparta tablo sidis sekretario, la plumo malantaŭ la orelo, klinita super paperfolio, preta noti miajn deklarojn.

La demandado komenciĝis. Oni demandis miajn nomon, antaŭnomon kaj patronimon. La generalo volis scii, ĉu mi estas la filo de Andrej Petroviĉ Grinjov. Mia jesa respondo kostis al mi la sekvantan severan rimarkon :

"Bedaŭrindas, ke tiel honorinda patro havas tiel maldignan filon."

Mi trankvile respondis, ke, kiel ajn gravaj estas la akuzoj kiuj pezas sur min, mi esperas povi redukti ilin al nenio, simple klarigante la veron. Mia certeco malplaĉis al li.

"Ho ! Vi estas ruza," li diris al mi, kuntirante la brovojn. "Ni jam vidis tiajn."

Tiam la junulo demandis al mi :

"En kiu momento vi iris en la servon de Pugaĉov, kaj en kiu mision vi estis uzata ?"

Kun indigno mi repondis, ke mi, kiel oficiro kaj nobelo, ne povis iri kaj ankaŭ ne iris en la servon de Pugaĉov, kaj ankaŭ ricevis nenian mision de Pugaĉov.

"Kial," plu demandis mia esplordemandanto, "nobelo kaj oficiro sola estis ŝparita de la trompisto, kiam ĉiuj liaj kamaradoj estis sovaĝe mortigitaj ? Kial la sama oficiro kaj nobelo festis amikece kun la ribelulo ? Kial li ricevis de la ĉefo donacojn – peltaĵon, ĉevalon kaj duonrublon ? De kie venas tiu stranga amikeco, kaj sur kio ĝi baziĝas, se ne sur perfido, aŭ almenaŭ sur malnobla kaj krima mal-kuraĝeco ?"

Mi estis profunde humiligita de la vortoj de la oficiro de la gvardio, kaj mi komencis varme pravigi min. Mi parolis pri mia renkonto sur la stepo dum neĝoŝtormo kun Pugaĉov, kiun mi tute ne konis, kiel li rekonis min poste en Bjelogorsk kaj ŝparis min post la kaptado de la fortikaĝo. Mi diris, ke mi ne havis skrupulojn, kio estis vera, por akcepti de la trompisto tulupon kaj ĉevalon, sed ke ĝis la lasta minuto mi defendis la fortikaĵon Bjelogorsk kontraŭ la banditoj. Fine mi prenis kiel atestanton mian generalon, kiu povis paroli pri mia diligenteo dum la sieĝo de Orenburgo.

La maljunulo prenis de la tablo malfermitan leteron kaj komencis laŭtvoĉe legi :

"Respondante al la enketo de Via Ekscelenco pri la leŭtenanto Pjotr Andrejiĉ Grinjov, kiu estus envolvita en la aktuala ribelo kaj havis kun la banditoj rilatojn neakordigeblajn kun la servo kaj la devo, mi havas la honoron deklari : la nomita leŭtenanto Pjotr Andrejiĉ Grinjov servis en Orenburgo de la komenco de oktobro de la lasta jaro 1773 ĝis la 24-a de februaro de la kuranta jaro, dato en kiu li forlasis la urbon, kaj ekde tiu tempo li ne reprenis sian servon,

en miaj trupoj. Mi eksciis de transfuĝintoj, ke li vizitis Pugaĉov en sia urbeto, kaj ke li iris kun li al la fortikaĝo de Bjelogorsk, kie li servis antaŭe. Koncerne lian konduton mi povas ..."

Tiam li interrompis la legadon kaj severe diris al mi :

"Kion vi havas direndan por via defendo ?"

Mi volis daŭrigi, kiel mi komencis, kaj ekspliki miajn rilatojn kun Maria Ivanovna tiel sincere kiel la reston, kiam mi sentis nevenkeblan naŭzon. Mi pensis, ke, se mi nomus ŝin, la komisiono vokus ŝin kiel atestanton, kaj la ideo miksi ŝian nomon en tiujn hontindajn akuzojn kaj venigi ŝin ĉi-tien por esti konfrontita al banditoj, tiu terura ideo tuŝis min tiagrade, ke mi konfuziĝis en miaj vortoj

Miaj juĝistoj, kiuj, laŭ mia impresado, bonvole aŭskultis min en la komenco, vidante mian konfuziĝon, denove fariĝis malfavoraj kontraŭ mi. La oficiro de la gvardio postulis, ke oni konfrontu min al la ĉefa denunciinto. La generalo vokis antaŭan banditon. Mi turnis min al la pordo, atendante mian akuzanton. Kelkajn minutojn poste, ĉenoj resonis, la pordo malfermiĝis kaj Ŝvabrin eniris. Li tiom ŝanĝiĝis, ke mi konsterniĝis. Li estis terure madika kaj pala. Liaj haroj, kiuj antaŭe estis nigraj, fariĝis tute blankaj, kaj lia longa barbo estis konfuzita. Li ripetis siajn akuzojn per malforta, sed insolenta voĉo. Se kredi lin, mi estis sendita de Pugaĉov al Orenburgo kiel spionon. Ĉiutage mi elrajdis por partopreni en la bataletoj por transdoni skribitajn komunikaĵojn pri la situacio en la urbo. Finfine mi transiris al la flanko de la uzurpinto. Mi estus vojaĝinta de fortikaĝo al fortikaĝo, klopodante noci miajn kamaradojn-perfidulojn por okupi iliajn postenojn kaj ricevi la rekompencojn disdonatajn de la trompisto. Mi silente aŭskultis lin kaj estis kontenta pri unu afero : la nomo de Maria Ivanovna ne estis prononcita de la malestiminda krimulo. Ĉu lia sinamo estus suferinta, se li pensis pri tiu kiu malestime repuŝis lin, ĉu en lia koro estus restinta kaŝita fajrero de la sento, kiu devigis ankaŭ min silenti ? Kiel ajn estis : la nomo de la filino de la komandanto de Bjelogorsk ne estis prononcita antaŭ la komisiono. Mia decido estis pli firma ol iam antaŭe, kaj kiam la juĝistoj demandis al mi, kion mi havis respondendan al la atesto de Ŝvabrin, mi diris, ke mi restis ĉe miaj antaŭaj klarigoj kaj ke mi povis nenion aldoni por mia defendo. La generalo igis nin forkonduki. Mi trankvile rigardis Ŝvabrin, sed mi ne alparolis lin. Li malice rikanis kaj, levante siajn ĉenojn, li preteriris

min, rapidigante siajn paŝojn. Oni denove kondukis min al la prizono, kaj oni ne plu vokis min por esti esplordemandata.

Mi ne plu estis atestanto de ĉio pri kio mi volas nun informi la leganton., sed mi aŭdis rakonti tion tiom da fojoj, ke la plej malgrandaj detaloj restis gravuritaj en mia memoro, kaj ke ŝajnas al mi, ke mi ĉeestis nevidebla tiujn eventojn.

Maria Ivanovna estis akceptita de miaj gepatroj kun la sincera koreco, kiu distingis la homojn en al malnovaj tempoj. Ili konsideris kiel benon de Dio la okazon povi akcepti kaj zorgi pri la povra orfino. Baldaŭ ili sincere korligis sin al ŝi, ĉar estis neeble koni ŝin sen ami ŝin. Mia amo al ŝi jam ne plu ŝajnis frenezeco al mia patro, kaj mia patrino deziris nur unu aferon, nome ke ŝia Petruŝa edziĝu al la aminda filino de kapitano Mironov.

La novaĵo de mia aresto mirigis la tutan familion. Maria Ivanovna rakontis al miaj gepatroj la historion de mia stranga amikeco kun Pugaĉov tiel simple, ke ĝi ne nur ne maltrankviligis ilin, sed ofte eĉ bonkore ridigis. Ilin. Mia patro ne volis kredi, ke mi estus miksinta min en la ribelon, kies celo estis la renverson la trono kaj detruo la nobelaron. Li severe esplordemandis Saveliĉ. Mia mentoro ne kaŝis, ke lia mastro estis bone akceptita de Jemelka Pugaĉov kaj ke li estis traktata amike, sed li ĵuris ke li neniam aŭdis paroli pri perfido. La maljunuloj trankviliĝis kaj komencis malpacience atendi bonajn novaĵojn. Maria Ivanovna profunde maltrankviliĝis, sed ŝi silentis, ĉar ŝi estis dotita per la plej grandaj modesteco kaj prudento.

Kelkajn semajnoj pasis... Iutage mia patro ricevis el Sankt-Peterburgo leteron de nia parenco, princo B... La princo skribis pri mi. Post la kutimaj ĝentilecaj formuloj li eksplikis, ke la suspektoj koncerne mian partopreno en la konspiro de la ribeluloj estis malfeliĉe tiel forte fundamentitaj, ke mi devos suferi ekzempleran punon, sed ke la Imperiestrino, konsiderante la servojn de mia patro kaj lia granda aĝo, decidis pardoni la kriman filon kaj ŝpari al li malhonoran ekzekuton, ekzilante lin al malproksima regiono en Siberio por la resto de lia vivo.

Tiu bato preskaŭ mortigis mian patron. Li perdis sian kutiman sinregon, kaj lia ĉagreno, kiu kutime estis muta, esprimiĝis per amaraj plendoj.

"Kiel do!" li ripetis, "mia filo estus konspirinta kun Pugaĉov! Granda Dio! Mi do jam

vidis ĉion. La Imperiestrino savas lian vivon. Ĉu ŝi kredus, ke mi estos pli feliĉa pro tio? Ne morto estas terura. Mia avo mortis ekzekutita, defendante ion kion li konsideris sakrala; mia patro suferis kun Volinskij kaj Ĥruŝĉov. Sed ke nobelo perfidus sian ĵuron, aliĝus al banditoj, al murdistoj, al forkurintaj servutuloj estas honto kaj malbeno por nia familio."

Mia patrino, timigita de tiu malespero, ne kuraĝis plori en lia ĉeesto kaj klopodis doni al li kuraĝon, dirante, ke tiuj famoj estas falsaj, ke la opinioj de la homoj estas malkonstantaj. Sed mia patro restis nekonsolebla.

Maria Ivanovna turmentis sin pli ol la aliaj. Konvenkite, ke mi estus povinta pravigi min, se mi estus menciinta ŝian nomon, ŝi divenis la veron kaj konsideris sin respondeca pro mia malfeliĉo. Ŝi kaŝis siajn larmojn kaj suferojn al ĉiuj kaj samtempe daŭre pensis pri la rimedoj savi min.

Unu vesperon, mia patro, sidanta sur la divano, trafoliumis la *Agendon de la Kortego*, sed liaj pensoj estis alie, kaj la legado ne havis sian kutimon efikon. Li fajfis malnovan marŝon. Silentante, mia patrino estis trikanta lanan ŝalon, kaj de tempo al tempo larmoj falis sur ŝian laboraĵon. Subite Maria Ivanovna, kiu ankaŭ laboris, deklaris, ke neceseco devigas ŝin iri al Peterburgo, kaj ŝi petis, ke oni havigu al ŝi la necesajn monrimedojn. Tio ĉagrenigis mian patrinon.

"Kial iri al Sankt-Peterburgo?" ŝi demandis, "Ĉu ankaŭ vi, Maria Ivanovna, volas forlasi nin?"

Maria Ivanovna respondis, ke sia tuta sorto dependas de tiu vojaĝo, ke ŝi iros serĉi la protekton kaj helpon de potencaj personoj kiel filino de viro, kiu oferis sian vivon al sia devo.

Mia patro klinis la kapon. Ĉiu vorto, kiu memorigis lin pri la pretekstita krimo de sia filo turmentis lin kaj ŝajnis al li riproĉo.

"Foriru, mia filino," li diris suspirante. "Ni ne volas ĝeni via felicecon. Dio donis vin kiel fianĉinon al brava viro kaj ne al brutala perfidisto."

Li leviĝis kaj forlasis la ĉambron.

Restinte sola kun mia patrino, ŝi eksplikis al ŝi parton de sia plano. Plorante, mia patrino ĉirkaŭbrakis ŝin kaj preĝis al Dio por la sukceso de ŝia entrepreno. Oni ekipis Maria Ivanovna, kaj kelkajn tagojn poste ŝi survojiĝis akompanata de la fidelaj Palaŝa kaj Saveliĉ, kiu, separita de mi per la forto de la eventoj, konsolis sin per la penso, ke li servis almenaŭ tiun kiun mi nomis mia fianĉino.

Sen problemoj Maria Ivanovna alvenis en Sofia, kaj eksciinte, ke en tiu momento la imperiestrino troviĝas en Carskoje-Selo²², ŝi decidis halti tie. En la gastejo oni donis al ŝi angulon malantaŭ apartiga vando. La edzino de la gastejestro tuj alparolis ŝin kaj deklaris, ke ŝi estas la nevino de kortega servisto, kaj incisis ŝin en ĉiuj sekretoj de la vivo en la palaco. Ŝi rakontis, je kioma horo la Imperiestrino kutime vekiĝas, trinkas sian kafon, faras sian promenadon; kiuj altaj personoj troviĝas ĉe ŝi en tiu momento, kion ŝi diris ĉe la tablo la antaŭan tagon, kiun ŝi akceptis la vesperon. Konkize dirite, la konversacio de Anna Vlasjevna reprezentis kelkajn paĝojn da historiaj analoj, kiuj povus esti altvaloraj por la postulearo. Maria Ivanovna atente aŭskultis ŝin. Ili iris en la ĝardenon, kaj Anna Vlasjevna rakontis al ŝi la historion de ĉiu pado kaj ĉiu ponteto, kaj, saturinte sin, ili revenis al la gastejo, tre kontentaj unu pri la alia.

La sekvantann matenon Maria Ivanovna vekiĝis tre frue, vestis sin sen fari bruon kaj iris en la ĝardenon. La mateno estis bela, la suno prilumis la suprojn de la tilioj, kiuj jam flaviĝis sub la freŝa aŭtuna vento. Vasta senmova lago brilis en la suno. Vekiĝinte, la cignoj digne eliris de sub la arbustoj kiuj kreskis sur la bordoj. Maria Ivanovna iris al belega herbejo, kie antaŭnelonge oni starigis monumenton honore al la venkoj de grafo Pjotr Rumjancev. Subite blanka hundeto de angla raso ekbojis kaj kuris renkonte al ŝi. Maria Ivanovna timiĝis kaj haltis. En la sama momento resonis agrabla virina voĉo:

"Ne timu. Ĝi ne mordas."

Kaj Maria Ivanovna ekvidis damon, sidanta sur benko antaŭ la monumento. La damo rigardis ŝin insiste, kaj Maria Ivanovna, kiu siaflanke ĵetis kaŝitan rigardon sur ŝin, sukcesis ekzameni ŝin de la kapo ĝis la piedoj. Ŝi surhavis blankajn matenajn vestojn, noktokufon kaj litjaketon. Ŝi ŝajnis havi ĉirkaŭ kvardek jarojn. Ŝia ronda, kolorita vizaĝo esprimis dignecon kaj trankvilecon, sed ŝiaj bluaj okuloj kaj ŝia leĝera rideto havis neesprimeblan ĉarmon.

La damo la unua rompita la silenton.

"Sendube vi ne estas de ĉi tie," ŝi diris.

"Ne, Sinjorino, hieraŭ mi alvenis el suda provinco."

"Ĉu vi venis kun viaj gepatroj?"

"Ne, Sinjorino, mi venis sola."

"Ĉu sola? Sed vi estas ankoraŭ tiel juna."

"Mi havas plu nek patron nek patrinon."

"Sendube vi estas ĉi tie pro aferoj?"

"Jes, Sinjorino, mi venis prezenti peton al la Imperiestrino."

"Vi estas orfino. Verŝajne vi havas plendon pro maljusteco kaj malbona traktado."

"Tute ne, Sinjorino. Mi venis peti pardonon kaj ne justecon."

"Ĉu vi volas diri, kiu vi estas?"

"Certe. Mi estas Maria Ivanovna, la filino de kapitano Mironov."

"Kapitano Mironov, tiu sama kiu komandis unu el la fortikaĵoj de Orenburgo?"

"Li mem, Sinjorino."

La damo estis videble kortuŝita..

"Ekskuzu min," ŝi diris per ankoraŭ pli afabla voĉo, se mi enmiksiĝas en viajn aferojn, sed mi apartenas al la kortego. Ekspliku al mi en kiu konsistas vian peton. Eble mi povos helpi vin."

Maria Ivanovna respektoplene dankis ŝin. Ĉio en la nekonata damo altiris la koron de Maria Ivanovna kaj insipiris al ŝi fidon. Maria Ivanovna tiris el sia poŝo falditan paperon kaj donis ĝin al sia protekantino, kiu komencis silente legi ĝin.

Komence ŝi legis atente kaj bonvole, sed subite la esprimo de ŝia vizaĝo ŝanĝiĝis, kaj Maria Ivanovna, kiu sekvis per la okuloj ĉiujn gestojn de la damo, timiĝis pro ŝia mieno, kiu minuton antaŭe estis agrabla kaj trankvila.

"Vi intervenas por leŭtenanto Grinĵov," ŝi diris malvarme. "La Imperiestrino ne povos lin pardoni. Li aliĝis al la trompisto Pugaĉov ne pro nescio aŭ leĝeranimeco, sed kiel malmorala kaj malutila fripono."

"Tio ne estas vera," ekkriis Maria Ivanovna.

"Kiel do! Tio ne estas vera?" diris la damo, koleriĝinte.

"Tio ne estas vera! Mi scias ĉion, ĉar mi estis tie, kaj mi rakontos al vi la tutan veron. Estas pro mi ke li akceptis ĉion kio okazis al li. Se li ne pravigis sin antaŭ la tribunalo, li faris tion por ne embarasigi min."

Tiam ŝi rakontis kun verve ĉion kion la leganton jam scias.

La damo atente aŭskultis ŝin.

"Kie vi restadas nun?" ŝi tiam demandis, kaj eksciinte, ke Maria Ivanovna loĝas ĉe Anna Vlasjevna, ŝi diris ridetante:

"Ha jes, mi konas ŝin. Adiaŭ, mia infano. Parolu al neniu pri nia renkonto. Mi esperas, ke vi ne atendos longe respondon al via letero."

²² La somerpalaco de rusaj caroj apud la finna golfo

Post tiuj vortoj, ŝi leviĝis kaj eniris kovritan padon, kaj Maria Ivanovna reiris al Anna Vlasjevna, plena je ĝojo kaj espero.

La gastejstrino skoldis ŝin, ĉar ŝi iris promeni je tiel frua horo en aŭtuno, ĉar, laŭ ŝi, tio estas malbona por la sano de knabino. Ŝi tuj alportis la samovaron²³ kaj estis preta lanĉi sin, kiam la teo estis servita, en senfinajn rakontojn pri la kortego, kiam subite kortega veturilo haltis antaŭ la perono kaj ĉambristo envenis deklari, ke la Imperiestrino invitas la filinon de Mironov viziti ŝin.

Anna Vlasjevna estis senparola pro miro kaj perdiĝis en komplezeco.

"Ho Sinjoro Dio!" ŝi ekkriis. "La Imperiestrino invitas vin al la kortego? Kiel do ŝi eksciis, kie vi loĝas ĉi tie? Sed kiel, mia filino, vi prezentos vin al la Imperiestrino? Mi pensas, ke vi ne scias fari paŝon en la kortego kiel decas... Ĉu mi ne akompanos vin? Ĉiakaze mi povas almenaŭ preventi, ke vi faru mallertaĵojn. Kaj plue, kiel vestita vi pensas iri? Ĉu per viaj vojaĝaj vestaĵoj? Ĉu mi ne devus iri prunti de la akuŝigistino sian flavan robon?"

La ĉambristo diris, ke plaĉas al Ŝia Imperiestrina Moŝto, ke Maria Ivanovna venu sola al ŝi en la kostumo kiun ŝi surhavas.

Estis nenio farenda pri tio: Maria Ivanovna paŝis en la veturilon kaj iris al la palaco, akompanata de la konsiloj kaj benoj de Anna Vlasjevna.

Maria Ivanovna antaŭsentis, ke nia sorto estas ŝanĝigonta. Ŝia koro forte batis kaj ŝrumpis. Kelkajn minutojn poste la veturilo haltis antaŭ la palaco. Tremetante Maria Ivanovna supreniris la ŝtuparon de la palaco. La pordoj grande malfermiĝis por ŝi. Ŝi trairis multajn belegajn malplenajn ĉambregojn. La ĉambristo montris al ŝi la vojon. Finfine ili alvenis antaŭ fermita pordo. La ĉambristo deklaris, ke li iris anonci ŝin, kaj lasis ŝin sola.

La penso, ke ŝi estas vidonta la Imperiestrino vizaĝ-al-vizaĝe tiom timigis ŝin, ke ŝi povis apenaŭ teni sin rekta sur siaj kruroj. Minuton poste, la pordoj malfermiĝis, kaj ŝi eniris la tualetkabineton de la imperiestrino.

La imperiestrino sidis antaŭ sia frizistino. Kelkaj korteganoj ĉirkaŭis ŝin kaj respekto-plene forlasis la ĉambron, kiam Maria Ivanovna eniris. La imperiestrino afable turnis sin al ŝi, kaj Maria Ivanovna rekonis la damon, al kiu ŝi parolis tiel sincere kelkajn minutojn antaŭe.

La imperiestrino petis ŝin pli proksimiĝi al ŝi kaj diris ridetante:

"Mi estas feliĉa povi teni mian promeson kaj ekzameni vian peton. Via afero estas aranĝita. Mi estas konvinkita, ke via fianĉo estas senkulpa. Jen leteron, kiun vi transdonos al via estonta bopatro."

Maria Ivanovna prenis la leteron per tremita mano kaj ekplorante, ŝi falis ĉe la piedojn de la imperiestrino, kiu relevis ŝin kaj ĉirkaŭbrakis ŝin. Tiam la imperiestrino diris al ŝi:

"Mi scias, ke vi ne estas riĉa," ŝi diris, "sed mi multe ŝuldas al kapitano Mironov kaj do ankaŭ al lia filino. Ne maltrankviliĝu pri la estonteco. Mi organizos vian situacion."

Tiamaniere konsolinte la povran orfinon, la imperiestrino forsendis ŝin. Maria Ivanovna foriris en la sama veturilo de la kortego. Anna Vlasjevna, kiu malpacience atendis ŝian revenon, superŝutis ŝin per demandoj, al kiuj Maria Ivanovna respondis, kiel ŝi povis. Malgraŭ ke Anna Vlasjevna estis malkontenta pri ŝia manko de memoro, kiun ŝi atribuis al ŝia provinca timideco, kaj noblanime ekskuzis ŝin. La saman tagon Maria Ivanovna, eĉ sen viziti Sankt-Peterburgo, revojaĝis al sia vilaĝo...

Tie ĉi haltas la memoraĵoj de Pjotr Andrejiĉ Grinĵov. La familiaj rakontoj komunikas, ke li estis liberigita fine de 1774 laŭ speciala ordo, ke li ĉeestis la ekzekuton de Pugaĉov, kiu rekonis lin en la homamaso kaj faris al signon per la kapo. Minuton poste tiu kapo, morta kaj sanganta, estis montrita al la popolo.

Baldaŭ poste Pjotr Andrejiĉ kaj Maria Ivanovna geedziĝis. Ilia posteularo prosperas en la gubernio Simbirsk. Je tridek verstoj de *** troviĝas vilaĝo, kiu apartenas al dek proprietuloj. En unu el la aloj de la sinjora domo oni montras la aŭtografan leteron de Katarina la II-a enkadritan sub vitro. Ĝi estis direktita al la patro de Pjotr Andrejiĉ kaj enhavas la pardonon al lia filo kaj laŭdon de la inteligenteco kaj koro de la filno de kapitano Mironov.

La manuskripto de Pjotr Andrejiĉ estis enmanigita al ni de unu el liaj nepoj, kiu eksciis, ke ni okupiĝas pri la epoko priskribita de lia avo. Kun la permeso de liaj gepatroj ni decidis eldoni aparte la historion de lia avo, aldonante al ĉiu ĉapitro konvenan epigrafon kaj ŝanĝante kelkajn verajn proprajn nomojn.

La eldonisto, 19 oktobro 1836

²³ Rusa aparato por fari teon